

Produced by David G. Simpson

La Karavano

de Wilhelm Hauff

el germana lingvo tradukis
J. W. Eggleton

Dua Eldono

1921

TABELO DE ENHAVO.

[Antaŭparolo](#)

[La Karavano](#)

[La Historio pri Kalifo Cikonio](#)

[La Historio pri la Fantomŝipo](#)

[La Historio pri la Dehakita Mano](#)

[La Savo de Fatme](#)

[La Historio pri Malgranda Muk](#)

[La Fabelo pri la Falsa Princo](#)

ANTAŬPAROLO.

Wilhelm Hauff naskiĝis en Stuttgart en 1802. La famaj germanaj poetoj Uhland, Kerner, Mörike kaj Hölderlin, al kiuj, pro ilia komuna patrujo, oni donis la nomon "*Schwäbischer Dichterkreis*" (Svabuja poetaro), estis liaj samtempuloj kaj samlandanoj. Kvankam Hauff mem, kiel literatura geniulo, staras eble malpli alte, ol la ĵus nomitaj, liajn verkojn oni ankoraŭ hodiaŭ legas kun plej granda ĝuo, kaj ĉi tiun popularecon la aŭtoro de la mondkonataj *Fabeloj* certe ŝuldas precipe al sia ĉarma arto rakontista. Kelkaj liaj fabeloj rememorigas forte pri *Mil kaj unu Noktoj*; aliaj estas laŭ stilo pure germanaj. Brilantan talenton de satiristo li ofte montras en siaj noveloj, k.e. en *Der Mann im Mond* (la viro en la luno), verko, kiu unua alportis al li famon. Alia lia ĉefverko estas lia *Lichtenstein*, rimarkinda kiel la unua grava historia romano en germana literaturo; ĝi estas grandparte imitaĵo laŭ Scott kaj baziĝas sur romantika legendo de la Hauff'a hejmlando (Württemberg).

Ankaŭ bonegajn versaĵojn Hauff postlasis al ni: veraj "Volkslieder" (popolaj kantoj) fariĝis kelkaj liaj militistaj liriko, k.e. *Morgenrot* (matenruĝo). Frutempa morto trafis la poeton en lia naskurbo en la jaro 1827.

Por konigi ankaŭ al la esperantista mondo gravan germanan verkiston, kaj por prezenti al ĉiuj karaj samideanoj novan amuzan legaĵon, espereble taŭgan por montri la absolutan sufiĉecon, ja la mirindajn kapablojn de la *sola* Lingvo Internacia, mi entreprenis tiun ĉi tradukon de ses el la Hauff'aj fabeloj. Neniel mi miros nek malĝojos, se la lingva stilo de tiu ĉi libreto ne plaĉos; sed mia laboro ne estos vana, se bonvolaj kritikantoj konsentos pri ĝia fideleco al la fundamento de la amata Lingvo, kaj se germanaj amikoj ĝin juĝos sufiĉe fidela al la originalo. Mi plenumas agrablan devon, kiam mi esprimas ĉi tie mian plej koregan dankon al la Redaktoroj de *The British Esperantist* — kie, sub la titolo "*Fabeloj*," *La Karavano* jam aperis — pro la multaj kaj grandvaloraj konsiloj, per kiuj ili afable kunlaboradis en la verkado de la sekvantaj paĝoj.

J. W. Eggleton.

Haubinda (Germanujo),
la 28an de Aprilo, 1910.

LA KARAVANO.

Trapasis foje la dezerton granda karavano. Sur la vastega ebenaĵo, kie nenio vidiĝas krom sablo kaj ĉielo, jam aŭdiĝis malproksime sonoriletoj de kameloj kaj arĝentaj tintiletoj de ĉevaloj. Densa polva nuboj, ĝin antaŭiranta, anoncis ĝian proksimecon; kaj ĉiam, kiam vento dispelis la nubon, blindigis la okulojn brilegaj armiloj kaj vestoj lumradiantaj.

Tiel montriĝis la karavano al homo, kiu de l' flanko alrajdis al ĝi. Li sidis sur bela araba ĉevalo, kovrita per tigre felo; de la helruĝa rimenaĵo pendis arĝentaj sonoriletoj; kaj sur la kapo de l' ĉevalo flirtadis bela ardea plumfasko. La rajdanto havis noblan aspekton, kaj liaj vestoj estis konformaj al la belegeco de lia ĉevalo. Blanka turbano, riĉe brodita per oro, kovris lian kapon; la jako kaj la ampleksa pantalono estis fajre ruĝaj; kaj je lia flanko pendis kurba riĉtenila glavo. Lia turbano, malsuprentirita survizaĝen; liaj nigraj okuloj, fulmebrilantaj el sub tufaj brovoj; lia longa barbo dependanta sub hoka nazo, — ĉio ĉi tio donis al la rajdanto aspekton sovaĝan kaj malmegan. Kiam li troviĝis proksimume kvindek paŝojn de la fronto de l' karavano, li pikis la ĉevalon, kaj post kelke da momentoj atingis la antaŭgvardion. Tiel eksterordinare estis vidi rajdanton, kiu sola trapasas la dezerton, ke la karavanaj gardistoj eketendis kontraŭ li siajn lancojn, pro timo pri ia atako.

"Kion vi volas fari?" ekkriis la rajdanto, vidante ke oni tiel bataleme akceptas lin. "Ĉu vi kredas, ke unu sola homo atakos vian karavanon?"

La gardistoj, konfuziĝinte, relevis la lancojn; ilia estro alrajdis al la fremdulo kaj demandis, kion li deziras.

"Kiu estas la posedanto de ĉi tiu karavano?" demandis la rajdanto.

"Al *unu* sinjoro ĝi ne apartenas," respondis la alia, "sed al kelkaj komercistoj, kiuj el Mekka vojiras hejmlanden, kaj kiujn ni kondukas tra la dezerto, ĉar ofte atakadas la vojaĝantojn ĉiuspeca kanajlaro."

"Konduku min do al la komercistoj," petis la fremdulo.

"Tio ne povas ankoraŭ fariĝi," respondis la oficiro, "ĉar ni devas antaŭeniri senhalte, kaj la komercistoj troviĝas malantaŭe, je interspaco de almenaŭ kvaronhora vojo. Sed se vi volas rajdi kun mi, ĝis ni haltos por preni la tagmezan ripozon, mi plenumos vian deziron."

La fremdulo respondis nenion; li deligis de la selo sian longan pipon kaj komencis forte fumi, rajdante apud la gardistestro. Tiu ĉi lasta tute ne sciis, kion li devas pensi pri la nekonatulo; li ne kuraĝis rekte demandi lin pri lia nomo; kaj kiam, ruze rimarkigante, "Jen bonan tabakon vi fumas," aŭ, "Belege paŝadas via ĉevalo," li tiel provis iniciati interparoladon, "Jes, jes!" respondis ĉiam la fremdulo, mallonge. Fine ili alvenis al la loko, kie oni volis tagmeze ripozi. Stariginte garde sian taĉmenton, la ĉefgardisto faris halton kaj atendis, kune kun la fremdulo, la alvenon de la karavano. Preterpasis tridek peze ŝarĝitaj kameloj, kiujn kondukis armitaj homoj. Poste venis, sur belaj ĉevaloj, la kvin komercistoj, al kiuj apartenas la karavano, — plejparte grandaĝuloj, kun mieno tre serioza; unu el ili ŝajnis tamen multe pli juna, pli gaja kaj pli vigla, ol la aliaj. La procesion fermis arego da kameloj kaj ŝarĝoĉevaloj.

Oni starigis tendojn, ĉirkaŭ kiuj oni ronde lokis la kamelojn kaj ĉevalojn. En la mezo staris granda tendo el blua silko. Tien la gardistestro alkondukis la fremdulon. Enirinte tra la kurteno de l' tendo, ili ekvidis la kvin komercistojn, kiuj sidis sur orbroditaj kusenoj; nigraj sklavoĵoj prezentis al ili manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.

"Kiun vi enirigas ĉi tien?" alparolis la plej juna komercisto la ĉefgardiston.

Antaŭ ol tiu ĉi povis respondi, la fremdulo diris; "Mia nomo estas Selim Baruh, kaj mi venas el Bagdado. Vojaĝante Mekka'on, mi estis kaptita de rabista bando, sed antaŭ tri tagoj mi sekrete liberigis min. La granda Profeto aŭdigis al mi, de malproksime, la sonorilojn de via karavano; tiel fariĝis, ke jen mi estas ĉe vi. Permesu, ke mi vojaĝu kun vi. Vian protekton vi ne donos al malindulo; kaj kiam vi atingos Bagdadon, mi riĉe rekompencos vin, ĉar mi estas nevo de la grandveziro."

La plej maljuna komercisto prenis la parolon. "Selim Baruh," diris li, "estu bonvena en nia ombro! Ĝoje ni helpos vin. Sed antaŭ ĉio sidiĝu, kaj manĝu kaj trinku kun ni."

Selim Baruh sidiĝis ĉe la komercistoj kaj manĝis kaj trinkis kun ili. Post la manĝado, la sklavoĵoj forigis la vazaron kaj alportis longajn pipojn kaj turkan sorbedon. Longatempe la komercistoj sidis silentaj, elspirante la bluajn tabaknubetojn kaj rigardante, kiel ili ringiĝas kaj malvolviĝas kaj fine malaperas en la aero. Fine la juna komercisto rompis la trankvilon.

"Jam de tri tagoj ni tiel sidadas," diris li, "jen ĉe tablo, jen sur ĉevalo, kaj neniam ni forpelis la tempon per ia amuza distraĵo. Mi sentas grandan enuon, ĉar mi estas

kutiminta vidi post manĝado dancistojn aŭ aŭdi kantojn kaj muzikon. Ĉu vi scias pri nenia rimedo, amikoj miaj, por amuze pasigi la tempon?"

La kvar pli maljunaj komercistoj daŭrigis fumi kaj ŝajnis profunde mediti, sed la fremdulo parolis: "Permesu, ke mi faru al vi jenan proponon. Mi opinias ke, ĉe ĉiu restadejo, unu el ni povas ion rakonti al la aliaj. Tiamaniere ni agrable pasigus la tempon."

"Selim Baruh, vi diris la veron," ekkriis Ahmet, la plej maljuna el la komercistoj. "Ni akceptu la proponon."

"Mi ĝojas, ke la propono plaĉas al vi," diris Selim; "kaj por ke vi sciu, ke mi deziras nenion maljustan, mi mem faros la komencon."

La kvin komercistoj, tre kontentaj, pliproksimiĝis unu al alia kaj igis la fremdulon sidiĝi en la mezo. La sklavoj replenigis la pokalojn, denove plenŝtopis la pipojn de siaj sinjoroj kaj alportis ardantajn karbojn por ekbruligi la tabakon. Dume refreŝigis Selim sian voĉon per plengorĝo da sorbedo, forpuŝis de la buŝo sian longan barbon, kaj ekparolis: "Aŭdu do la historion pri Kalifo Cikonio."

La Historio pri Kalifo Cikonio.

I.

Foje, en bela posttagmezo, sidis komforte sur sia kanapo Kalifo Ĥasid de Bagdado. Li estis iom dorminta, ĉar varmege estis tiutage, kaj nun, post la dormeto, li havis tre bonhumoran mienon. Li fumis per longa palisandra pipo, trinkis de tempo al tempo iom da kafo, kiun verŝis al li lia sklavoj, kaj ĉiufoje, kiam plaĉis al li la gusto de l' trinkaĵo, li kontente karesis al si la barbon. Unuvorte, la kalifo fartis videble tre bone. En ĉi tiu horo estis tre agrable interparoladi kun li, ĉar li estis tiam plej malsevera kaj afabla. Ĝuste tial vizitis lin ĉiutage ĉirkaŭ tiu horo lia grandveziro Mansor. Ankaŭ en ĉi tiu tago li venis; sed li havis, tute kontraŭ sia kutimo, tre enpeniĝan mienon. La kalifo eligis iom la pipon el la buŝo kaj diris: "Pro kio vi faras tiel mediteman vizaĝon, grandveziro?"

La grandveziro, kruciginte la brakojn sur la brusto, sin klinis antaŭ sia sinjoro kaj respondis: "Sinjoro, ĉu mi faras mediteman vizaĝon, mi ne scias: sed malsupre, antaŭ la palaco, staras kolportisto, kaj li havas tiel belajn vendotaĵojn ke mi ĉagreniĝas pro tio, ke mi ne havas provizon da superfluaĵoj moneroj."

La kalifo, kiu jam de longe volis fari al sia grandveziro ian amikaĵon, sendis malsupren sian nigran sklavon, por alvenigi la kolportiston. Post momento revenis la sklavo, kune kun la kolportisto. Ĉi tiu estis dika malaltkreskulo, nigrebrunvizaĝa kaj ĉifone vestita. Li portis keston, en kiu troviĝis ĉiuspecaj vendotaĵoj: perloj kaj ringoj, riĉe ornamitaj pistoloj, pokaloj kaj kombiloj. La kalifo kaj lia veziro esploris ĉion; fine, la kalifo aĉetis por si mem kaj por Mansor belajn pistolojn; por la edzino de l' veziro, kombilon. Kiam la kolportisto komencis refermi sian kofron, la kalifo ekvidis malgrandan tirkeston kaj demandis, ĉu ankaŭ tie troviĝas komercaĵoj. La kolportisto malfermis la tirkeston, kaj oni vidis en ĝi skatoleton plenan de nigreta pulvoro kaj paperfolion kun stranga skribaĵo kiun nek la kalifo nek Mansor povis legi.

"Mi ricevis ĉi tiujn ambaŭ objektojn de komercisto, kiu trovis ilin sur la strato en Mekka," diris la kolportisto. "Mi ne scias, kion ili enhavas. Por malalta prezo mi metas ilin je via dispono; al mi ili utilas nenion."

La kalifo, kiu amis havi en sia biblioteko antikvajn manuskriptojn, eĉ se li ne povis legi ilin, aĉetis la skribaĵon kaj la skatolon kaj forpermesis la kolportiston. Sed la kalifo pensis, ke li plezurege sciigu, kion la skribaĵo enhavas. Tial li demandis la veziron, ĉu li ne konas iun, kiu povas ĝin deĉifri.

"Favora mia estro!" respondis ĉi tiu; "apud la granda moskeo loĝas homo, kiun oni nomas Selim la Saĝa; tiu komprenas ĉiujn lingvojn; venigu lin; eble li konas la misterajn figuraĵojn."

Baldaŭ aperis la saĝa Selim.

"Selim," parolis al li la kalifo, "vi estas, laŭdire, tre saĝa; rigardu do ĉi tiun skribaĵon kaj sciigu min, ĉu vi povas ĝin legi. Se vi sukcesos ĝin legi, vi ricevos de mi novan festenan veston; sed se ne, vi ricevos dek-du survangojn kaj dudek-kvin plandobatojn, ĉar en tiu okazo oni malprave nomas vin Selim la Saĝa."

Selim sin klinis kaj diris: "Efektiviĝu via volo, sinjoro!"

Dum longa tempo li atente rigardis la skribaĵon, poste ekkriis subite: "Tio estas latinaĵo, sinjoro; oni pendigu min, se ĝi ne estas latinaĵo."

"Diru, kion ĝi enhavas," ordonis la kalifo, "se latinaĵo ĝi estas."

Selim tradukis: "Ho vi, kiu ajn trovos ĉi tion, laŭdu Allah'on pro lia favorkoreco! Kiu enflaros la pulvoron en ĉi tiu skatoleto kaj diros: *Mutabor*, tiu povos sin aliformigi en kiun ajn beston kaj komprenos la lingvon de la bestoj. Por reveni en sian homan figuron, li klinu sin trifoje orienten kaj rediru tiun saman vorton. Sed, post la

aliformiĝo, gardu vin, ke vi ne ridu; alie la sorĉvorto tute malaperos el via memoro, kaj vi restos besto."

Kiam Selim la Saĝa finis legi, pleniĝis de ĝojo la koro de l' kalifo. Li ordonis al la saĝulo ĵure promesi, ke li al neniuj malkovros la sekreton, donacis al li belan veston kaj foririgis lin. Kaj al sia grandveziro li diris: "Jen bonegan aĉeton ni faris, Mansor. Kiel ĝoje mi atendas la momenton, kiam mi fariĝos besto! Morgaŭ matene vi venu al mi. Poste ni iros kune sur la kamparon, enflaros iomete el mia skatoleto, kaj aŭskultos, kion oni paroladas en aero kaj sub akvo, en arbaro kaj sur kampo."

II.

En la sekvinta tago, Kalifo Ĥasid apenaŭ matenmanĝis kaj sin vestis, jam venis la grandveziro, por akompani lin, laŭ ordono, dum la promeno. La kalifo metis en sian zonon la skatoleton kun la magia pulvoro; kaj ordoninte al sia sekvantaro resti hejme, li ekvojiris kun la sola grandveziro. Ili iris en la komenco tra la vastaj ĝardenoj de l' kalifo; sed vane ili ĉirkaŭspionadis je io vivanta, por ekprovi la grandfaraĵon. Fine la veziro proponis, ke oni iru ĝis lageto, kie li ofte vidis multe da bestoj, precipe cikonioj, kiuj ĉiam kaptis lian atenton per sia blekado kaj grava sintenado.

La kalifo aprobis la proponon de sia veziro, kaj ili ambaŭ iris al la lageto. Alveninte, ili ekvidis cikunion, kiu gravmiene paŝadis tien kaj ĉi tien, serĉante ranojn kaj iom blekante de tempo al tempo. Sammomente ili ekvidis, tre alte en la aero, duan cikunion, alflugantan tiuregion.

"Mi vetas je mia barbo, nobla sinjoro," diris la grandveziro, "ĉi tiuj ambaŭ longakruruloj kondukas unu kun la alia belan interparoladon. Se ni do fariĝos cikonioj?"

"Bone dirita," respondis la kalifo. "Sed ni antaŭe pripensu, kiamaniere oni rehomiĝas. — Jen mi trovis: trifoje kliniĝinte orienten kaj dirinte *Mutabor*, tiel mi refariĝas kalifo, kaj vi veziro. Sed pro la ĉielo ne ridu, alie ni pereos."

Dirante tion, la kalifo rimarkis, ke la alia cikonio, fluganta super ilia kapo, proksimiĝas malrapide al la tero. Tuj li eltiris el la zono la skatoleton, enflaris forte, prezentis ĝin al la grandveziro, kiu ankaŭ enflaris, kaj ambaŭ kriis: *Mutabor!*

Malŝvelis al ili la kruroj kaj iĝis maldikaj kaj ruĝaj: la belaj flavaj pantofloj de l' kalifo kaj de lia kunulo fariĝis malbelformaj cikoniaj piedoj; la brakoj fariĝis flugiloj; la

kolo eliĝis el la ŝultroj kaj longiĝis unu ulnon; la barbo ne estis plu, kaj molaj plumoj kovris la korpon.

"Vere, vi havas tre belan bekon, grandvezira moŝto," parolis la kalifo, post longedaŭra mirego. "Per la barbo de l' Profeto, de kiam mi vivas, mi vidis nenion similan."

"Mi dankas plej humile," respondis la grandveziro, riverencante; "sed miaflanke, mi kuraĝas certigi vin, ke Via Alteco havas preskaŭ pli belan aspekton kiel cikonio, ol kiel kalifo. Sed, se plaĉas al vi, ni iru aŭskulti tiujn niajn samrasanojn, kaj ekscii, ĉu ni efektive povas paroli cikonie."

Intertempe, la alia cikonio atingis la teron. Ĝi purigis al si la piedojn per la beko, ordigis sian plumaron kaj ekproksimiĝis al la unua cikonio. La novaj cikonioj rapidiris antaŭen, kaj aŭdis, je sia granda miro, jenan interparoladon: —

"Bonan tagon, Sinjorino Longakrur'; jam tiel frue sur kampo?"

"Plej bonan dankon, kara Fraŭlino Blekbek'. Mi ĵus serĉis mian matenmanĝeton. Ĉu vi ne volas akcepti ranfemureton aŭ kvaroneton de lacerto?"

"Mi humile vin dankas; hodiaŭ mi absolute ne havas apetiton. Cetere mi venis sur la herbejon pro tute alia motivo. Mi devas danci hodiaŭ antaŭ la gastoj de mia patro; tial mi volas nun, private, ekzerci min iome."

Nun la cikoniino faris tra la kampo plej strangajn paŝojn. La kalifo kaj Mansor, mirigitaj, sekvis ŝin per la okuloj. Sed kiam ŝi stariĝis pentrinde sur unu piedo kaj samtempe svingadis gracie la flugilojn, ili ne plu povis sin deteni; elliberiĝis el iliaj bekoj nekontraŭstarebla ridado; kaj pasis longa tempo, antaŭ ol ili reakiris la memregadon. La kalifo unua ekregis sin. "Vere, tio estis ŝerco," ekkriis li, "kiu per oro ne estus pagebla. Domaĝe, ke la malsaĝaj bestoj lasis sin fortimiĝi per nia ridado; alie ili certe estus ankaŭ kantintaj!"

Sed nun al la grandveziro venis en la kapon, ke malpermesite estas ridi en la aliformiĝa stato. Li diris al la kalifo sian timon.

"Per Mekka kaj Medina! Malbona ŝerco estus, se mi devus resti cikonio. Penu do rememori la vortaĉon; al mi ĝi ne volas reveni.

"Trifoje ni devas kliniĝi orienten, dirante samtempe: Mu —, Mu —, Mu —."

Ili turnis sin orienten kaj seninterrompe kliniĝis, tiel ke iliaj bekoj preskaŭ tuŝis la teron. Sed, ho ve! Forfluginta estis la magia vorto; kiel ajn ofte la kalifo kliniĝadis, kaj

kiel ajn pasie lia veziro kunkriadis Mu —, Mu —, ĉiu memoro pri ĝi estis perdita; kaj la kompatinda kalifo kaj lia veziro estis kaj restis — cikonioj!

III.

Malĝojaj, la ensorĉitoj vagadis tra la kamparo. Ili tute ne sciis, kion fari en ĉi tiu malfeliĉo. El sia cikonio haŭto ili ne povis eliri; eĉ en la urbon ili ne povis reveni, por sin rekonigi; ĉar kiu kredus al cikonio, ke ĝi estas la kalifo? Kaj eĉ se oni kredus tion, ĉu la Bagdadanoj nomus kalifo cikonion?

Dum multe da tagoj ili ĉirkaŭvagadis, mizere nutrante sin per kampaj fruktoj, kiuj ne estis por ili facile manĝeblaj pro iliaj longaj bekoj. Cetere ili ne havis apetiton por lacertoj kaj ranoj, ĉar ili timis difekti al si la stomakon per tiaj frandaĵoj. Ilia sola plezuro en ĉi tiu malĝoja situacio estis tio, ke ili povas flugi; kaj ofte ili flugis sur la tegmentojn de Bagdado, por vidi, kio okazas en la urbo.

En la unuaj tagoj ili rimarkis grandan movadon kaj funebron sur la stratoj. Sed ĉirkaŭ la kvara tago post ilia ensorĉo, sidante sur la palaco de l' kalifo, ili ekvidis, malsupre sur la strato, belegan procesion. Eksonis tamburoj kaj fajfiloj. Homo en ruĝa orebrodita mantelo sidis sur multornamita ĉevalo; ĉirkaŭis lin brilaj servistoj. La duona Bagdado kuradis post li; kaj ĉiuj kriadis: "Vivu Mizra! Saluton al la estro de Bagdado!" Nun rigardis sin reciproke la du cikonioj sur la palaca tegmento, kaj Kalifo Ĥasid parolis:

"Ĉu vi jam ekkomprenas, kial mi estas ensorĉita, grandveziro? Tiu Mizra estas filo de mia ĝismorta malamiko, la potenca sorĉisto Kaŝnur, kiu, en malbona horo, ĵuris venĝon al mi. Tamen mi ankoraŭ ne perdis esperon. Venu, fidela partoprenanto de mia malfeliĉo; ni iru al la tombo de l' Profeto; eble en sankta loko la sorĉo malplenumiĝos."

Ili leviĝis de la tegmento de l' palaco kaj ekflugis laŭ la direkto de Medina.

Sed ne bone prosperis al ili la flugado, ĉar ambaŭ cikonioj ankoraŭ malmulte sin ekzercadis.

"Ho ve!" ekĝemis la grandveziro post kelke da horoj, "kun afabla permeso de via kalifa moŝto, baldaŭ finiĝos miaj fortoj; vi flugas ja multe tro rapide. Cetere, jam vesperiĝis, kaj ni farus bone, serĉante restadejon por la nokto."

Ĥasid aŭskultis favore la peton de sia servisto; kaj ĉar li ekvidis, malsupre en la valo, ruinon, kiu ŝajnis, kvazaŭ ĝi donus rifuĝejon, ili flugis tien. La loko, kie ili intencis pasigi ĉi tiun nokton, estis en pasinta tempo, laŭŝajne, kastelo. Belaj kolonoj elstaris el

la ruinoj. Kelkaj pli-malpli bone konservitaj ĉambroj atestis pri la iama belegeco de la domo. Ĥasid kaj lia akompananto ĉirkaŭiris tra la koridoroj, serĉante sekan loketon. Subite haltis cikonio Mansor.

"Granda sinjoro," li diris mallaŭte, "estas ja, mi scias, malsaĝe de la flanko de grandveziro, eĉ pli malsaĝe de la flanko de cikonio, timi fantomojn. Sed maltrankvilege estas al mi en la koro, ĉar tutproksime mi bone aŭdis plendsonojn kaj ĝemegojn."

Nun haltis ankaŭ la kalifo kaj klare ekaŭdis mallaŭtan ploradon, kiu pli kredeble apartenis al homo, ol al besto. Plena de espero, li volis direkti sin tien, el kie venis la plendaj sonoj; sed la veziro kaptis lin je laflugilo per la beko, kaj petegis lin, ke li ne ĵetu ilin en novajn nekonatajn danĝerojn. Sed vane! La kalifo, kiu havis brave batantan koron eĉ sub la cikoniaflugilo, elŝiris sin kun perdo de kelke da plumoj kaj rapidiris antaŭen en malluman koridoron. Li alvenis baldaŭ al pordo, kiu ŝajnis nur duone fermita kaj tra kiu li klare ekaŭdis ĝemetojn kaj iom da plorkriado. Li puŝe malfermis la pordon per la beko, sed, mirigita, ekhaltis sur la sojlo. En la ruiniĝinta ĉambro, kiun eta kradfenestro nesufiĉe lumigis, li ekvidis grandan striginon, sidantan sur la tero. Grandaj larmoj rulfluadis el ŝiaj rondaj okulegoj, kaj per raŭka voĉo ŝi elsonigis el la kurba beko siajn ĝemojn. Sed kiam ŝi ekvidis la kalifon kaj lian veziron, kiu intertempe ankaŭ eniris, tiam ŝi eligis laŭtan ĝojkriadon. Gracie, per la brunemakulitaflugilo, ŝi elviŝis el la okuloj la larmojn; kaj, je la granda miro de l' du ĉeestantoj, ŝi ekkriis en bona, homa lingvo araba:

"Ho cikonioj, estu bonvenaj! Vi estas por mi bona antaŭsigno de mia saviĝo; ĉar estas al mi antaŭdirite, ke per cikonioj venos al mi granda feliĉo."

Rekonsciiĝinte de sia mirego, la kalifo faris riverencon per sia longa kolo, gracie aranĝis siajn maldikajn krurojn, kaj diris:

"Strigino! Juĝante laŭ viaj vortoj, mi devas vin kredi mia kunsuferantino. Sed ho ve! Via espero, ke per ni venos via savo, estas vana. Vi mem konfesos nian senpovecon, kiam vi aŭdos nian historion."

La strigino petis lin rakonti, kaj la kalifo rakontis, kion ni jam scias.

IV.

Kiam la kalifo finis sian historion, la strigino dankis lin kaj diris:

"Aŭdu ankaŭ mian historion kaj sciigu, ke mi estas ne malpli malfeliĉa, ol vi. Mia patro estas la Reĝo de Hindujo; mi, lia malfeliĉa solfilino, nomiĝas Lusa. Tiu sorĉisto

Kaŝnur, kiu ensorĉis vin, ĵetis ankaŭ min en la malfeliĉon. Unu tagon li venis al mia patro kaj petis pri mia mano por sia filo Mizra. Sed mia patro, homo ekkolerema, ordonis malsuprenĵeti lin de la ŝtuparo. Tamen prosperis al la malnoblulo sub alia formo denove alŝteliri proksime al mi. Foje, kiam mi volis trinki en mia ĝardeno ion refreŝigan, li alportis al mi, sin alivestinte kiel sklavo, trinkaĵon, kiu ŝanĝis min en ĉi tiun abomenan figuron. Svenintan pro teruro, li portis min ĉi tien, kaj kriegis en miajn orelojn, per terura voĉo: 'Ĉi tie vi restu, malbelega, eĉ de la bestoj malestimata, ĝis via morto, aŭ ĝis iu deziros propravole edziĝi kun vi eĉ en ĉi tiu monstra formo. Tiel mi venĝas min al vi kaj al via malhumila patro.' De tiu tempo forpasis multe da monatoj. Sola kaj malĝoja, mi vivas kiel ermitino en ĉi tiu ruino, abomenata de la mondo kaj eĉ de la bestoj. La bela naturo estas fermita por mia rigardo; ĉar tage mi estas blinda, kaj nur kiam la luno superŝutas per sia pala lumo ĉi tiujn murojn, defalas de miaj okuloj la vualo."

La strigino ĉesis paroli, kaj denove forviŝis per la flugilo la larmojn, kiujn eltiris la rakontado pri ŝia doloro.

La kalifo estis, dum la rakontado de l' reĝidino, profundiĝinta en medito.

"Se mi ne tute eraras," diris li, "estas sekreta rilato inter via malfeliĉo kaj mia. Sed kie mi trovos la solvon de ĉi tiu enigmo?"

La strigino respondis: "Ho sinjoro, mi havas la saman antaŭsenton, kiel vi; ĉar foje, en mia plej juna aĝo, antaŭdiris al mi saĝa virino, ke cikonio alportos al mi grandan feliĉon. Eble mi scias ankaŭ, kiel ni povos nin savi."

La kalifo, tre mirigita, demandis, pri kia savrimedo ŝi pensas.

"La sorĉisto, kiu nin ambaŭ malfeliĉigis," diris ŝi, "venas ĉiumonate unu fojon en ĉi tiun ruinion. Ne malproksime de ĉi tiu ĉambro estas salono. Tie li havas la kutimon festenadi kun multaj siaj similuloj. Multfoje mi jam subaŭskultis ilin tie. Tiahore ili rakontas unuj al aliaj siajn hontindajn faraĵojn. Eble li tiam elparolos la sorĉvorton, kiun vi forgesis."

"Kara mia reĝidino," ekkriis la kalifo, "parolu! Kiam li venos? Kie estas la ĉambrego?"

La strigino momenton silentis; poste ŝi parolis: "Ne malplaĉu al vi mia peto! Nur laŭ unu kondiĉo mi povos plenumi vian deziron."

"Parolu, parolu!" kriis Ĥasid. "Ordonu! Ĉian kondiĉon mi akceptos."

"Mi do tre dezirus esti samtempe libera, kiel vi; sed tio povos fariĝi, nur se unu el vi donos al mi sian manon."

La propono ŝajnis iom konsterni la cikoniojn; kaj la kalifo faris signon al sia servisto, ke li eliru kun li por unu momento.

"Grandveziro," diris la kalifo, kiam ili staris aliflanke de l' pordo, "tio estas sensenca negoco; sed vi — vi ja povas bone ŝin preni."

"Kion vi diras!" respondis la alia; "por ke mia edzino elgratu al mi la okulojn, kiam mi revenos hejmen? Krom tio, mi estas jam grandaĝulo, kaj vi, kontraŭe, ankoraŭ juna kaj fraŭla; vi do povus pli konvene doni la manon al juna kaj bela reĝidino."

"Ĝuste jen estas!" ekĝemis la kalifo, melankolie mallevante la flugilojn. "De kie vi scias, ke ŝi estas juna kaj bela? Jen kion mi nomas: 'Aĉeti katon en fermita sako!'"

Dum longa tempo ili penadis por influi unu la alian. Sed fine konvinkiĝinte, ke lia veziro preferus resti cikonio, ol edziĝi kun la strigino, la kalifo mem decidiĝis plenumi la kondiĉon. Granda estis la ĝojo de l' strigino. Ŝi konfesis, ke ili ne povus veni en pli oportuna tempo, ĉar jam en ĉi tiu nokto verŝajne kunvenos la sorĉistoj.

Kune kun la cikonioj ŝi forlasis la ĉambron, por konduki ilin en la salonon. Ili iris longatempe tra malluma koridoro. Fine, renkonte al ili, tra duone ruiniĝinta muro, elradiis hela lumo. Kiam ili tie alvenis, la strigino konsilis al ili sin teni absolute senbrue. Tra la truo, antaŭ kiu ili staris, ili povis superrigardi grandan salonon. Ĝi estis ĉirkaŭita de kolonoj kaj belege ornamita. Multe da koloraj lampoj anstataŭis la tagan lumon. En la mezo de l' ĉambrego staris ronda tablo, ŝarĝita per multaj elektitaj manĝaĵoj. Ĉirkaŭ la tablo etendiĝis kanapo, sur kiu sidis ok viroj. En unu el tiuj ĉi la cikonioj rekonis la kolportiston, kiu vendis al ili la sorĉpulvoron. Lia najbaro petis lin, ke li rakontu siajn plej novajn faraĵojn. Li do rakontis interalie la historion pri la kalifo kaj lia veziro.

"Kaj kian vorton vi donis al ili?" demandis lin alia sorĉisto.

"Tre malfacilan latinan vorton: *Mutabor*."

V.

Aŭdinte tion ĉe sia murtruo, la cikonioj preskaŭ senkonsciiĝis de ĝojo. Ili kuris tiel rapide per siaj longaj kruroj al la pordego de l' ruino, ke la strigino apenaŭ povis ilin sekvi. Tie diris la kalifo, kortuŝita, al la strigino:

"Savintino de mia vivo kaj de la vivo de mia amiko, akceptu min kiel vian edzon, en eterna dankemo pro tio, kion vi faris por ni."

Poste li turnis sin orienten. Trifoje la cikonioj klinis siajn longajn kolojn al la suno, kiu ĵus leviĝis malantaŭ la montoj; *Mutabor*, ili kriis; kaj en la sama momento ili estis reŝanĝitaj. Ĝojegante pro la retrovita vivo, ĉirkaŭprenis sin reciproke sinjoro kaj servisto, kun rido kaj ploro. Sed kiel priskribi ilian miregon, kiam ili rigardis ĉirkaŭen? Bela sinjorino, brilege vestita, staris antaŭ ili. Ridetante, ŝi donis al la kalifo la manon. "Ĉu vi ne rekonas plu vian striginon?" ŝi diris. Estis ŝi! Tiagrade ĉarmis la kalifon ŝiaj beleco kaj gracieco, ke li ekkriis: estas lia plej granda feliĉo, ke li fariĝis cikonio.

Nun ili ĉiuj ekvojaĝis kune Bagdadon. La kalifo trovis en siaj vestoj ne sole la skatoleton kun la magia pulvoro, sed ankaŭ sian monujon. Li do aĉetis en la plej proksima vilaĝo ĉion, kion ili bezonis por la vojaĝo; kaj baldaŭ ili atingis la pordegojn de Bagdado. La alveno de l' kalifo elvekis tie grandan miron. Oni estis proklaminta lin mortinta; tial multe ĝojis la popolo, rehavante sian amatan estron.

Sed des pli forte ekbrulis ilia malamo al la trompisto Mizra. Ili are eniris en la palacon, kaj kaptis la maljunan sorĉiston kaj lian filon. La maljunulon forsendis la kalifo en la saman ruinan ĉambron, kie loĝis iam la reĝidino, kiel strigino, kaj tie li ordonis pendigi lin. Sed al la filo, kiu nenion komprenis pri la artifiko de la patro, la kalifo permesis elekti, ĉu li volas morti aŭ enflari. Kiam li elektis tion ĉi lastan, la grandveziro prezentis al li la skatoleton. Unu fortan enflaron; kaj la magi plena vorto de l' kalifo aliformigis lin cikonio. La kalifo ordonis enfermi lin en fera kaĝo, kiun oni starigis en la ĝardeno de l' palaco.

Longe kaj feliĉe vivis Kalifo Ĥasid kun sia edzino, la reĝidino. Liaj plej feliĉaj horoj estis ĉiam tiuj, en kiuj la grandveziro, posttagmeze, vizitis lin. Tiam ili paroladis ofte pri la cikonio-aventuro; kaj se la kalifo estis pli ol kutime gajhumora, li bonvole konsentis imiti la grandveziron, montrante kian mienon li havis kiel cikonio. Serioze, per tre rektigitaj kruroj, li marŝadis tra la ĉambro, blekadis, svingadis la brakojn, kvazaŭ ili estus flugiloj, kaj montris, kiel la grandveziro vane sin klinis orienten kaj kriis, "Mu —, Mu —." Al Sinjorino Kalifedzino kaj ŝiaj infanoj ĉi tiu prezentado faris ĉiuforte grandan plezuron; sed se la kalifo ne volis ĉesi blekadi kaj kliniĝadi kaj kriadi, "Mu —, Mu —," la veziro, ridetante, minacis sciigi al Sinjorino Kalifedzino, kion oni pridiskutadis ĉe la pordo de Reĝidino Strigino.

Kiam Selim Baruh finis sian rakonton, la komercistoj esprimis grandan kontentiĝon pri lia historio. "Efektive, forpasis nerimarkite la tuta posttagmezo," diris unu el ili, disŝovante la kovrilon de la tendo. "Malvarmete blovas la vespera vento; ni do povus

bone daŭrigi nian vojaĝon." Liaj kunvojaĝantoj konsentis; oni kunmetis la tendojn, kaj la karavano reekiris en sia kutima marŝordo.

Preskaŭ la tutan nokton ili rajdis antaŭen; ĉar brulvarmege estis dum la tago, sed la stelplenaj noktoj estis tre refreŝigaj. Fine ili alvenis al oportuna restadejo, starigis la tendojn, kaj kuŝiĝis dormi. Pri la fremdulo la komercistoj zorgis kvazaŭ pri sia plej honorinda gasto. Unu donis al li kusenojn, alia kovrilojn, tria sklavojn; unuvorte, en ĉiuj rilatoj oni servis lin, kvazaŭ li estus hejme. Jam komenciĝis la plej varmegaj horoj de l' tago, kiam ili ree leviĝis; kaj unuanime ili decidis resti ĉi tie ĝis la vespero. Post komuna tagmanĝo, ili denove pliproksimiĝis unu al alia; kaj la juna komercisto sin turnis al la plej aĝa kaj diris:

"Selim Baruh agrabligis por ni la hieraŭan posttagmezon; nu, Aĥmet, ĉu ankaŭ vi rakontus al ni ion, aŭ okazintaĵon el via longa vivo, kiu sendube estas riĉa je aventuroj, aŭ iun belan fabelon?"

Aĥmet silentis dum kelka tempo, kvazaŭ sendecida, ĉu li diros tion aŭ alion; fine li parolis:

"Karaj amikoj! Fidelaj kamaradoj vi montris vin dum ĉi tiu vojaĝo, kaj ankaŭ Selim meritas mian konfidon. Propran travivitaĵon mi do sciigos al vi, — ion, pri kio, en aliaj cirkonstancoj, mi nevolonte parolus, kaj kion mi tre malofte rakontis."

La Historio pri la Fantomŝipo.

Mia patro havis malgrandan butikon en Balsoro. Li estis nek malriĉa nek riĉa, — unu el tiuj homoj, kiuj nevolonte ion riskas, timante perdi la malmulton, kiun ili havas. Li edukis min simple kaj virte, tiel ke, post nelonga tempo, mi povis esti al li utila. Kiam mi ĵus fariĝis dekokjara kaj li faris sian unuan gravan spekulacion, li mortis, kredeble de ĉagreno pro tio, ke li lasis mil ormonerojn al la gardo de la maro. Post nelonge mi havis kaŭzon juĝi lin feliĉa pro lia morto; ĉar kiam pasis malmulte da semajnoj, mi eksciis, ke la ŝipo, al kiu li komisiis siajn komercaĵojn, alprofundiĝis. Sed ĉi tiu malfeliĉo ne povis malvarmigi mian kuraĝon de junulo. Ŝanĝinte en monon ĉion, kion postlasis mia patro, mi ekforiris, por provi en fremdlando la fortunon. Akompanis min nur unu maljuna servisto de mia patro; longjare korinklina al nia familio, li ankaŭ nun ne volis disiĝi de mi, nek de mia sorto.

Favoris nin la vento, kiam ni enŝipiĝis en la haveno de Balsoro. La ŝipo, sur kiun mi dungigis min, destiniĝis al Hindujo. Jam de dek kvin tagoj ni veturis sur la kutima vojo, kiam la ŝipestro al ni antaŭanoncis ventegon. Lia vizaĝo malkaŝis lian

maltrankvilecon: ŝajnis, ke li ne sufiĉe konis la tieajn marvojojn, por povi senzorge renkonti ventegon. Li ordonis faldi ĉiujn velojn, kaj tre malrapide ni veturis antaŭen. Venis la nokto, hela kaj malvarma: la ŝipestro do kredis, ke li trompiĝis pri la signoj de l' ventego. Subite, tutproksime al la nia, preterveturis ŝipo, kiun ni ne vidis antaŭe. Sovaĝa ĝojkriado elsonis al ni de ĝia ferdeko, — pro kio mi multe miris en tia maltrankviliga antaŭventega horo. La ŝipestro, kiu staris ĉe mia flanko, fariĝis morte pala.

"Mia ŝipo estas perdita," li kriis; "jen veturas la Morto!"

Antaŭ ol mi povis lin demandi pri la signifo de tiu stranga ekkrio, alkuregis la maristoj, kriegante, ploregante.

"Ĉu vi ĝin vidis?" ili kriis. "Ve! ve! sonis nun nia lasta horo!"

La ŝipestro ordonis voĉe legi konsolajn sentencojn el la Korano, kaj li mem prenis la direktilon. Sed vane! Videble plifortiĝis la ventego; kaj antaŭ ol forpasis eĉ unu horo, surteriĝis la ŝipo kun granda krakego. Oni surakvigis la boatojn; kaj apenaŭ la lastaj maristoj sin savis, jam alfundiris antaŭ niaj okuloj la ŝipo; kaj mi, senhava mizerulo, forveturis sur la maro. Sed niaj ĉagrenoj ankoraŭ ne finiĝis. Ĉiam pli terure furiozis la ventego, kaj ne plu estis eble, direkti la boaton. Mian maljunan serviston mi forte ĉirkaŭprenis, kaj nun ni ĵure promesis, ke ni neniam forlasos unu la alian. Fine revenis la tago. Sed ĉe la unua apero de l' matena ruĝo kaptis la vento la boaton, en kiu ni sidis, kaj renversis. Neniam mi revidis iun el miaj kunŝipanoj. Mi estis senkonsciigita de l' falego. Revekiĝinte, mi min trovis en la brakoj de mia fidela servisto, kiu jam sin savis sur la renversitan boaton kaj suprentiris min post si. Ne blovis plu la ventego. Nenie estis videbla nia ŝipo. Sed ne malproksime ni ja ekvidis alian, al kiu alportadis nin la ondoj. Pliproksimiĝinte, mi rekonis ĝin kiel tiun saman, kiu nokte nin preterveturis kaj tiel forte timigis la ŝipestron. Al mi inspiris tiu ŝipo strangan teruron. Teruris min la tiel timege efektiviĝinta diro de l' ŝipestro; teruris min ankaŭ la dezertega aspekto de l' ŝipo, sur kiu neniun montriĝis, indiferece kiom ajn ni alproksimiĝis, kiom ajn ni kriegis. Tamen por ni ĝi estis la sola savrimedo; tial ni alte gloris la Profeton, kiu tiel mirakle gardis nian vivon.

De la antaŭa parto de l' ŝipo pendis longa ŝnurego, al kiu ni remis mane kaj piede, celante ĝin kapti. Fine ni sukcesis tion fari. Mi eligis laŭtan krion, sed seninterrompe daŭris sur la ŝipo la silento. Nun ni suprenrampis per la ŝnurego, mi, la pli juna, antaŭe. Sed, ho teruro! Kia sceno sin prezentis al mia rigardo, kiam mi ekpaŝis sur la ferdekon! Sango ruĝigis la plankon. Dudekelke da kadavroj en turkaj vestoj kuŝis ĉirkaŭe. Ĉe la meza masto staris homo, riĉe vestita, kun sabro en la mano; sed lia vizaĝo estis pala kaj distordita, kaj tra lia frunto iris granda najlo, lin senmoviginta je l' masto: ankaŭ li estis senviva. Teruro malakcelis miajn paŝojn; apenaŭ mi kuraĝis

spiri. Nun suprenvenis ankaŭ mia kunulo. Tiun ĉi miregigis, same kiel min, la aspekto de la ferdeko, sur kiu vidiĝis nenio vivanta, nenio krom tiuj timegigaj kadavroj. Fine, dirinte preĝon al la Profeto, ni kuraĝis iri antaŭen. Ĉe ĉiu paŝo ni rigardis ĉirkaŭen pro timo, ke io nova ne sin montru, io eĉ pli terurega. Sed ĉio restis neŝanĝita. Longe kaj larĝe nenio vivanta, — nur ni kaj la senlima oceano. Ni eĉ ne kuraĝis laŭte paroli timante, ke la senviva, alpikita al la masto, kapitano ne turnu al ni siajn rigidajn okulojn, aŭ ke iu el la mortigitoj ne ekmovu sian kapon. Fine ni atingis ŝtuparon, kondukantan en la ŝipan internon. Tie ni nevole ekhaltis kaj rigardis unu la alian, ĉar neniŭ el ni kuraĝis esprimi siajn pensojn.

"Sinjoro," parolis mia fidela servisto, "teruraĵo okazis ĉi tie. Tamen, eĉ se, tie malsupre, la ŝipo estas plena de mortigitoj, mi plivolas kapitulaci al ili senkondiĉe, ol resti pli longe kun tiuj senvivuloj."

Mi same pensis, kiel li; kaj, plikuraĝiĝinte, ni iris, time-scivolaj, malsupren. Sed ankaŭ ĉi tie regis tomba silento kaj sole niaj paŝoj faris eĥon sur la ŝtuparo. Ni staris ĉe la sojlo de l' kajuto. Metinte porden mian orelon, mi aŭskultis: nenio aŭdebla! Mi malfermis. La ĉambro prezentis ĥaosan aspekton. Vestaĵoj, armiloj kaj alia ilaro ĉirkaŭkuŝis intermiksite. Nenio en ordo. La ŝipanaro, aŭ almenaŭ ĝia estro, kredeble estis ĵus drinkinta, ĉar ĉio ankoraŭ kuŝis ĉirkaŭe. Ni iris antaŭen de ĉambro al ĉambro, de apartamento al apartamento. Ĉie ni trovis luksajn provizojn da silko, perloj, sukero, kaj alio diversa. Ĝojegigis min supermezure ĉi tiu vidaĵo, ĉar konsiderante, ke estas neniŭ sur la ŝipo, mi opiniis min rajtigita, ĉion ĉi proprigi al mi. Sed Ibrahimio atentigis min, ke ni verŝajne estas ankoraŭ tre malproksime de l' marbordo, kiun ni ne povas atingi solaj kaj sen homa kunhelpo.

Ni refreŝigis nin per la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kiujn ni trovis en tia superfluo, kaj fine ni resupreniris sur la ferdekon. Sed ĉi tie sentigis al ni senfinan teruron la vido de la abomenaj kadavroj. Por liberigi nin de ili, ni do decidis, ilin ĵeti en la maron. Sed kia timego ekkaptis nin, kiam ni trovis, ke neniŭ el ili estas delokigebla! Kvazaŭ enradikitaj, ili kuŝis sur la planko; por forigi ilin, necese estus eltiri la tabulojn de l' ferdeko, sed por tio mankis al ni ĉiuj iloj. Neeble estis ankaŭ, disigi de lia masto la kapitanon; el lia mano rigida ni eĉ ne povis fortiregi lian sabron. En malĝoja meditado pri nia situacio ni pasigis ĉi tiun tagon. Je la noktigo mi permesis al Ibrahimio kuŝiĝi por dormi: mi mem volis resti garde sur la ferdeko, por elrigardi je savo. Tamen, kiam leviĝis la luno, kaj mi kalkulis laŭ la steloj, ke estas la dekunua horo, ekregis min tiel nekontraŭstarebla dormemo, ke, kontraŭvole, mi kuŝiĝis malantaŭ barelo, kiu staris sur la ferdeko. Sed estis plivere duonsveno ol dormo, ĉar mi bone aŭdis la maron frapadi la flankon de l' ŝipo kaj la velojn knaradi kaj fajfadi en la vento. Subite mi kredis aŭdi voĉojn kaj piedsonojn sur la ferdeko. Mi volis leviĝi, por rigardi tiuflanken, sed nevidebla potenco tenis enkatinitaj miajn membrojn; mi eĉ ne povis malfermi la okulojn. La voĉoj fariĝis ĉiam pli klaraj; ŝajnis al mi, kvazaŭ gaja

ŝipanaro kuradas tien kaj reen sur la ferdeko. Interalie mi kredis aŭdi la fortan voĉon de iu ordonanta; mi ankaŭ klare aŭdis, kiel ŝnuregoj kaj veloj supren-malsuprentiriĝas. Sed iom post iom mi senkonsciiĝis kaj pliprofondiĝis en dormo, en kiu mi kredis aŭdi nur bruadon de armiloj, kaj nur tiam vekiĝis, kiam la suno jam alte staris kaj brulradiis sur mian vizaĝon. Mirigita, mi ĉirkaŭrigardis. Ventego, ŝipo, mortintoj, — ĉio, kion mi aŭdis dum la nokto, ŝajnis al mi kvazaŭ sonĝo; sed kiam mi suprenrigardis, mi ĉion trovis kiel hieraŭ. Senmove kuŝis la mortintoj; senmove la kapitano estis alfiksita al la masto. Ridante pri mia sonĝo, mi leviĝis, por serĉi mian maljunan serviston. Tiu ĉi sidis en la kajuto kaj profunde meditis.

"Ho sinjoro!" ekkriis li, kiam mi eniris, "mi preferus kuŝi sur la plejprofundejoj de l' maro, ol pasigi ankoraŭ unu nokton en tiu ĉi ensorĉita ŝipo."

Mi demandis lin pri la kaŭzo de lia maltrankvileco, kaj li respondis:

"Post kelkhora dormado mi vekiĝis kaj ekaŭdis, kiel oni kuradas tien kaj ĉi tien super mia kapo. Unue mi kredis, ke estas vi; sed estis almenaŭ dudek, kiuj tie ĉirkaŭkuradis; mi aŭdis ankaŭ vokadon kaj kriadon. Fine malsuprenvenis la ŝtuparon pezaj paŝoj. Forlasis min nun plene la konscio. Nur de tempo al tempo mi rekonsciiĝis, kaj tiam mi vidis tiun saman homon, kiu estas najlita al la masto tie supre, sidantan kantante kaj trinkante ĉe tiu ĉi tablo; kaj tiu skarlate-vestito, kiu kuŝas ne malproksime de li sur la ferdeko, sidis kuntrinkante ĉe lia flanko."

Tiel rakontis mia maljuna servisto. Mi sentis min absolute ne bone, pri tio mi povas certigi vin. Tio do ne estis iluzio: mi ankaŭ ja estis bone aŭdinta la mortintojn. Ŝipveturi en tia societo, tio estis al mi plejaltgrade terura. Dume mia Ibrahim profundiĝis en medito. "Jen mi trovis!" ekkriis li fine. Venis al li en la kapon sentenco, kiun lernigis al li iam lia avo, sperta kaj multvojaĝinta homo; ĝi povus efiki kontraŭ ĉiuspecaj fantomoj kaj sorĉaĵoj. Li certigis ankaŭ, ke tiu dormemo, kiu nin ekposedis, estos en la venonta nokto facile malhelpebla, se ni senlace ripetos preĝsentencojn el la Korano. La propono de l' maljunulo tre plaĉis al mi. Maltrankvilanime ni vidis veni la nokton. Apud la kajuto estis ĉambreto, en kiun ni decidis retiriĝi. Ni traboris tra la pordo kelkajn truojn, sufiĉe grandajn por superrigardi tra ili la tutan kajuton. Poste ni firmfermis laŭ eblo la pordon de interne; kaj Ibrahim surskribis en ĉiuj kvar anguloj la nomon de l' Profeto. Tion farinte, ni atendis la teruraĵojn de l' nokto.

Denove estis, mi kredas, la dekunua horo proksimume, kiam mi forte ekdormemiĝis. Mia kunulo tial konsilis al mi preĝdiri kelke da Koransentencoj; kaj vere tio kontraŭefikis. Subite fariĝis supre granda movado. Knaris la ŝnuregoj; piedaj paŝoj sonis sur la ferdeko; kaj kelkaj voĉoj estis klare aŭdeblaj. Dum kelkaj minutoj ni sidis tie, korpremate atendente. Fine ni ekaŭdis iun malsuprenveni la ŝtuparon de l' kajuto.

Tion aŭdante, la maljunulo komencis eldiri la sentencon, kiun lernigis al li lia avo kontraŭ fantomoj kaj sorĉaĵoj:

"Ĉu vi el aero venis,
Aŭ en tomb' malluma dormis,
Aŭ vin mara fundo tenis,
Aŭ infera fajr' vin formis,—
Granda Allaho ordonas al vi:
Ĉiuj fantomoj obeas al li."

Mi devas konfesi, ke mi ne multe kredis je ĉi tiu sentenco, kaj stariĝis al mi la haroj sur la kapo, kiam la pordo malfermegiĝis. Envenis tiu granda majesta viro, kiun mi vidis najlitan al la masto. La najlo ankoraŭ traestis lian cerbon, sed li jam reeningigis sian glavon. Post li envenis alia malpli riĉe vestita, kiun mi ankaŭ vidis supre kuŝantan. La kapitano, — estis ja klarerekoneble li, — havis palan vizaĝon, grandan nigran barbon, kaj sovaĝe ruliĝantajn okulojn, per kiuj li ĉirkaŭrigardis la tutan ĉambron. Dum li preteriris nian pordon, mi povis lin vidi tre klare; li, siaflanke, ŝajnis tute ne rigardi al la kaŝanta nin pordo. Ili ambaŭ sidiĝis ĉe la tablo, kiu staris en la mezo de l' kajuto, kaj laŭte, preskaŭ kriante interparoladis en nekonata lingvo. Ili pli kaj pli laŭtiĝis kaj koleriĝis; fine ekfrapis la kapitano la tablon per pugnigita mano, ekstremitante la tutan ĉambron. Sovaaĝe ridante, la alia salte leviĝis kaj faris signon al la kapitano, ke li sekvu lin. Tiu ĉi sin levis, eltiregis sian sabron el la ingo, kaj ambaŭ forlasis la ĉambron. Ni spiris pli libere, kiam ili estis for; sed nia timo ankoraŭ neniel finiĝis. Sur la ferdeko fariĝis ĉiam pli kaj pli laŭte. Aŭdiĝis rapida kurado, ridado, kriegado. Fine eksplodis tumulto vere infera: armiltintegado kaj kriado; ni kredis, ke malleviĝas sur nin eĉ la ferdeko, kune kun la tuta velaro: subite — profunda silento! Post multe da horoj, kuraĝinte resupreniri, ni trovis ĉion en antaŭa stato; alie ol antaŭe kuŝis eĉ ne unu; ĉiuj estis rigidaj kiel ligno.

Ni tiel pasigis sur la ŝipo multe da tagoj. Ĝi veturadis ĉiam orienten, kie, laŭ mia kalkulo, sendube kuŝis la tero. Sed, eĉ se ĝi transiris multe da mejloj dum la tago, nokte ĝi ŝajnis ĉiam veturi returnen; ĉar, kiam la suno leviĝis, ni ĉiufoje retroviĝis sur la sama loko. Ĉi tion ni ne povis klarigi al ni alimaniere, ol supozante, ke la mortintoj ĉiunokte veturis plenvele returnen. Por tion malebligi, ni ferlis antaŭnoktiĝe ĉiujn velojn kaj uzis tiun saman rimedon, kiun ni jam antaŭe provis ĉe la pordo en la kajuto: ni skribis sur pergamenon la nomon de l' Profeto kune kun la sentenco de la avo, kaj ĉirkaŭligis per tio la ferlitajn velojn. Maltrankvilanime ni atendis en nia ĉambreto la sekvon. Ĉi tiun fojon la fantomoj ŝajnis eĉ pli terure furiozi, ol antaŭe; sed jen, la sekvintan matenon, kunvolvita estis la veloj, tute kiel ni ilin lasis. Ni streĉis dum la tago nur tiom da veloj, kiom ni bezonis, por peleti la ŝipon antaŭen; kaj tiamaniere ni transiris en kvin tagoj spacon sufiĉe grandan.

Fine, la sesan tagon matene, ni ekvidis, en malgranda interspaco, la teron, kaj ni dankis Allah'on kaj lian Profeton pro nia mirinda savo. Dum tiu tago kaj la sekvinta ĝin nokto ni veturadis laŭlonge de l' marbordo, kaj la sepan matenon ni kredis ekvidi urbon, nemalproksime kuŝantan. Kun granda peno ni ĵetis ankron, kiu tuj enfundiĝis; poste, surakviginte malgrandan boaton, kiu staris sur la ferdeko, ni remis per ĉiuj fortoj al la urbo. Post duonhoro, enirinte riveron kiu enfluis tie en la maron, ni surbordiĝis. Ĉe la urba pordego ni informiĝis pri la nomo de la urbo kaj sciiĝis, ke ĝi estas Hinda urbo, kuŝanta ne malproksime de la sama regiono, kien mi intencis marveturi en la komenco. Ni eniris en karavanejon, kie ni refreŝigis nin post nia aventurplena vojaĝo. Mi ankaŭ serĉis tie saĝan kaj prudentan homon, sciigante al la mastro, ke mi tian bezonas, kiu ion komprenas pri la sorĉarto. Li kondukis min en malmulteuzatan flankstraton ĝis senpretenda domo, kies pordon li frapis, kaj oni lasis min eniri, dirante, ke mi demandu pri Mulej.

En la domo venis renkonte al mi maljuna vireto, kun griza barbo kaj longa nazo, kaj demandis, kion mi deziras. Mi diris al li, ke mi serĉas la saĝan Mulej'on, kaj li respondis al mi, ke tio estas li mem. Mi petis de li konsilon, kion fari je la mortintoj, kaj kion ekaranĝi por forigi ilin el la ŝipo. Li respondis, ke la ŝipanaro estas verŝajne, pro iu krimo, sorĉetenita surmare; la sorĉo, diris li, kredeble malefektiviĝos, se oni alportos ilin teren, sed tio povos nur fariĝi, se oni forigos la tabulojn, sur kiuj ili kuŝas. Al mi, li kredis, apartenas ĉiarajte la ŝipo, kune kun ĝia tuta ŝarĝo, tial ke mi kvazaŭ ĝin trovis; tamen mi nepre prisilentu la tutan aferon kaj faru al li el mia superfluo malgrandan donacon, redone de kiu li, per siaj sklavoj, helpas min forigi la mortintojn. Mi promesis, ke mi riĉe rekompencos lin, kaj ni ekvojiris kun kvin sklavoj, kiuj estis provizitaj per segiloj kaj hakiloj. Survoje la sorĉisto Mulej ne ĉesis laŭdi nian feliĉan ideon ĉirkaŭvolvi la velojn per sentencoj de l' Korano. Li diris, ke tio estis nia sola savrimedo.

Estis ankoraŭ iom frue en la tago, kiam ni alvenis la ŝipon. Ni tiuj komencis labori, kaj kvar el la mortintoj kuŝis jam post unu horo en la barketo. Kelkaj el la sklavoj, por entombigi ilin, devis remtransporti ilin al la tero. Reveninte, ili rakontis, ke la mortintoj evitigis al ili la penon de enterigo per tio, ke ili disfalis en polvon, tuj kiam oni kuŝigis ilin teren. Ni daŭrigis desegi la mortintojn, kaj jam antaŭvespere ĉiuj estis alportitaj al la tero. Fine estis plu neniu surŝipe krom tiu, kiu estis najlita al la masto. Vane ni penis eltiri la najlon el la ligno; nenia potenco povis ekmovi ĝin eĉ je unu hareto. Mi ne sciis, kion ekfari: ni ja ne povis dehaki la maston por transportigi lin teren. Tamen de ĉi tiu embaraso liberigis nin Mulej. Li ordonis al sklavo, rapide remi marborden, por alporti poton da tero. Ricevinte ĉi tion, la sorĉisto elparolis super ĝi misterplenajn vortojn kaj supersutis per la tero la kapon de l' mortinto. En la sama momento tiu ĉi malfermis la okulojn kaj profunde enspiris, kaj la vundo de la najlo en

lia frunto eksangis. Facile nun ni eltiris la najlon, kaj la vundito falis en la brakojn de unu el la sklavoj.

"Kiu kondukis min ĉi tien?" parolis li, laŭŝajne reakirinte kelkgrade la fortojn.

Mulej montris min per la fingro. Mi alproksimiĝis.

"Dankon al vi, fremdlanda nekonato! Vi savis min el longedaŭraj turmentoj. Jam de kvindek jaroj mia korpo ŝipveturadas tra ĉi tiuj ondoj, kaj mia animo estis kondamnita ĉiunokte reeniri en ĝin. Sed nun fine mia kapo ektuŝis la teron, kaj mi povas iri, repaciĝinte, al miaj prauloj."

Mi petis lin rakonti al ni, kiel kaptis lin ĉi tiu terura stato, kaj li parolis:

"Antaŭ kvindek jaroj mi estis respektata potenculo kaj loĝis en Alĝero. Sed avareco puŝis min ekipi ŝipon kaj min doni al la marrabado. Foje, daŭriginte jam de kelka tempo ĉi tiun fikomercon, mi enŝipigis en Zante'o derviŝon, kiu deziris vojaĝi senpage. Mi kaj miaj kunuloj estis malĝentilegaj homoj kaj neniel respektis la sanktecon de tiu viro; kontraŭe, mi insulte mokadis lin. Sed foje li en sankta fervoro riproĉis min pro mia pekoplana vivado. Tiam min, post multa trinkado kun mia manovrestro, ekregis nokte en mia kajuto la kolero. Furiozega pro tio, kion al mi diris derviŝo kaj kion mi eĉ al sultano ne permesus al mi diri, mi kuregis sur la ferdekon kaj trapikis al li la bruston per mia ponardo. Mortante, li malbenis min kaj mian ŝipanaron, ke ni ne povu vivi nek morti, ĝis ni kuŝigos teren nian kapon. La derviŝo mortis, kaj ni ĵetis lin en la maron kaj ridis pri liaj minacoj. Sed jam en tiu sama nokto plenumiĝis liaj vortoj. Kelkaj el miaj ŝipanoj ribelis kontraŭ mi. Kun terura kolerego oni interbatalis, ĝis miaj partianoj submetiĝis kaj mi estis alnajlita al la masto. Sed ankaŭ la ribelintoj pereis de siaj vundoj; kaj baldaŭ mia ŝipo estis nenio alia krom granda tombo. Al mi ankaŭ estingiĝis la lumo de la okuloj: mi ĉesis spiri kaj kredis, ke mi mortas. Sed tio estis nur rigidiĝo, kiu tenis min enkatena. En la sekvinta nokto, je la sama horo, je kiu ni ĵetis maren la derviŝon, mi kaj ĉiuj miaj kunuloj revekiĝis. Revenis al ni nia vivo; sed estis al ni neeble ion alian fari aŭ paroli, krom tio, kion ni parolis kaj faris en tiu nokto. Tiel ni marveturadas jam de kvindek jaroj, ne povante vivi nek morti; ĉar kiel ni povis atingi la teron? Kun freneza ĝojo ni ĉiam veturis plenvele tra la ventego, ĉar ni esperis disfrakasiĝi fine kontraŭ iu krutaĵo kaj nian lacan kapon sur la fundo de la maro kuŝigi al ripozo. Tio ne prosperis al ni. Sed nun mi mortas. Denove mi dankas vin, nekonata savinto! Se trezoroj povas vin rekompenci, prenu mian ŝipon, kiel signon de mia dankemo."

Tiel parolinte, la kapitano klinis la kapon kaj mortis. En la sama momento li ankaŭ, kiel antaŭe liaj kunuloj, disfalis en polvon. Ĉi tion ni kolektis en kesteto kaj enterigis. El la urbo mi venigis laboristojn, kiuj rebonigis mian ŝipon. Grandprofite

interŝanĝinte kontraŭ aliaj la komercaĵojn, kiujn mi havis surŝipe, mi dungis maristojn, faris al mia amiko Mulej riĉajn donacojn, kaj forŝipiĝis al mia patrujo. Tamen mi faris grandan ĉirkaŭveturadon, surbordiĝante en multaj insuloj kaj landoj, kie mi vendis miajn komercaĵojn. La Profeto benis mian entreprenon. Post tri kvaronjaroj mi alvenis Balsoron duoble pli riĉa, ol faris min la mortanta kapitano. Miaj samurbanoj miregis pro miaj riĉaĵoj kaj mia feliĉo: neeble estis malkredigi al ili, ke mi eltrovis la diamantan valon de l' fama vojaĝanto Sindbado. Mi ne maltrompis ilin. Sed de nun la junaj Balsoranoj, apenaŭ atinginte sian dekokan jaron, devis forvojaĝi en la mondon, por fari, simile al mi, sian feliĉon. Mi, miaparte, vivadis trankvile kaj pace. Ĉiukvinjare mi vojaĝis Mekka'on, por danki la Sinjoron en sankta loko pro lia beno kaj por peti pro la kapitano kaj liaj kunuloj, ke li akceptu ilin en sian paradizon.

En la sekvinta tago la karavano vojiris seninterrompe antaŭen. Post kiam la vojaĝantoj ripozis en siaj tendoj, parolis Selim, la fremdulo, al Mulej, la plej juna komercisto: "Vi ja estas el ni la plej juna, kaj ĉiam gajhumora; sendube vi do scias por ni iun bonan ŝercrakonton. Nu, prezentu ĝin por nia regalo, ke ĝi refortigu nin post la varmego de l' tago." "Kun plezuro mi rakontus al vi ion amuzan," respondis Mulej, "sed al juneco, en ĉiuj cirkonstancoj, konvenas modesteco; kaj tial mi devas cedi la unuan lokon al miaj pliaĝaj kunvojaĝantoj. Sed Zaleŭkos estas ĉiam tiel serioza kaj malbabilema; kial do li ne rakontu al ni tion, kio malĝojigis lian vivon? Eble ni povos malpliigi lian ĉagrenon, se ĉagrenon li havas; ĉar fraton ni helpas volonte, eĉ se li estas alikredano."

La tiel alvokata estis greka komercisto, mezaĝa, bela, forta, sed tre seriozmiena. Kvankam li estis "nefidelulo" (ne mahometano), liaj kunvojaĝantoj tre amis lin; ĉar lia tuta personeco vekis ĉe ili estimon kaj konfidon. Plie, li havis nur unu manon, kaj kelkaj supozis, ke de ĉi tiu perdo venas lia seriozeco.

Zaleŭkos respondis al la afabla demando de Mulej: "Tre honoras min via konfido. Ĉagrenon mi havas nenian, almenaŭ nenian, de kiu vi povus liberigi min, kiom ajn vi tion dezirus. Tamen, ĉar Mulej ŝajnas riproĉeti al mi mian seriozecon, mi rakontos al vi ion, kio, espereble, senkulpigos min, se mi estas pli serioza ol aliaj. Kiel vi vidas, mi perdis mian maldekstran manon. Ne de mia naskiĝo ĝi mankas al mi, sed mi perdis ĝin en la plej teruraj tagoj de mia vivo. Ĉu pro tio mi estas kulpa: ĉu ne estas pardoneble, ke mi estu de tiuj tagoj pli serioza, ol pravigas mia nuna situacio: volu mem juĝi, aŭdinte la historion pri la dehakita mano."

La Historio pri la Dehakita Mano.

Mi naskiĝis en Konstantinopolo. Mia patro estis dragomano

[1](#)

ĉe La Porto,

[2](#)

kaj, krom tio, profite komercis silkajn ŝtofojn kaj bonodorajn oleojn. Li donis al mi bonan edukadon, parte instruante min proprapene, parte instruigante min de unu el niaj pastroj. En la komenco li destinis min kiel transprenonton de sia magazeno: sed fine, ĉar mi vidigis neesperitajn de li kapablojn, li decidis, laŭ konsilo de siaj amikoj, farigi min kuracisto, ĉar kuracisto, kiu ellernis iom pli multe ol ordinaraĵoj, povas en Konstantinopolo riĉiĝi.

En nian domon venadis multe da Frankoj.[3](#) Unu el ili konsentigis mian patron, lasi min forvojaĝi en lian hejman landon, al la urbo Parizo, kie, li diris, oni povas senkoste kaj plej bone akiri tiuspecajn sciaĵojn. Li proponis konduki min tien proprapage, kiam li reiros hejmlanden. Mia patro, kiu ankaŭ jam faris vojaĝojn en sia juneco, akceptis la proponon, kaj la Franko diris al mi, ke mi estu preta ekvojaĝi post tri monatoj. Mi estis elekscitita de ĝojo pro la espero vidi fremdajn landojn, kaj apenaŭ mi povis atendi ĝis la momento de la enŝipiĝo. Jam ordigis la Franko siajn aferojn kaj pretiĝis por la vojaĝo. En la antaŭtago, mia patro kondukis min en sian dormoĉambregon. Tie mi vidis belajn vestojn kaj armilojn, kuŝantajn sur la tablo. Sed pli ol ĉio altiris miajn rigardojn granda amaso da oro, ĉar neniam ankoraŭ mi vidis tian multegon, kolektitan unuloken. Mia patro ĉirkaŭprenis min kaj diris:

"Vidu, filo mia, jen mi havigis al vi vestojn por via vojaĝo. Ĉi tiuj armiloj estas viaj; ili estas tiuj samaj, kiujn alligis al mi via avo, kiam mi ekforiris fremdlanden. Mi scias, ke vi povas ilin uzi. Tamen, uzu ilin nur en la okazo, se oni atakos vin; kaj tiam ja frapu tutforte. Mia havo ne estas granda. Mi dividis ĝin, kiel vi vidas, en tri partojn; unu estas via; unu estu mia vivteno kaj rezervkapitalo; sed la tria devas esti sankta, netuŝebla trezoro, kiu servu al vi en horo de urĝega bezono."

Tiel parolis mia maljuna patro. Larmoj ĵetiĝis al liaj okuloj, eble pro ia antaŭsento, ĉar de post tiu tago mi neniam revidis lin plu.

La vojaĝo plenumiĝis sen ia malfeliĉo. Baldaŭ ni alvenis Franklandon; kaj, post plua sestaga voĵiro, ni atingis la grandan urbon Parizon. Ĉi tie mia franka amiko luis por mi ĉambron, kaj konsilis al mi, elspezi saĝe mian monon, kiu sumiĝis je du mil taleroj. En tiu urbo mi vivis tri jarojn, kaj ĉion ellernis, kion bona kuracisto devas scii. Sed mensoge mi parolus, se mi dirus, ke mi estis tie feliĉa, ĉar tute ne plaĉis al mi la moroj de tiu popolo, kaj, plie, mi havis ĉe ili nur malmulte da bonaj amikoj; tamen ĉi tiuj estis ja noblaj junuloj.

Pli kaj pli potence regis min la deziro revidi mian patrujon. Dum la tuta tempo de mia foresto mi aŭdis nenion pri mia patro. Tial, kiam prezentiĝis favora okazo por reiri hejmen, mi tuj profitis ĝin.

Sciiginte, ke tre baldaŭ iros senditaro el Franklando al La Porto, mi dungiĝis kiel ĥirurgo en la sekvantaron de l' ambasadoro, kaj tiel sukcesis reveni Stambulon. Sed mi trovis fermita la domon de mia patro, kaj la mirantaj pro mia reveno najbaroj diris al mi, ke mia patro mortis antaŭ du monatoj. Tiu pastro, kiu instruis min en mia juneco, alportis al mi la ŝlosilon; kaj nun, sola kaj de ĉiuj forlasita, mi eniris en la dezertan domon. Mi retrovis ĉion en sama stato, kiel mia patro ĝin lasis; mankis nur la oro, kiun li promesis konservi por mi. Mi demandis pri tio la pastron, kaj ĉi tiu sin klinis kaj diris: "Via patro mortis kiel sankta homo; al la eklezio li testamentis sian oron." Ĉi tion mi tute ne povis, kaj ankoraŭ nun ne povas, kompreni. Sed kion fari? Mi havis neniun, kiu povus atesti kontraŭ la pastro; kaj vere mi devis min juĝi feliĉa pro tio, ke li ne konsideris ankaŭ la domon kaj la komercaĵojn de mia patro kiel testamentajon. Tio estis la unua malfeliĉo, kiu trafis min. Kaj nun venis aliaj, en seninterrompa sinsekvo. Mia famo kuracista tute ne disvastiĝis, ĉar mi hontis ludi rolon ĉarlatanano, kaj mankis al mi en ĉiuj okazoj la rekomendo de mia patro, kiu estus prezentinta min al riĉuloj kaj eminentuloj, kiuj jam ne pensis plu pri la malfeliĉa Zaleŭkos. Ankaŭ la komercaĵojn de mia patro mi ne povis vendi, ĉar jam tuj post lia morto disforiĝis lia klientaro, kaj nur iom post iom oni akiras novan. Foje, dum mi malĝoje meditis pri mia situacio, revenis en mian memoron, ke mi jam ofte vidis en Franklando sampatrujanojn, kiuj travojaĝadas la landon kaj elmontras siajn vendotaĵojn sur la foirejoj de la urboj. Mi rememoris, ke oni volonte aĉetas de ili, ĉar ili venas el fremdaj landoj, kaj ke tiaj komercistoj povas fari centoblan profiton. Mi tuj prenis decidon. Vendinte mian patran domon, mi donis parton de la tiel enspezita mono al fida amiko, por ke li tenu ĝin garde, kaj per la cetero mi aĉetis objektojn, kiuj en Franklando estas maloftaj, ekzemple, ŝalojn, silkajn ŝtofojn, kuracajn ŝmiraĵojn kaj oleojn. Poste, luinte lokon sur ŝipo, mi ekvojaĝis duafoje Franklandon.

Apenaŭ mi preterveturis la kastelojn de l' bordoj Dardanelaj, denove ŝajnis la sorto fari al mi favoran rideton. Nia vojaĝo estis mallongedaŭra kaj feliĉa. Mi trapasis la urbojn kaj urbetojn franklandajn, kaj ĉie mi trovis tre aĉetemajn klientojn. Mia amiko en Stambulo sendis al mi ree kaj ree novajn provizojn da vendotaĵoj, kaj de tago al tago mi fariĝis pli riĉa. Fine, opiniante, ke mi jam sufiĉe ŝparis, por povi riski pli gravan entreprenon, mi enpakis miajn komercaĵojn kaj foriris Italujon. Sed mi ne forgesu ektuŝi alian aferon, kiu donis al mi ŝatindan profiton: mi helpis min ankaŭ per mia kuracarto. Alveninte en urbon, mi anoncigis per afiŝoj, ke jen prezentas sin greka kuracisto, kiu jam resanigis multe da malfeliĉuloj; kaj vere mia balzamo kaj miaj medikamentoj enspezigis al mi ne malmulte da zekinoj.⁴ Tiel mi venis fine al la urbo Firenze en Italujo. Mi intencis resti longatempe en ĉi tiu urbo, ne sole ĉar ĝi tre plaĉis

al mi, sed ankaŭ pro tio, ke mi volis mallaciĝi post la penegoj de miaj vagadoj. Mi luis magazenon en la kvartalo *Santa Croce* (santa kroĉe), kaj ne malproksime de tie, en gastejo, kelkajn belajn ĉambrojn kun altano.⁵ Senprokraste mi ĉirkaŭportigis miajn afiŝojn, kiuj anoncis min kiel kuraciston-komerciston. Apenaŭ mi malfermis mian magazenon, alvenis arege la aĉetontoj; kaj kvankam mi havis prezojn iom altajn, mi vendis pli multe ol aliaj, ĉar mi estis komplezema kaj afabla al miaj klientoj.

Mi jam travivis en Firenzo kvar agrablajn tagojn, kiam unu vesperon, antaŭ ol fermi la magazenon, mi pririgardis ankoraŭ unu fojon, laŭkutime, la enhavon de miaj sanigiluloj, kaj jen, en malgranda skatolo, mi trovis bileton, kiu, laŭ mia memoro, ne estis enmetita tien de mi. Mi malfermis la bileton, kaj legis en ĝi ordonon, ke mi troviĝu akurate je la dekdua horo tiunokte sur la ponto nomata *Ponte vecchio* (ponte vékkio). Longatempe mi meditis, demandante min vane, kiu ordonas min tien; sed ĉar mi ne konis en Firenzo eĉ unu homan estaĵon, mi fine diris al mi, ke eble oni volas konduki min kaŝe al iu malsanulo: jam pli ol unu fojon tio okazis al mi. Mi do decidis tien iri; sed mi alligis antaŭzorge la sabron, kiun donacis al mi iam mia patro.

Mallonge antaŭ noktomezo mi eliris, kaj baldaŭ alvenis al *Ponte vecchio*. Mi trovis la ponton senhoma kaj dezerta kaj decidis atendi, ĝis tiu aperos, kiu min vokis. Estis malvarma nokto; la luno brilis hele, kaj mi rigardadis malsupren en la ondojn de Arno, kiuj fulmetadis malproksimen en la lumo. Eksonis la dekdua horo ĉe la preĝejoj de la urbo. Mi elrektiĝis, kaj jen antaŭ mi staris altkreska viro, tute envolvita en ruĝan mantelon, kies unu brustrandon li tenis antaŭvizaĝe. Komence mi iom ektimis, ĉar tiel subite li ekstaris malantaŭ mi tie. Sed tuj mi retransviliĝis kaj diris:

"Se estas vi, kiu venigis min ĉi tien, diru, per kio mi devas vin servi?"

La ruĝmantelulo turnis sin kaj diris, mallonge: "Sekvu!"

Nu, estis al mi iom timige, iri sola kun tiu nekonato. Mi do restis staranta kaj diris:

"Tiel ne estu, sinjoro! Volu antaŭe sciigi min, kien. Mi petas vin ankaŭ montri al mi iom vian vizaĝon, por ke mi vidu, ĉu vi bone intencas al mi."

Sed la ruĝulo ŝajnis tute ne atenti mian peton. "Se vi ne volas, Zaleŭkos, restu do hejme," respondis li, ekforirante.

Ĉe tio, ekregis min la kolero.

"Ĉu vi kredas," ekkriis mi, "ke homo miaspeca lasas sin ridinduligi de ĉiu fispritulo, kiu volus lin atendigi senutile en malvarma nokto?"

Per tri saltoj mi atingis lin, kaptis je la mantelo kaj, kriante ankoraŭ pli forte, ekprenis per la alia mano mian sabron; sed la mantelo restis en mia mano, kaj la nekonato malaperis je la angulo de l' plej proksima strato. Iom post iom moderiĝis mia kolero; almenaŭ mi havis la mantelon, kaj ĉi tiu devis ja doni la ŝlosilon de l' stranga aventuro. Mi ĵetis ĝin ĉirkaŭ la ŝultrojn kaj ekvojiris hejmen. Apenaŭ mi faris cent paŝojn, preteriris min tuŝproksime alia persono, kiu flustris franklingve: "Estu singarda, grafo! Tiuĉinokte nenio farebla!" Sed antaŭ ol mi povis rigardi ĉirkaŭen, jam la persono estis preterpasinta, kaj mi vidis nur kvazaŭ ombron, ŝtelirantan laŭlonge de la domoj. Ke tiu alparolo rilatis ne min, sed la mantelon, tion mi bone komprenis; sed la aferon ĝi lumigis neniel. Je la sekvanta mateno mi pripensis, kion mi devas fari. En la komenco mi intencis publike anoncigi la mantelon, kvazaŭ mi trovis ĝin ie; sed se mi tion farus, la nekonato povus reprenigi ĝin triapersono, kaj mi havus nenian klarigon pri la afero. Tiel pripensante, mi rigardis pli atente la mantelon. Ĝi estis el peza genova veluro purpura, borderita per astrakana felo kaj riĉe brodita per oro. La belega aspekto de l' mantelo venigis al mi ideon, kiun mi decidis efektivigi.

Mi portis ĝin en mian magazenon kaj elmetis kiel vendotaĵon; sed mi postulis por ĝi prezon tiel altan, ke mi estis certa trovi neniun, kiu konsentos aĉeti. Mia celo estis, fikse rigardi en la okulojn ĉiun, kiu demandos pri la prezo de la pelto. La fremdulon mi ja rekonas inter miloj; ĉar, post kiam li perdis la mantelon, mi tre klare, kvankam nur momente, ekvidis lian figuron. Aperis multe da aĉetemuloj, por vidi la mantelon, kies neordinara beleco altiris ĉies rigardojn; sed neniuj similis eĉ iomete la nekonaton, kaj neniuj volis pagi la altan sumon de ducent zekinoj. Mi ankaŭ rimarkis, ke ĉiu, kiun mi demandis, ĉu vere ne troviĝas en Firenzo aliaj similaj manteloj, respondis per ne kaj certigis, ke li neniam vidis laboraĵon tiel valoregan kaj delikatan.

Fine, ĉirkaŭ vesperiĝo, venis junulo, kiu ofte estis ĉe mi kaj jam tiun saman tagon, proponis por la mantelo grandan sumon da mono. Ĵetante sakon da zekinoj sur la tablon, li ekkriis: "Per Dio, Zaleŭkos, mi nepre devas havi vian mantelon, eĉ se mi pro tio ruiniĝos": kaj siajn ormonerojn li samtempe komencis kalkuli. Mi estis en granda embaraso. Elpendigante la mantelon, mi havis celon, altiri sur ĝin, se eble, la rigardojn de mia nekonato; kaj nun venis tiu juna malsaĝulo, por pagi la difinitan prezegon. En tiuj cirkonstancoj, restis al mi nenio alia por fari, krom konsenti pri la negoco. Cetere, logis min la penso, ricevi por mia nokta aventuro tiel belan kompensaĵon. La junulo surmetis la mantelon kaj foriris. Sed ĉe la sojlo li turnis sin kaj deprenis de la mantelo kroĉitan al ĝi paperfolieton, kiun li ĵetis al mi, dirante: "Jen, Zaleŭkos, io, kio certe ne apartenas al la mantelo." Mi prenis, indiferenta, la bileton; sed ve! jen la vortoj, kiujn mi trovis tie skribitaj: "Alportu la mantelon hodiaŭ nokte je la konata horo al *Ponte vecchio*: atendas vin kvar cent zekinoj." Mi staris kvazaŭ fulmofrapita. Tiel do, facilanime, mi ludperdis mian feliĉon kaj tute maltrafis mian celon! Sed ne longe

daŭris mia meditado. Ekpreninte amase la ducent zekinojn, mi ekkuris post la aĉetinto de la mantelo kaj diris al li: "Reprenu viajn zekinojn, amiko mia, kaj redonu al mi la mantelon: mi tute ne povas ĝin vendi." Unuamomente li kredis, ke mi parolas nur ŝerce; sed, konvinkiĝinte, ke mi estas tute serioza, li koleriĝis pro mia postulo kaj nomis min malsaĝulo. Fine ni ekbatalis. Dum la bataleto, prosperis al mi deŝiregi de li la mantelon; kaj mi jam ekforiris kun mia akiro, kiam la junulo alvokis policianojn kaj trenigis min antaŭ la tribunalon. La juĝisto, kiun multe mirigis la plendo, aljuĝis la mantelon al mia kontraŭulo. Tamen mi proponis al la junulo dudek, kvindek, okdek, eĉ cent zekinojn plie ol liaj ducent, se li recedus al mi la mantelon. Kion ne povis fari miaj petoj, tion efektivigis mia oro; li akceptis miajn bonajn zekinojn. Mi, miaflanke, foriris triumfante kun mia mantelo kaj devis toleri, ke ĉiuj Firenzanoj opiniadis min frenezulo. Je l' fino, ilia opinio estis por mi tute indiferenta; mi ja sciis pli bone ol ili, ke mi faris profitan negocon.

Senpacience mi atendis la nokton. Ĉirkaŭ la sama horo kiel hieraŭ mi iris, kun la mantelo sub la brako, al *Ponte vecchio*. Je la lasta sonorila ekbato, elvenis figuro el la nokto kaj alproksimiĝis al mi. Estis klarerekoneble la homo de hieraŭ. "Ĉu vi havas la mantelon?" li demandis. "Jes, sinjoro," respondis mi, "sed ĝi kostis al mi cent zekinojn kontante." "Mi scias," rediris li; "rigardu ĉi tien: jen vi havas kvar cent." Li proksimiĝis kun mi al la larĝa balustrado de l' ponto, kie li elkalkulis la monerojn. Kvar cent oraj moneroj: belege ili rebrilis en la lumo de la luno. Mia koro ĝojis je tiu vidaĵo, neniel antaŭsentante, ke tio estos ĝia lasta feliĉo. Mi enpoŝigis mian monon; kaj nun mi ekdeziris vidi pli bone la malavaran nekonaton; sed antaŭ la vizaĝo li havis maskon, tra kiu nigraj fulmebrilantaj okuloj rigardis min terure. "Mi dankas vin, sinjoro, pro via boneco," mi diris; "kion vi nun postulas de mi? Sed antaŭe mi devas kondiĉi, ke ĝi ne estu io malbona." "Vi vane estas maltrankvila," respondis li; "mi bezonas vian kuracistan helpon; tamen, ne por vivanto, sed por mortinto!"

Mirigita, mi ekkriis: "Kiel tio povas esti?"

"Mi venis kun mia fratino el malproksima lando," rakontis li, kaj samtempe li faris signon, ke mi sekvu lin: "ni loĝis ĉi tie ĉe amiko de nia familio. Hieraŭ mia fratino subite mortis de malsano, kaj la parencoj volas enterigi ŝin morgaŭ. Sed, laŭ malnova kutimo de nia familio, ĉiuj samfamilianoj devas kuŝi en la kriptoj de siaj prapatroj: multaj, kvankam ili mortis fremdlande, ripozas nun, enbalzamigitaj, en la hejma tombejo. Nu, al miaj parencoj mi ne domaĝas ŝian korpon, sed al mia patro mi devas alporti almenaŭ la kapon de lia filino, por ke li vidu ŝin ankoraŭ unu fojon."

Ĉi tiu kutimo, dehaki al amataj parencoj la kapon, ŝajnis al mi, verdire, sufiĉagrade terura; tamen, mi ne kuraĝis ion kontraŭdiri, timante ofendi la nekonaton. Mi do diris al li, ke mi bone scias enbalzamigi kadavrojn, kaj petis konduki min al la mortinta sinjorino. Survoje, mi ne povis deteni min de la demando, kial ĉio ĉi tio devas fariĝi

nokte kaj tiel sekrete. Li respondis al mi, ke liaj parencoj, kiuj konsideras lian intencon kruebla, malhelpus ĝin, se li provus plenumi ĝin tage; sed se la kapo estos definitive detranĉita, ili jam ne povos multe diri pri la afero; li mem, diris li, povus alporti al mi la kapon, sed natura sento malebligas, ke li detranĉu ĝin propramane.

Dume ni alvenis antaŭ grandan belegan domon. Mia akompananto ĝin montris al mi kiel la celon de nia nokta promeno. Ni preterpasis la ĉefan enirejon de l' domo; eniris tra malgranda pordo, kiun la nekonato zorge refermis; kaj fine, en la mallumo, supreniris mallarĝan tordŝtuparon. Ĝi kondukis en nesufiĉe lumigitan koridoron, el kiu ni venis en ĉambron, kiun heligis lampeto fiksita sur la plafono.

En ĉi tiu ĉambro estis lito, en kiu kuŝis kadavro. La nekonato deturnis sian vizaĝon, kvazaŭ li volus kaŝi siajn larmojn. Li montris per la fingro la liton, ordonis al mi plenumi bone kaj rapide mian taskon, kaj forlasis la ĉambron.

Mi elpakis miajn tranĉilojn, kiujn, kiel kuracisto, mi ĉiam havis ĉe mi, kaj proksimiĝis al la lito. Je la tuta kadavro, estis videbla nur la kapo, sed ĉi tiu estis tiel bela, ke, vole-nevole, kaptis min plej profunda kompato. La longaj nigraj harligoj pendis, plektitaj, malsupren; la vizaĝo estis pala; la okuloj, fermitaj. Komence mi entranĉis la haŭton, same kiel faras ĥirurgoj, ekamputante korpmembron. Poste mi prenis mian plej akran tranĉilon, kaj tratanĉis, per unu bato, la gorĝon. Sed kia terurego! La mortintino malfermis la okulojn, sed tuj refermis ilin, kaj, ekĝemante profunde, ŝajnis nur en tiu momento ellasi la lastan spiron. Samtempe la varma sango elŝprucis el la vundo. Nun mi estis certa, ke mortigis la malfeliĉulinon neniu alia krom mi. Ke ŝi jam ne plu vivis, estis tute ne dubeble, ĉar, post tia vundo, nenio povus ŝin savi. Dum kelke da minutoj mi staris tie, korpremata de tiu teruraĵo. Ĉu la ruĝmantelulo trompis min? aŭ ĉu eble la fratino estis antaŭe nur ŝajnmortinta? Ĉi tio ŝajnis al mi la pli kredebla supozo. Sed mi ne povis diri al la frato, ke malpli rapida tranĉo estus revekinta ŝin, ne mortigante; sekve mi pretiĝis por findetranĉi la kapon. Sed ankoraŭ unu fojon ekĝemis la mortanta, streĉetendis sin per dolorega ekmovo, kaj mortis. Ĉe tio, venkis min la teruro, kaj, preskaŭ freneza de timo, mi elkuregis el la ĉambro. Sur la koridoro regis plena mallumo, ĉar la lampo estis estingita; de mia akompaninto ne estis videbla eĉ ia postsigno; kaj mi devis palpigi laŭlonge de la muro, por atingi la tordŝtuparon. Fine mi trovis ĝin kaj malsupreniris, duone falante, duone glitante. Ankaŭ malsupre estis neniu. Mi trovis la pordon nur duone fermita; kaj mi spiris pli libere, estante denove sur la strato, ĉar en tiu domo fariĝis al mi neelporteble terure. Antaŭenpelata de timo, mi kuregis en mian loĝejon kaj enprofundiĝis en la kusenojn de mia lito, por forgesi mian abomenan faraĵon. Sed dormo ne venis al miaj okuloj, kaj nur post la tagiĝo mi iom retransviliĝis. Estis, laŭ mia opinio, tre neverŝajne, ke la homo, kiu subinstigis min plenumi tiun krimon (mi nun ja konsideris mian faron kiel krimon), denuncos min antaŭ tribunalo. Tial mi tuj decidis reiri en mian magazenon, daŭrigi mian komercadon kaj fari kiel eble plej senzorgan mienon. Sed ho ve! nova

cirkonstanco, kiun mi antaŭe ne rimarkis, pliigis nun mian maltrankvilecon. Mia ĉapo kaj mia zono, ja ankaŭ miaj tranĉiloj malestis, kaj mi ne sciis certe, ĉu mi forgesse lasis ilin en la ĉambro de l' mortigita, aŭ perdis poste dum mia forkuro. Pli kredebla ŝajnis al mi, bedaŭrinde, la unua konjekto: oni do povus eltrovi min kiel mortiginton!

Je kutima horo mi malfermis mian magazenon. Baldaŭ poste venis al mi mia najbaro, kiel li ĉiumatene kutimis fari, ĉar li estis homo tre babilema.

"Nu, kion vi diras," ekparolis li, "pri la terura afero, kiu okazis en la lasta nokto?"

Mi ŝajnis scii nenion.

"Kiel! ĉu vi ne scias, pri kio parolas la tuta urbo? ne scias, ke la plej bela floro de Firenzo, Bianka, la filino de l' gubernatoro, estas pasintanokte mortigita? Ho ve! Hieraŭ mi vidis ŝin, ankoraŭ tiel gajan, veturantan tra la stratoj kune kun ŝia fianĉo; ĉar hodiaŭ ili volis edziĝi."

Ĉiu vorto de la najbaro estis al mi kvazaŭ pikego en la koron. Kaj ofte ripetiĝis mia turmentego, ĉar ĉiu mia kliento rakontis la aferon, unu pli terure ol alia; tamen ili ne povis diri ion samgrade teruran, kiel tio vidita de mi mem.

Ĉirkaŭ tagmezo venis en mian magazenon juĝeja oficisto. Petinte min foririgi la apudestantojn, "Sinjoro Zaleŭkos," parolis li, montrante la perditajn de mi objektojn, "ĉu tiuj ĉi apartenas al vi?" Mi pripensis momenton, ĉu mi ne tion neu; sed ekvidinte tra la duone malfermita pordo mian domluiganton kaj aliajn konatojn, kiuj eble povus kontraŭatesti, mi decidis, ne plimalbonigi la aferon per mensogo, kaj konfesis min kiel posedanton de la montritaj objektoj. La oficisto ordonis al mi sekvi lin, kaj kondukis min en grandan konstruaĵon, kiun mi baldaŭ rekonis kiel malliberejon. Tie li asignis al mi ĉambron, kie mi restu ĝis nova ordono.

Terura sin montris al mi mia situacio, dum mi meditis pri ĝi en tiu soleco. La penso, ke, kvankam nevole, mi tamen iun mortigis, revenis ree kaj ree al mia spirito. Ankaŭ mi devis konfesi al mi mem, ke brilo de oro turnis al mi la kapon; alie mi ne estus irinta tiel blinde en la kaptilon. Du horojn post mia aresto, oni elkondukis min el mia ĉambro, kelkajn ŝtuparojn malsupren, en grandan salonon. Tie, ĉirkaŭ longa nigrekovrita tablo, sidis dek du viroj, plejparte grandaĝuloj. Ĉe la flankoj de l' salono etendiĝis benkoj, sur kiuj sidis la plej eminentuloj de Firenzo. Sur alkonstruitaj pli supre galerioj staris densamase la rigardantoj. Kiam mi stariĝis antaŭ la nigra tablo, leviĝis homo kun severa, malgaja mieno: estis la gubernatoro. Alparolante la kunvenintaron, li diris, ke li, kiel patro, ne povas juĝi la nunan aferon: tiun ĉi fojon li do cedas sian lokon al la plej maljuna senatano. La plej maljuna senatano estis grandaĝulo almenaŭ naŭdekjara. Li tenis sin antaŭenkliniĝe, kaj maldensaj blankaj

haroj kovretis liajn tempiojn: sed fajre fulmetadis ankoraŭ liaj okuloj, kaj lia voĉo estis sentrema kaj forta. Unue, li demandis min, ĉu mi volas konfesi la mortigon. Mi petis lin favore aŭskulti min, kaj rakontis sentime kaj klarvoĉe, kion mi faris kaj kion mi sciis. Mi rimarkis, ke la gubernatoro, dum mia rakontado, jen paliĝis, jen ruĝiĝis; kaj kiam mi finis, li kriis al mi kolerege: "Kiel, abomenulo! ĉu al senkulpulo vi volas imputi krimegon, kiun, pro avareco, plenumis vi mem?" La senatano faris al li riproĉon pro lia interrompo, ĉar sian rajton li libervole rezignis; krom tio, estas neniel pruvite, ke mi krimis pro avareco, ĉar, laŭ lia propra diro, oni ja nenion forrabis al lia mortigita filino. Li eĉ diris al la gubernatoro, ke li devas fari raporton pri la ĝistiam viva de sia filino, ĉar nur tiamaniere oni povas decidi, ĉu mi diris la veron, aŭ ne. Tiel parolinte, li fermis por tiu tago la juĝan kunsidon, por elĉerpi konsilon, diris li, el la paperaĵoj de l' mortinta, kiujn al li transdonos la gubernatoro. Oni rekondukis min en mian malliberejon, kie mi pasigis malĝojan tagon, turmentata de la dezirego, ke oni eltrovu ian interrilaton inter la mortigita sinjorino kaj la ruĝmantelulo.

Plena de espero, mi revenis, la morgaŭan tagon, en la juĝejon. Sur la tablo vidiĝis aro da leteroj. La maljuna senatano demandis min, ĉu ili estas de mia mano. Mi rigardis ilin atente kaj konvinkiĝis, ke ili estas de la sama mano, kiel tiuj ambaŭ biletoj, kiujn mi jam ricevis. Tion mi sciigis al la senatano, sed oni ŝajnis ne atenti miajn vortojn kaj respondis, ke mi sendube skribis kaj la unujn kaj la aliajn, ĉar la subskribo de la leteroj estas nedisputeble Z., la ĉeflitero de mia nomo. Tiuj leteroj enhavis minacojn kontraŭ la mortintino kaj avertojn, ke ŝi ne plenumu la projektitan edziniĝon. Ŝajnis, ke la gubernatoro estis doninta strangajn informojn pri mi; ĉar en tiu tago oni traktis min ankoraŭ pli malkonfideme kaj severe. Por min pravigi, mi apelaciis al miaj paperaĵoj, kiuj sendube troviĝas en mia ĉambro; sed oni diris al mi, ke oni jam serĉis ilin kaj ne trovis. Tiel, jam antaŭ la fino de tiu juĝtago, mi perdis ĉiun esperon, kaj kiam, la trian tagon, mi estis enkondukita en la salonon, oni laŭtleĝis al mi la verdikton, ke mi estas pruve kulpigita pri laŭintenca mortigo kaj kondamnita al morto. Jen nun la terura sorto, kiu atendis min! Forlasita de ĉiuj, kiuj estis al mi karaj sur la tero, malproksima de mia hejmo, mi devis morti senkulpa, en floranta aĝo, sub la ekzekutista hakilo!

En la vespero de tiu terura tago, kiu determinis mian sorton, mi sidis, sola kaj senespera, en mia malliberejo kaj seriozege direktadis miajn pensojn sur la morton, kiam jen — malfermiĝis la pordo de mia karcero kaj enpaŝis viro, kiu, nenion dirante, min longatempe observis. "Ĉu en ĉi tia situacio mi retrovas vin, Zaleŭkos?" diris li fine. Ĉe la unua rigardo, pro la malforta lumo de mia lampo, mi ne rekonis lin; sed la sono de lia voĉo revekis en mi malnovajn memorojn. Estis Valetio, unu el tiuj malmultaj amikoj, kiujn mi konis en la urbo Parizo dum la tempo de mia studado. Li diris, ke la okazo kondukis lin al Firenzo, kie loĝas, altrespektata, lia patro; li jam sciigis pri mia historio kaj estas nun veninta, por min vidi ankoraŭ unu fojon kaj por

ekscii de mi mem, kiel mi povis ĝis tia grado kulpiĝi. Mi rakontis al li la tutan aferon. Li ŝajnis tre mirigita kaj petegis, ke mi ĉion diru al li, mia sola amiko, por ke mi ne foriru el la mondo kun mensogo sur la lipoj. Mi ĵuris al li, per plej forta ĵuro, ke mi diris la veron kaj ke premas min nenio alia kulpo krom tiu, ke, blindigita de brilo de oro, mi ne rimarkis la neverŝajnecon de la rakonto de l' nekonato. "Ĉu vi do ne konis Biankan?" li demandis. Mi certigis lin, ke mi neniam ŝin vidis. Valetio nun rakontis al mi, ke ĉirkaŭvolvas la aferon granda mistero, ke la gubernatoro tre rapideme plenumigis mian kondamnon, kaj ke kuras famo, laŭ kiu mi jam de longe konas Biankan kaj mortigis ŝin por min venĝi pro ŝia edziniĝo kun alia. Mi rimarkigis al li, ke ĉio ĉi tio tre bone diraplikiĝas al la ruĝmantelulo, sed ke mi neniel povas pruvi lian kunkulpecon. Valetio ĉirkaŭprenis min, plorante, kaj promesis fari ĉion eblan por almenaŭ savi mian vivon. Mi havis ne multe da espero; tamen mi sciis, ke Valetio estas prudenta kaj leĝoscia homo, kaj ke li faros sian eblon, por min savi. Dum du longaj tagoj mi estis en necerteco; fine aperis Valetio. "Mi alportas konsolon, sed doloran. Vi vivos kaj estos libera, sed kun perdo de unu mano." Kortuŝita, mi dankis mian amikon pro mia vivo. Li diris al mi, ke la gubernatoro obstine rifuzis reesplorigi la aferon, sed ke fine, por ne montriĝi maljusta, li konsentis, ke se oni trovos en la libroj pri firenza historio similan aferon, mia puno konformiĝu al tie eldirita. Li kaj lia patro tralegis tage kaj nokte la malnovajn librojn kaj fine trovis proceson, kiu plene similas la mian. Jen, laŭtekste, la puno: oni dehaku al li la maldekstran manon, konfisku lian havon, kaj lin mem ekzilu por ĉiam. Tia nun estas, diris li, ankaŭ mia puno, kaj mi devas min pretigi por la dolorplena horo, kiu atendas min. Sed mi ne volas priskribi tiun teruran horon, en kiu, sur la publika vendoplaco, mi metis mian manon sur la blokon, kaj ĵetkovris min, elŝprucegante, mia propra sango.

Valetio akceptis min en sian domon, ĝis mi resaniĝis; poste li noblanime provizis min per vojaĝa mono; ĉar ĉio, kion mi laborenspezis kun tiom da penego, estis rabakirita de la juĝistaro. El Firenzo mi vojaĝis Sicilion, kaj de tie per la unua ŝipo, kiun mi trovis, al Konstantinopolo. Mian tutan esperon mi metis sur la monsumon, kiun mi antaŭe alkonfidis al mia amiko; mi ankaŭ petis, ke li permesu al mi loĝi ĉe li; sed kiel granda estis mia miro, kiam li demandis min, kial mi ne volas ekloĝi en mia propra domo. Li diris al mi, ke fremda homo jam aĉetis en mia nomo domon en la greka kvartalo; la sama homo ankaŭ diris al la najbaroj, ke mi mem alvenos baldaŭ. Mi tuj iris tien kun mia amiko. Ĝoje akceptis min ĉiuj miaj konatoj. Maljuna komercisto transdonis al mi leteron, kiun postlasis tie la aĉetinto de la domo.

Mi legis: "Zaleŭkos! du manoj estas nun pretaj senripoze labori, por ke vi ne sentu la pardon de unu. Al vi apartenas la domo, kiun vi vidas ĉi tie, kune kun ĝia tuta enhavo; kaj ĉiujare oni al vi transdonos tiel multe, ke vi enkalkuliĝos inter la plej riĉaj el viaj samlandanoj. Ke vi pardonu al tiu, kiu estas pli malfeliĉa ol vi!" Mi povis bone diveni, kiu estas la aŭtoro de tiu letero; kaj la komercisto diris al mi, responde al mia

demando, ke ĝi estis homo, kiun li prenis por Franko: li surhavis ruĝan mantelon. Nun mi sciis sufiĉe, por konfesi al mi mem, ke la nekonato, malgraŭ ĉio, ne estas tute senigita je ĉiu nobla inklino. En mia nova domo mi trovis ĉion plej bone aranĝita, — interalie, magazenon kun komercaĵoj pli belaj ol mi iam havis antaŭe. De tiu tempo forpasis dek jaroj. Plivere pro kutimo, ol pro tio, ke mi bezonas tion fari, mi daŭrigas miajn vojaĝojn; sed tiun landon, kie mi fariĝis tiel malfeliĉa, mi neniam revidis plu. Ĉiujare mi ricevis, de post tiu tempo, mil ormonerojn; sed kvankam mi ĝojas scii, ke tiu malfeliĉulo estas nobla homo, tamen li ne povas forĉeti la ĉagrenon de mia animo, ĉar ĉiam vivos en mi la terura bildo de la mortigita Bianka.

Zaleŭkos, la greka komercisto, jam finis sian rakonton. La aliaj aŭskultis lin kun varmega kunsento; sed pli ol ĉiuj kortuŝita ŝajnis la fremdulo. Kelke da fojoj, dum la rakontado, li profunde ekĝemis; kaj al Mulej ŝajnis, kvazaŭ liaj okuloj pleniĝis unufoje de larmoj. Ankoraŭ longatempe ili priparoladis la historion.

La fremdulo demandis: "Ĉu vi do ne malamas la nekonaton, kiu tiel malnoble perdigis al vi gravan korpmembron, elmetante al danĝero eĉ vian vivon?"

"Verdire," respondis la greko, "estis iam horoj, en kiuj mia koro akuzadis lin antaŭ Dio, ke li alportis al mi tiun ĉi malfeliĉon kaj venenis mian vivon; sed mi trovis konsolon en la kredo de miaj prapatroj, kaj tiu ĉi ordonas al mi ami miajn malamikojn; cetere, li sendube estas eĉ pli malfeliĉa ol mi."

"Vi estas nobla homo!" ekkriis la fremdulo; kaj, emociita, li premis al la greko la manon.

Sed nun la gardistarestro interrompis ilian interparoladon. Kun zorgoplena mieno li envenis en la tendon kaj anoncis, ke ili ne sin donu al ripozo, ĉar ĉi tie estas la loko, kie oni plej ofte surfalas karavanojn; krom tio, liaj gardistoj kredas vidi en la malproksimo aron da rajdantoj.

Tre konsternis la komercistojn ĉi tiu sciigo; sed la fremdulo miris pri ilia maltrankvileco, ĉar li opiniis, ke ili estas sufiĉe bone armitaj, por ne timi araĉon da rabemaj araboj.

"Jes, sinjoro," respondis al li la gardistarestro, "se ĝi estus nur tia kanajlaro, oni povus senzorge kuŝiĝi por ripozi; sed de kelka tempo vidigas sin denove la terura Orbasano; kaj pro tio estas necese, ke ni tenu nin prete."

La fremdulo demandis, kiu do estas tiu Orbasano, kaj Aĥmet, la maljuna komercisto, respondis: "Rondiras pri tiu mirinda homo ĉiuspecaj legendoj. Unuj kredas lin superhoma estaĵo, ĉar jam ofte li venke batalis sola kontraŭ kvin eĉ ses atakantoj; aliaj

opinias lin iu kuraĝa franko, kiun malfeliĉo forpelis en ĉi tiun regionon; sed el ĉiuj pridiroj nur la jena estas nedisputebla: ke li estas fireputacia rabisto kaj ŝtelisto."

"Tion vi tamen ne povas certigi," protestis Leza, unu el la komercistoj. "Kvankam li estas rabisto, tamen li estas nobla homo, kaj tia li montris sin al mia frato, kiel mi ja povus rakonti al vi. El sia tuta samgentanaro li faris homojn bone ordigitajn: kaj dum li trairadas la dezerton, neniu alia gento kuraĝas sin montri. Plie, li ne rabadas kiel faras aliaj, sed li postulas de la karavanoj protektan imposton; kaj kiu volonte tion pagas, povas sendanĝere daŭrigi sian vojon, ĉar Orbasano estas la sinjoro de la dezerto."

Tiel interparoladis la vojaĝantoj en la tendo. La gardostarantoj, aliflanke, kiuj postenis ĉirkaŭ la tendaro, komencis maltrankviliĝi. Granda amaso da rajdantoj vidiĝis en interspaco de duonhora vojo: ili ŝajnis alrajdi rekte al la tendaro. Unu el la gardistoj eniris tial en la tendon kaj sciigis, ke verŝajne oni baldaŭ atakos la karavanon. La komercistoj interkonsiliĝis, kion ili devas fari: ĉu iri renkonte al la malamikoj, aŭ atendi la atakon. Aĥmet kaj la du pli maljunaj komercistoj volis tion ĉi lastan; sed la flamiĝema Mulej kaj Zaleŭkos postulis la unuan kaj vokis al helpo la fremdulon. Tiu ĉi, trankvilanima, eltiris el sia zono bluan tuketon kun ruĝaj steloj, alligis ĝin al lanco kaj ordonis al sklavo starigi ĝin sur la tendo; li donas garantie sian vivon, li diris, ke la rajdantoj pace preteriros, kiam ili ekvidos tiun signon. La sklavo starigis la lancon sur la tendo; sed Mulej ne volis kredi, ke la rimedo sukcesos. Dume ekarmis sin ĉiuj, kiuj estis en la tendaro, kaj, ekscitite atendente, ili rigardadis renkonte al la rajdantoj. Ŝajnis tamen, ke tiuj ĉi jam ekvidis la signon sur la tendo, ĉar ili subite dekliniĝis de sia antaŭa direkto kaj ekforrajdis flanken per granda ĉirkaŭiro.

Mirigite la vojaĝantoj staris tie dum kelkaj momentoj, rigardante jen al la rajdantoj, jen al la fremdulo. Tiu ĉi staris antaŭ la tendo, tute indiferenta, kvazaŭ nenio okazis, kaj rigardadis malproksimen tra la ebenaĵo. Fine Mulej interrompis la silenton: "Kiu vi estas, ho potenca nekonato," ekkriis li, "kiu per sola movo de l' mano obeigas la sovaĝajn rabistajn bandojn de l' dezerto?" — "Vi taksas mian arton pli alta ol ĝia vera valoro," respondis Selim Baruh. "Per ĉi tiu signo mi provizis min, kiam mi forsaviĝis el mallibereco. Kion ĝi signifas, tion mi mem ne scias; mi scias nur jenon: kiu vojaĝas kun ĉi tiu signo, troviĝas sub potenca protekto."

La komercistoj dankis la fremdulon kaj nomis lin ilia savinto. Efektive, la rajdantaro estis tiel multenombra, ke la karavano certe ne povus fari al ĝi longan kontraŭstaradon.

Pli trankvilanime oni nun kuŝiĝis ripozi; kaj kiam la suno komencis subiri kaj la vespera vento blovadis tra la sabla ebenaĵo, ili ekforiris pluen.

La morgaŭan tagon ili haltis en interspaco de unutaga vojo de la eliro el la dezerto. Kiam la vojaĝantoj denove kunvenis en la granda tendo, Leza, la komercisto, prenis la parolon: "Mi diris al vi hieraŭ, ke la timata Orbasano estas nobla homo; permesu, ke mi hodiaŭ ĝin pruvu, rakontante al vi la sorton de mia frato. — Mia patro estis kadio⁶ en Akaro. Li havis tri infanojn. Mi estis la plej aĝa; mia frato kaj mia fratino estis multe pli junaj ol mi. Kiam mi havis dudek jarojn, la frato de mia patro lasis min voki. Li destinis min esti heredonto de siaj bienoj, kondiĉe ke ĝis lia morto mi restu ĉe li. Sed ĉar li atingis grandan aĝon, mi revenis ne pli frue ol antaŭ du jaroj en mian hejmon, ne sciiginte ion pri la terura sorto, kiu intertempe trafis mian familion, nek kiel Allah ĝin favorkore bonigis."

La Savo de Fatme.

Mia frato Mustafa kaj mia fratino Fatme havis preskaŭ la saman aĝon. La unua estis maksimume du jarojn pli aĝa. El la tuta koro ili amis unu la alian, kaj en ĉio ili kunlaboradis por malplipezigi al nia malsanema patro la ŝarĝon de lia granda maljuneco. Kiam venis la dek-sesa naskotago de mia fratino, mia frato aranĝis feston. Li invitigis al si ĉiujn ŝiajn kunludantinojn, prezentigis al ili en la ĝardeno de l' patro elektitajn manĝaĵojn, kaj, ĉe la vesperiĝo, invitis ilin fari plezurvetureton surmaran en barko, kiun li jam luis kaj feste ornamis. Fatme kaj ŝiaj amikinoj ĝoje konsentis; ĉar la vespero estis bela kaj la urbo, precipe kiam oni ĝin rigardis vespere de sur la maro, prezentis belegan vidaĵon. Al la knabinoj estis tiel bone sur la barko, ke ili konsentigis mian fraton veturi ĉiam pli kaj pli antaŭen en direkto al la plena maro. Sed Mustafa konsentis iom kontraŭvole, ĉar jam antaŭ kelkaj tagoj oni vidis tie korsaron. Ne malproksime de la urbo elstaras en la maron promontoro. Ĝis tie la knabinoj volis veturi, por vidi la sunon subiranta en la maron. Ĉirkaŭremante la promontoron, ili ekvidis, en malgranda interspaco, barkon plenan de viroj armitaj. Antaŭvidante ion ne bonan, mia frato ordonis al la remistoj turni la boaton kaj alremi al la tero. Kaj efektive lia timo ŝajnis realiĝi: la alia barko sekvis rapide tiun de mia frato, atingis ĝin, ĉar ĝi havis pli multe da remistoj, kaj sin tenis ĉiam inter nia barko kaj la marbordo. La knabinoj, ekkonsciinte pri la minacanta ilin danĝero, salte leviĝis, kriadis, ploradis; vane Mustafa penis ilin retransviligi, vane li admonis ilin resti senmovaj, ĉar ili elmetas la barkon al la danĝero esti renversita per tia tien — kaj reenkurado. Nenio helpis. Fine, kiam alproksimiĝis la alia boato, ili ĉiuj kuregis al la posta parto de l' barko, kaj tiu ĉi renversiĝis. Dume oni jam observis de sur la tero la movojn de la fremda boato; kaj ĉar oni jam de kelka tempo estis maltrankvila pro korsaroj, tiu ĉi boato vekis suspekton; tial debordiĝis kelkaj barkoj, por helpi la nian. Sed ili

alvenis nur ĝustatempe por enŝipigi la dronantojn. En la konfuzo, la malamika boato jam malaperis. Sur la du barkoj, kiuj surprenis la dronantojn, oni ne sciis certe, ĉu ĉiuj estas savitaj. Oni reciproke proksimiĝis; kaj ho ve! oni eksciis, ke mia fratino kaj unu el ŝiaj kunludantinoj malestis; samtempe oni ekvidis en unu el la barkoj fremdulon, kiun konis neniu. Minacite de Mustafa, li konfesis, ke li apartenas al la malamika ŝipo, kiu ankrostaras je du mejloj oriente, kaj ke liaj kunuloj, forrapidegante, lin lasis al lia sorto en la momento, kiam li ekkunsavis la knabinojn; li ankaŭ diris, ke li rimarkis, kiel oni entreneis du el ili en la barkon.

Senlima estis la doloro de mia maljuna patro. Ankaŭ Mustafa estis morte afliktita, ne nur pro tio, ke li perdis sian amatan fratinon, kaj ke li devas sin mem kulpigi pri ŝia malfeliĉo, sed plie — tiu amikino de Fatme, kiu partoprenis ŝian malfeliĉon, estis de siaj gepatroj promesita al li kiel edzino, kaj tion li ankoraŭ ne kuraĝis konfesi al nia patro, ĉar ŝiaj gepatroj estis malriĉaj kaj de malaltranga deveno. Sed mia patro estis homo severa. Kiam lia ĉagrenego iom malpliigis, li venigis al si Mustafan kaj diris al li: "Via malsaĝeco nun rabis de mi la konsolon de miaj lastaj jaroj kaj la ĝojon de miaj okuloj. For de mi! mi forpelas vin por eterne de antaŭ mia vizaĝo; mi malbenas vin kaj viajn posteulojn; kaj ne pli frue ol tiam, kiam vi rekondukos al mi Fatme'on, via kapo liberiĝos de la malbeno de l' patro."

Tion mia malfeliĉa frato tute ne atendis. Jam antaŭe li firme decidis elserĉi sian fratinon kaj ŝian amikino: por tio li nur volis elpetegi al si la benon de la patro, kaj nun tiu ĉi forpelis lin, malbenitan, en la mondon. Tamen, kvankam granda jam estis lia aflikto, tiu ĉi nova malfeliĉo, kiun li ja ne meritis, plifortigis nun lian kuraĝon. Li iris al la kaptita korsaro kaj demandis lin, kien veturas lia ŝipo, kaj eksciis, ke ili komercas pri sklavoj kaj faras kutime grandan publikan sklavovendadon en Balsoro.

Kiam li revenis hejmen, por pretigi sin por la vojaĝo, la kolero de la patro ŝajnis iom kvietiĝinta, ĉar li sendis al li sakon da oro, kiel subtenon dum la vojaĝo. La gepatrojn de Zorajde — tiel nomiĝis lia forrabita fianĉino — Mustafa, plorante, adiaŭis; poste li ekforiris Balsoron. Li faris la vojaĝon surtere, ĉar de nia urbeto al Balsoro nenia ŝipo tiutempe veturis. Tial li devis fari tre streĉitajn tagvojojn, por alveni Balsoron ne tro longatempe post la korsaroj. Ĉar li havis bonan ĉevalon kaj nenian pakaĵon, li esperis atingi la urbon en la fino de la sesa tago. Sed en la vespero de la kvara tago, dum li tute sola rajdis sian vojon, surfalis lin subite tri viroj. Rimarkinte, ke ili estas bone armitaj kaj fortaj kaj ke ili celas lian monon kaj lian ĉevalon plivere ol lian vivon, li kriis al ili, ke li volas kapitulaci. Ili desaltis de siaj seloj, kunligis al li la piedojn sub la ventro de lia ĉevalo, kaj, metinte lin meze inter sin, dum unu el ili ekprenis lian bridon, ili ekfortrotis rapide, ne parolante eĉ unu vorton.

Mustafa fordonis sin al premanta malespero. Ŝajnis, ke jam nun plenumiĝis por la malfeliĉulo la malbeno de lia patro; ĉar kiel li povas esperi savi sian fratinon kaj Zorajde'on, se, senigita je ĉiuj rimedoj, li nenion povas doni, por ilin liberigi, krom sia mizera vivo? Mustafa kaj liaj senparolaj akompanantoj jam rajdis eble unu horon proksimume, kiam ili deturniĝis en malgrandan flankvaletan. La valetano estis ĉirkaŭborderita de altaj arboj. Mola, malpale verda herbejo, tra kies mezo rivereto fluis rapide, invitis al ripozo. Kaj efektive li ekvidis, starigitajn tie, dek kvin ĝis dudek tendojn. Al la palisetoj de l' tendoj estis ligitaj kameloj kaj belaj ĉevaloj; kaj el unu el la tendoj elsonis gajaj melodioj de citro kaj du belaj voĉoj de viroj. Al mia frato ŝajnis, kvazaŭ homoj, kiuj elektis tiel agrablan tendarejon, ne povus intenci kontraŭ li ion malbonan; tial li obeis sentime la ordonon de siaj kondukantoj, kiuj, disiginte liajn ligilojn, faris al li signon, ke li desaltu de ĉevalo. Oni kondukis lin en tendon pli grandan ol la ceteraj, belete, preskaŭ kokete ornamitan interne. Belegaj orbroditaj kusenoj, teksitaj tapiŝoj, oritaj incensuoj estus montrintaj aliloke riĉecon kaj komforton; sed ĉi tie ili ŝajnis nur kuraĝaĉa rabaĵo. Sur unu el la kusenoj sidis maljuna viro; lia vizaĝo estis malbela, lia haŭto nigre bruna kaj brilanta; kaj malloga trajto de malica ruzo ĉirkaŭ okuloj kaj buŝo faris malameginda lian vidiĝon. Kvankam ĉi tiu viro penadis donigi al si kiom eble da respekto, tamen Mustafa baldaŭ rimarkis, ke ne por li oni tiel riĉe ornamis la tendon; kaj la alparolmaniero de liaj kondukantoj ŝajnis lin pravigi en lia supozo. "Kie estas la Forta?" demandis ili la malgrandulon. "Li faras ĉaseton," respondis ĉi tiu; "sed li komisiis min okupi, kiel anstataŭanto, sian lokon." — "Ne saĝe li agis, tion farante," rediris unu el la rabistoj, "ĉar baldaŭ oni devos decidi, ĉu tiu ĉi hundo devas morti aŭ pagi; kaj tion scias la Forta pli bone ol vi."

La malgrandulo, kiu havis, laŭŝajne, deziron sin venĝi per bato, sin levis en la sento de sia indeco kaj elrektigis sin alten, por atingi per siaj fingropintoj la oreton de sia kontraŭulo. Sed vidante, ke liaj penoj restas senfruktaj, li komencis insulti; kaj vere, ĉiun lian malĝentilaĵon la aliaj plenvale repagis, ke la tuta tendo rebruegis de la interinsultado. Subite malfermiĝis la pordo de l' tendo, kaj enpaŝis altkreska majesta viro, juna kaj bela kiel princo de Perslando. Liaj vestoj kaj armiloj estis, esceptinte nur lian belegan sabron kaj lian riĉe ornamitan ponardon, neatentindaj kaj simplaj; sed lia severa rigardo, ja lia tuta teniĝo, kvankam neniel timigaj, inspiris respekton.

"Kiu ĝi estas, kiu kuraĝas ekmalpaci en mia tendo?" kriis li al la timigitaj apudestantoj. Dum kelkaj momentoj regis profunda silento; fine rakontis unu el tiuj, kiuj alvenigis Mustafan, kiel la afero okazis. Ĉe tio ruĝiĝis de kolero la vizaĝo de tiu, kiun oni nomis "la Forta." "Ĉu vi kredas, ke mi iam min lasus anstataŭiĝi de vi, Hasano?" kriis li, per terura voĉo, al la malgrandulo. Tiu ĉi kvazaŭ kuntiriĝis pro timo, tiel ke li ŝajnis eĉ multe pli malgranda ol antaŭe, kaj ekŝteliĝis al la elirejo de la tendo. Sed bontrafa piedekbato de la Forta igis lin, per granda neordinara salto, elflugi tra la pordo.

Kiam la hometo estis malaperinta, la tri viroj kondukis Mustafan antaŭ sian hetmanon, kiu jam sidigis sin sur la kusenoj. "Jen ni alvenigas tiun, kiun vi ordonis al ni kapti." La ĉefo longe observis la kaptiton; poste li parolis: "Baŝao de Suliejka! via propra konscienco ja diras al vi, kial vi nun staras antaŭ Orbasano." Aŭdinte tion, mia frato sin ĵetis antaŭ li genue kaj respondis: "Ho sinjoro! al mi ŝajnas, ke vi eraras; mizera malfeliĉulo mi ja estas, sed ne tiu baŝao, kiun vi serĉas!" Mirigis ĉi tiuj vortoj ĉiujn, kiuj estis en la tendo. Sed la sinjoro de la tendo parolis: "Ne multe utilos al vi viaj ŝajnmanovroj, ĉar mi tuj alkondukigos al vi personojn, kiuj vin bone rekonos." Li ordonis alkonduki Zulejman. Oni venigis en la tendon maljunan virinon, kiu, al la demando, ĉu ŝi ne rekonas en mia frato la Baŝaon de Suliejka, respondis: "Jes, ja! Kaj mi ĵuras per la tombo de l' Profeto, ĝi estas la baŝao kaj neniuj alia." — "Vidu nun, abomenulo, kiel vi vane estis ruza," ekparolis kolere la Forta. "Vi estas por mi tro malestiminda, por ke mi malpurigu per via sango mian bonan ponardon; sed al la vosto de mia ĉevalo mi alligos vin morgaŭ, kiam la suno leviĝos, kaj mi trarajdegos kun vi la arbarojn, ĝis ĝi subiros malantaŭ la montoj de Suliejka!" Nun ekperdis mia malfeliĉa frato la kuraĝon. "Tio estas la malbeno de mia kruela patro," ekkriis li, plorante; "jen ĝi alpelas min al malhonora morto; kaj ankaŭ vi estas perdita, dolĉa fratino, kaj vi, Zorajde!" — "Via ludaĉo nenion utilas al vi," diris unu el la rabistoj, ligante al li la manojn malantaŭ la dorso; "eliru tuj el la tendo, ĉar la Forta ekmordas la lipojn kaj rigardas al sia ponardo. Se vi volas travivi ankoraŭ unu nokton, venu!"

Ekforkondukante mian fraton, la rabistoj renkontis tri aliajn, antaŭenpelantajn kaptiton. Ili eniris kun li en la tendon. "Jen tiu baŝao, kiun ni nun venigas al vi laŭ via ordono," diris ili, kaj ili kondukis la kaptiton antaŭ la kusenon de la Forta. Kiam la kaptito estis tien kondukita, mia frato havis bonan okazon, por observi lin, kaj al li mem falis en la okulojn la simileco, kiun havis tiu homo kun li; nur lia barbo estis pli nigra, kaj pli bruna lia vizaĝo. Ŝajnis, ke la apero de la dua kaptito tre mirigis la Fortan. "Kiu el vi estas la ĝusta?" li demandis, rigardante jen mian fraton, jen la alian. "Se vi aludas la Baŝaon de Suliejka," respondis, per fiera tono, la kaptito, "tio estas ja mi!" Longe kaj fikse la Forta rigardis la baŝaon, per sia severa terura rigardo; poste, nenion dirante, li faris signon, ke oni konduku lin for. Kiam ĉi tio estis farita, li alproksimiĝis al mia frato, distranĉis ponarde liajn ligilojn kaj faris signon, ke li sidiĝu apud li sur la kuseno. "Mi estas vere afliktita, fremdulo," diris li, "ke mi prenis vin por tiu monstro, sed alskribu ĝin al stranga disono de l' ĉielo, kiu faligis vin en la manojn de miaj fratoj, en la horo mem, kiu estas dediĉita al la pereado de tiu kanajlo." Mia frato petis lin pri unu sola favoro: ke li permesu al li daŭrigi tuj lian vojaĝon, ĉar ĉiu prokrasto povas esti por li pereiga. La Forta informigis sin pri liaj urĝaj aferoj; kaj post kiam Mustafa ĉion rakontis al li, li konsilis al li pasigi ĉi tiun nokton en lia tendo; li kaj lia ĉevalo sendube bezonas ripozon; sed la morgaŭan tagon li montros al li vojon, kiu kondukos lin al Balsoro post unu kaj duono da tago. Mia frato konsentis, estis bonege regalita, kaj dormis trankvile ĝis la mateno en la tendo de l' rabisto.

Kiam li revekiĝis, li vidis sin tute sola en la tendo, sed antaŭ la kurteno li ekaŭdis kelkajn voĉojn kune parolantajn: ili ŝajnis aparteni al la sinjoro de l' tendo kaj al la malgranda nigrebruna vireto. Li subaŭskultis iome, kaj aŭdis, je sia konsternego, kiel la malgrandulo insiste postulas de la alia, ke li mortigu la fremdulon, ĉar, se li estos liberigita, li povos ilin ĉiujn perfidi.

Mustafa tuj rimarkis, ke la vireto portas koleron kontraŭ li, ĉar li estis la kaŭzo de tio, ke oni traktis lin hieraŭ tiel malbone. Dum kelkaj momentoj la Forta ŝajnis pripensi. "Ne," parolis li fine, "li estas mia gasto, kaj por mi la gastrajto estas sankta; krom tio, ŝajnas al mi, ke li ne havas tian mienon, kvazaŭ li volus nin perfidi."

Dirinte tion, li forŝovis la kurtenon kaj eniris en la tendon. "Pacon al vi, Mustafa," diris li; "ni gustumu la matenan trinkon; poste vi pretiĝu por la foriro." Li prezentis al mia frato pokalon da sorbedo kaj, kiam ili estis trinkintaj, ili bridis la ĉevalojn, kaj kun koro multe pli kuraĝa ol ĉe sia alveno Mustafa surĉevaliĝis. Ili baldaŭ preterrajdis la tendaron, kaj nun ili deturniĝis en larĝan vojon, kondukantan en la arbaron. La Forta rakontis al mia frato, ke tiu baŝao, kiun ili kaptis dum la ĉasado, promesis toleri, ke ili restu sendanĝere en lia regiono; sed antaŭ kelkaj semajnoj li kaptis unu el la plej bravaj de la bando kaj, post plej teruraj turmentegoj, lasis lin pendigi. Jam de longe li tenis lin sub spionado, kaj hodiaŭ li devas morti. Mustafa ne kuraĝis ion kontraŭdiri, ĉar li estas feliĉa, ke li mem saviĝis kun sendifekta haŭto.

Ĉe la eliro de la arbaro la Forta haltigis sian ĉevalon, priskribis al mia frato la vojon, etendis al li sian manon por adiaŭi, kaj parolis: "Mustafa, vi fariĝis, en stranga maniero, gasto de la rabisto Orbasano. Mi ne volas ordoni, ke vi nepre prisilentu, kion vi vidis kaj aŭdis. Kvankam senkulpa, vi elsuferis la antaŭtimon de l' morto, kaj mi ŝuldas al vi kompenson. Prenu, kiel memoraĵon, ĉi tiun ponardon; kaj kiam ajn vi bezonos helpon, ĝin sendu al mi, kaj mi rapidos por vin defendi. Eble ankaŭ ĉi tiu saketo utilos al vi por via vojaĝo." Mia frato dankis lin pro lia noblanimeco; li prenis la ponardon, sed la saketon li ne volis akcepti. Ankoraŭ unu fojon Orbasano premis al li la manon, faligis teren la saketon kaj ekforgalopis ventegorapide en la arbaron. Vidante, ke jam ne plu estas eble lin kuratingi, Mustafa desaltis de sia ĉevalo, por reeklevi la saketon, kaj ekmiregis pro la grandanimeco de sia gastiginto, ĉar la saketo enhavis multegon da oro. Li dankis Allah'on pro sia saviĝo, kaj rekomendinte al lia favorkoreco la noblan rabiston, li ekdaŭrigis gajakore sian vojon al Balsoro.

Leza silentiĝis kaj demande rigardis Aĥmet'on, la maljunan komerciston.

"Ne, se estas tiel," diris ĉi tiu, "volonte mi plibonigas mian juĝon pri Orbasano; ĉar vere, bele li agis kontraŭ via frato."

"Li agis kiel brava Islamano," ekkriis Mulej; "sed mi esperas, ke tio ne estas jam la fino de via rakonto, ĉar, se mi ne eraras, ni ĉiuj deziregas aŭdi plue, kio okazis al via frato, kaj ĉu li liberigis Fatme'on, vian fratinon, kaj la belan Zorajde'on."

"Se tio vin ne enuigas, mi volonte daŭrigos la rakonton," respondis Leza, "ĉar, efektive, la historio de mia frato estas aventuroplena kaj miriga."

Ĉe la tagmezo de la sepa tago post sia foriro, Mustafa enrajdis tra la pordego de Balsoro. Enirinte en karavanejon, li tuj demandis, kiam komenciĝos la sklavovendado, kiu ĉiujare fariĝas ĉi tie. Sed li ricevis la teruran respondon, ke li venas tro malfrue je du tagoj. Oni esprimis bedaŭron pro lia malfruiĝo kaj rakontis al li, ke li multe perdis, ĉar, en la plej lasta tago de l' vendado, alvenis du sklavinoj tiel superege belaj, ke ili altiris sur sin la rigardojn de ĉiuj aĉetantoj. Tiuj ĉi lastaj, oni diris, interbatiĝis kaj interdisŝiriĝis en plej bona maniero pro tiuj belulinoj, kiuj fine ja estis venditaj, sed por prezo tiel alta, ke nur ilia nuna sinjoro povis ĝin pagi. Mia frato informiĝis pli detale pri la sklavinoj kaj jam ne dubis plu, ke tio estas la samaj malfeliĉulinoj, kiujn li nun serĉas. Li eksciis plie, ke tiu, kiu ilin aĉetis, loĝas je kvardek horoj de Balsoro kaj nomiĝas Tiuli-Kos, eminenta, riĉa, sed jam iom maljuna viro, kiu en pasinta tempo estis Kapudan-baŝao⁷ de l' kalifo, sed nun estas eksiĝinta, por elripozi kun siaj amasigitaj riĉaĵoj.

Komence Mustafa volis tuj residiĝi sur sian ĉevalon, por rapidatingi Tiulin, kiu apenaŭ povis esti antaŭiĝinta eĉ je unutaga vojiro. Sed ekpensinte, ke li, solulo, neniel povas sukcesi kontraŭ tiu potenca vojaĝanto, nek rekapti de li lian akiron, li penis elpensi alian agmanieron, kaj baldaŭ li trovis ĝin. Lia maldistingiĝo je la Baŝao de Suliejka, — konfuzo, kiu siatempe minacis fariĝi por li tiel danĝera, — venigis al li la penson, eniri sub tiu nomo en la domon de Tiuli kaj tiumaniere riski unu ekprovon por liberigi la du malfeliĉajn knabinojn. Li do dungis kelke da servistoj kaj ĉevaloj, — por tio bonege utilis al li la mono de Orbasano, — havigis al si mem kaj al siaj servistoj belegajn vestojn, kaj ekvojiris al la kastelo de Tiuli. Post kvin tagoj li alvenis proksimen de tiu kastelo. Ĝi kuŝis sur bela ebenaĵo. De ĉiuj flankoj ĉirkaŭfermis ĝin altaj muroj, kiujn la konstruaĵoj nur tre malmulte superstaris. Alveninte tien, Mustafa kolorigis nigraj siajn harojn kaj sian barbon kaj ŝmiris sian vizaĝon per la suko de iu kreskaĵo, kiu donis al ĝi ĝuste tiun saman brunetan koloron, kiun havis la vizaĝo de l' Baŝao. Poste li sendis en la kastelon unu el siaj servistoj, kiu petis por li, en la nomo de l' Baŝao de Suliejka, pri nokta ripozejo. Baldaŭ revenis la servisto kun kvar bele vestitaj sklavoj, kiuj prenis per la brido la ĉevalon de Mustafa kaj kondukis sur la korton de l' kastelo. Tie ili helpis lin deĉevaliĝi, kaj kvar aliaj kondukis lin sur larĝa marmora ŝtuparo supren al Tiuli.

Tiu ĉi, maljuna gajhumora bravulo, akceptis mian fraton kun respekto kaj ordonis meti antaŭ li la plej bonan, kiun povis prepari lia kuiristo. Post la manĝo Mustafa iom

post iom igis la paroladon ektuŝi la novajn sklavojn, kaj Tiuli laŭdis ilian belecon, plendante nur pri tio, ke ili estas ĉiam tiel malĝojaj; tamen li kredis, ke tio baldaŭ forpasos. Tre ĝojigite pro ĉi tiu akcepto mia frato kuŝiĝis ripozi kun plej belaj esperoj. Li jam dormis eble unu horon proksimume, kiam revekis lin la brilo de lampo, kiu pikis blindige liajn okulojn. Li suprensidigis en la lito, sed kredis, ke li ankoraŭ sonĝas, ĉar antaŭ li staris tiu nigre-bruna hometo el la tendo de Orbasano, tenante lampon en la mano kaj distordante sian buŝaĉon en malagrablegan rideton. Mustafa ekpremetis al si la brakon kaj ŝirpinĉis la nazon, por sin konvinki, ĉu li vere maldormas; sed la aperaĵo restis kiel antaŭe. "Kion vi volas apud mia lito?" ekkriis Mustafa, rekonsciiĝinte el sia mirego. "Nu, ne tiel ekscitiĝu, sinjoro," parolis la hometo; "mi bone divenis, kial vi venis ĉi tien. Vian estimindan vizaĝon mi ankaŭ ne forgesis; tamen, por diri la veron, se mi ne estus, per mia propra mano, helpinta pendigi la Baŝaon, vi eble min trompus. Sed nun mi estas ĉi tie, por fari al vi demandon."

"Antaŭ ĉio diru, kiel vi ĉi tien venis," rediris al li Mustafa, kiu koleregis pro tio, ke li nun estas elperfidita. — "Tion mi ja tre volonte diros al vi," respondis la alia. "Ĉar mi ne povis plu vivi en bona interrilato kun la Forta, mi forkuris. Sed vi, Mustafa, estis en realeco la kaŭzo de nia malpaco, kaj tial vi devas doni al mi vian fratinon, kiel edzinon, rekompence de kio mi helpos vin ambaŭ forkuri. Se vi ŝin ne donos, mi iros al mia nova sinjoro kaj rakontos al li iom pri la nova Baŝao."

Mustafa freneziĝis de teruro kaj kolero. Nun, kiam li kredis, ke li certe atingis la celon de siaj deziroj, venis tiu mizerulo kaj ilin vanigis. Estis nur unu rimedo, kiu povus sukcesigi lian projekton: la malhometon li nepre devas mortigi. Per unu salto li do elĵetiĝis al li el la lito; sed lia malamiko, sendube antaŭvidinte ion similan, lasis fali la lampon, ke ĝi estingiĝis, kaj forkuregis en la mallumo, freneze kriante por helpo.

Nun estis tre kriza la situacio de Mustafa. La knabinojn li devis por tiu momento forlasi kaj prizorgi nur sian propran saviĝon. Li iris tial al la fenestro, por vidi, ĉu li ne povas tie trasalti. Ĝis la tero estis priatentinda profundo kaj kontraŭflanke staris alta muro, super kiun li devus grimpi. Dum li staris meditante ĉe la fenestro, subite li ekaŭdis multajn voĉojn, proksimiĝantajn al lia ĉambro. Ili jam atingis la pordon. Senespera, li nun ekkaptis sian ponardon kaj siajn vestojn kaj elsaltis tra la fenestro. La falo estis malfacila, sed li sentis, ke li ne rompis al si ian korpmembron; li do tuj releviĝis kaj kuris al la muro, kiu ĉirkaŭis la korton, ĝin suprenrampis, je la mirego de siaj persekutantoj, kaj baldaŭ sin trovis sur libera kamparo. Li daŭrigis kuri, ĝis li alvenis malgrandan arbaron, kie li ĵetis sin teren, ellacigita. Tie li pripensis, kion li devas fari. Siajn ĉevalojn kaj servistojn li devis forlasi; sed prosperis al li konservi sian monon, kiun li portis en sia zono. Baldaŭ montris al li lia elpensema kapo alian savrimedon. Li iris pluen en la arbaro, ĝis li alvenis vilaĝon, kie por malalta prezo li aĉetis ĉevalon, kiu baldaŭ lin portis en urbon. Tie li informiĝis pri kuracisto, kaj oni

rekomendis al li iun spertan maljunulon. Tiun ĉi, pere de kelke da oraj moneroj, li konsentigis konigi al li kuracilon, kiu kaŭzos mortsimilan dormon, tuj per dua rimedo reforigeblan. Akirinte tiun rimedon, li aĉetis longan artefaritan barbon, nigran talaron kaj ĉiuspecajn skatolojn kaj retortojn, tiel ke li povis bone prezenti vojaĝantan kuraciston, surŝarĝis siajn posedaĵojn sur azenon kaj ekvojaĝis returne en la kastelon de Tiuli-Kos. Li povis esti certa, ke tiuĉifoje oni lin ne rekonos, ĉar la barbo lin aliformigis ĝis tia grado, ke li ja apenaŭ rekonis sin mem. Alveninte ĉe Tiuli, li anoncigis sin kiel la kuraciston Ŝakamankabudibaba. Kiel li pensis, tiel okazis. La belega nomo tiel bone rekomendis lin al la maljuna malsaĝulo, ke tiu ĉi tuj invitis lin manĝi. Ŝakamankabudibaba aperis antaŭ Tiuli; kaj apenaŭ ili interparoladis unu plenan horon, la maljunulo decidis submeti ĉiujn siajn sklavinojn al la kuracado de l' saĝa medicinisto. Tiu ĉi apenaŭ povis kaŝi sian ĝojon, ke li nun revidos sian amatan fratinon: kaj kun frapanta koro li sekvis Tiulin, kiu kondukis lin en la serajlon. Ili venis en ĉambron bele ornamitan, sed en ĝi troviĝis neniue. "Kara doktoro Ŝambaba, aŭ kiel ajn vi estas nomata," parolis Tiuli-Kos, "rigardu atente la truon en tiu muro; tra tiu truo eletendos sian brakon ĉiu mia sklavino, kaj tiam vi povos ekzameni, ĉu la pulso estas malsana aŭ ne." Mustafa vane petegis kaj argumentis; permeson li ne ricevis por vidi la knabinojn; tamen ilia sinjoro konsentis diri al li, kiel ĉiu el ili kutimas farti. Nun eltiris Tiuli el sia zono longan paperaĵon kaj per laŭta voĉo eknomis unuope siajn sklavinojn. Ĉe ĉiu alvoko eletendiĝis tra la muro unu mano, kaj la kuracisto ekzamenis la pulson. Jam estis voĉe legitaj ses nomoj, kaj ĉiujn oni deklaris bonsanaj; kaj nun legis Tiuli, kiel sepan nomon, "Fatme," kaj malgranda blanka mano eliĝis tra la muro. Tremante de ĝojo, Mustafa ekkaptis ĝin kaj, kun serioza mieno, deklaris grave malsana. Tiuli tre maltrankviliĝis kaj ordonis al sia saĝa Ŝakamankabudibaba, rapide prepari kuracilon. La kuracisto eliris el la ĉambro kaj skribis sur papereton: "Fatme! mi volas vin savi; sed por tio necese estas, ke vi decidiĝu preni medikamenton, kiu faros vin dum du tagoj senviva! Tamen mi posedas rimedon, kiu redonos al vi la vivon. Se vi tion konsentas, diru nur, ke ĉi tiu trinkaĵo nenion helpis, kaj tio estos por mi signo, ke vi akceptas mian proponon."

Baldaŭ li revenis en la ĉambron, kie Tiuli atendis lin. Li kunportis trinketon ne malutilan, palpis ankoraŭ unufoje la pulson de l' malsana Fatme kaj ŝovis samtempe la papereton sub ŝian braceleto; la trinketon li transdonis al ŝi tra la aperturo en la muro. Tiuli ŝajnis tre maltrankvila pro Fatme kaj prokrastis ĝis pli oportuna tempo la ekzamenon de la ceteraj sklavinoj. Forlasinte, kune kun Mustafa, la ĉambron, li parolis per malĝoja tono: "Ŝadibaba, diru malkaŝe, kion vi pensas pri la malsano de Fatme?" Ŝakamankabudibaba respondis kun profunda ekĝemo: "Ho sinjoro, ke la Profeto donu al vi konsolon! Ŝi havas febron malrapidiran, kiu ja eble estos ŝia finiĝo." Ĉe tio ekflamis la kolero de Tiuli: "Kion vi diras, malbenita medicinista hundo? Ĉu ŝi, pro kiu mi elpagis du mil ormonerojn, devos mortaĉi kiel bovino? Sciuj, ke se vi ne sukcesos ŝin savi, mi dehakos al vi la kapon!" Nun mia frato ekkomprenis,

ke li agis mallerte, kaj penis redoni al Tiuli esperon. Dum ili tiel interparolis, venis el la serojlo nigra sklavo, por sciigi al la kuracisto, ke la trinketo nenion helpis. "Uzu vian tutan arton, Ŝakamdababelda, aŭ kiel ajn vi vin skribas; mi pagos al vi ĉion, kion vi postulos," kriis Tiuli-Kos, preskaŭ plorante pro timo, ke li perdos tiom da oro. "Mi donos al ŝi sukaĵeton, kiu liberigos ŝin de ĉia premego," respondis la kuracisto. "Jes, jes, donu al ŝi sukaĵeton," plorparolis la maljuna Tiuli. Plena de espero, Mustafa foriris serĉi sian dormigilon; kaj doninte ĝin al la nigra sklavo kaj klariginte kiom oni per unu fojo devas preni, li iris al Tiuli kaj diris, ke li devas ankoraŭ serĉi apud la lago iujn sanigajn herbojn. Dirinte tion, li elforrapidis tra la pordego. Apud la lago, kiu kuŝis ne malproksime de la kastelo, li demetis siajn falsajn vestojn kaj ĵetis en la akvon, ke ili gaje naĝis ĉirkaŭe; sin mem li kaŝis en la arbetaĵaro, atendis tie la nokton, kaj poste enŝteliĝis en la tombejon apud la kastelo de Tiuli.

Mustafa forestis eble apenaŭ unu horon el la kastelo, kiam oni alportis al Tiuli la sciigon, ke lia sklavino Fatme mortiĝas. Li forsendis servistojn al la lago, por tuj venigi la kuraciston, sed baldaŭ revenis solaj liaj senditoj kaj raportis, ke la malfeliĉa kuracisto falis en la akvon kaj dronis; oni povas vidi lian nigran talaron naĝantan en la lago; tie kaj ĉi tie elrigardetas ankaŭ el la ondoj lia majesta barbo. Jam ne esperante pri savo, Tiuli malbenis sin mem kaj la tutan mondon, elŝiris al si la barbon kaj ekkuris, kapantaŭen, kontraŭ la muron. Sed ĉio ĉi tio utilis nenion, ĉar Fatme baldaŭ ellasis la lastan spiron sub la manoj de la aliaj virinoj. Sciiginte pri ŝia morto, Tiuli ordonis, ke oni rapide faru ĉerkon, ĉar li ne povis toleri mortinton en la domo; kaj la kadavron li lasis forigi en la maŭzojeon. La portistoj alportis tien la ĉerkon, rapide metis ĝin teren kaj forkuris, ĉar ili ekaŭdis el inter la aliaj ĉerkoj ve-kriadon kaj ĝemegojn.

Mustafa, kiu kaŝis sin malantaŭ la ĉerkoj kaj de tie forkurigis la portistojn, elvenis nun el sia kaŝejo kaj eklumigis lampon, kiun li por tiu celo jam kunportis. Poste, ekpreninte boteleton, kiu enhavis la vekontan medikamenton, li levis la kovrilon de la ĉerko de Fatme. Sed kia teruro ekkaptis lin, kiam sin montris al li, ĉe la lumo de la lampo, trajtoj tute nekonataj! Nek mia fratino nek Zorajde, sed iu tute alia kuŝis en la ĉerko. Multe da tempo li bezonis, por reekregi sin post ĉi tiu nova bato de l' sorto; sed fine kompato venkis lian koleron. Li malŝtopis sian boteleton kaj verŝetis al ŝi la medikamenton inter la lipojn. Ŝi ekspiris, ekmalfermis la okulojn kaj ŝajnis longe pripensi, kie ŝi estas. Fine ŝi rememoris, kio okazis; sin levis el la ĉerko; kaj sin ĵetis al la piedoj de Mustafa. "Kiel mi povas vin danki, ho favorkora estaĵo," ŝi ekkriis, "ke vi savis min el mia terura mallibereco!" Mustafa interrompis ŝiajn dankesprimojn per la demando, kiel fariĝis, ke ŝi kaj ne Fatme, lia fratino, estas savita. Ŝi rigardis lin, mirigita. "Nun fine mi ekkomprenas mian saviĝon, kiu ĝis nun estis al mi neklarigebla," ŝi respondis; "sciu, ke en tiu kastelo oni nomis *min* Fatme, kaj al *mi* vi donis vian papereton kaj la savtrinkaĵon." Mia frato petegis la savitan knabinon, ke ŝi

donu al li sciigojn pri lia fratino kaj Zorajde; kaj li eksciis, ke ili ambaŭ sin trovas en la kastelo, sed jam ricevis, laŭ la kutimo de Tiuli, aliajn nomojn; ili nun estas nomataj Mirza kaj Nurmahal.

Vidante, ke mia frato tiagrade malĝojas pro ĉi tiu malsukceso, Fatme, la savita sklavino, ekpenis lin rekuraĝigi kaj promesis sciigi al li rimedon, por liberigi spite ĉio ambaŭ knabinojn. Revigligita de ĉi tiu penso, Mustafa elĉerpis novan esperon; li petis ŝin nomi tiun rimedon, kaj ŝi parolis: "Mi ja estas nur de kvin monatoj sklavino de Tiuli, tamen tuj de la komenco mi pripensis saviĝon, sed por mi sola ĝi estis tro malfacila. Sur la interna korto de l' kastelo vi sendube ekvidis puton, kiu elĵetas akvon el dek tubegoj; tiun puton mi ankaŭ rimarkis. Mi memoris, ke mi jam vidis en la domo de mia patro similan puton, kies akvo alfluadas tra vasta kondukilaro. Nu, kun la celo ekscii, ĉu ankaŭ ĉi tiu puto estas same konstruita, mi laŭdis unu tagon en ĉeesto de Tiuli ĝian belecon kaj demandis pri ĝia arĥitekturisto. 'Mi mem konstruis ĝin,' li respondis, 'kaj tio, kion vi vidas ĉi tie, estas la malplej rimarkinda; ĉar la akvo alvenas el rivereto je almenaŭ mil paŝoj de tie ĉi kaj trafluadas volbitan kondukilegon, kiu havas almenaŭ la alton de homo; kaj de ĉio ĉi tio mi mem faris la planon.' Aŭdintion, mi ofte deziris havi, nur dum unu momento, forton de viro, por povi ellevi unu el la ŝtonegoj el la flanko de l' puto; tiam mi povus forkuri, kien ajn mi nur volus. Mi do montros al vi nun la kondukilegon; vi povos penetri tra ĝi nokte en la kastelon kaj forsavi viajn amatojn. Sed almenaŭ du virojn vi devos havi kun vi, por superforti la sklavojn, kiuj nokte gardas la serajlon."

Tiel ŝi parolis. Mia frato, kvankam jam du fofojn lin trompis liaj esperoj, denove rekuraĝiĝis kaj esperis, kun helpo de Allah, plenumi la planon de l' sklavino. Li promesis al ŝi, ke li poste prizorgos ŝian forvenon en ŝian hejmon, se ŝi lin helpos penetri en la kastelon. Tamen faris al li zorgojn ankoraŭ jena pripenso: kie li povos trovi du — tri fidelajn helpontojn. Subite li ekpensis pri la ponardo de Orbasano kaj pri la promeso, kiun donis al li la rabisto, rapidi lin helpi, kie ajn li bezonus lin. Li do forlasis, kune kun Fatme, la tombejon, por iri serĉi la rabiston.

En la sama urbo, en kiu li sin ŝanĝis en kuraciston, li aĉetis per sia lasta mono ĉevalon kaj dungigis Fatme'on al malriĉa virino, kiu loĝis en la antaŭurbo. Li mem rapidis al la montaro, kie li la unuan fojon renkontis Orbasanon, kaj alvenis tien post tri tagoj. Baldaŭ li retrovis la tendaron kaj aperis neatendite antaŭ Orbasano, kiu lin amike bonvenigis. Li rakontis al li siajn malsukcesajn klopodojn, ĉe kio, de tempo al tempo, la seriozema Orbasano ne povis ne ridi iome, precipe kiam li image prezentis al si la kuraciston Ŝakamankabudibaba. Sed pri la perfido de la malgrandulo li tre koleriĝis, kaj ĵuris, ke li pendigos lin propramane, kie ajn li lin trovos. Al mia frato li certigis, ke li tuj estos preta lin helpi, kiam li antaŭe refortiĝos post la vojaĝo. Mustafa tial denove restis dum tiu nokto en la tendo de Orbasano; sed kun la unua matenruĝo ili ekforiris, kaj Orbasano kunprenis tri siajn plej kuraĝajn virojn, provizitajn per bonaj ĉevaloj kaj

armiloj. Ili rajdis rapide antaŭen kaj venis post du tagoj en la urbeton, kie Mustafa jam lasis la liberigitan Fatme'on. Kune kun ŝi, ili rajdis pluen de tiu urbeto ĝis la malgranda arbaro, de kie oni povis vidi la kastelon de Tiuli, ne malproksime kuŝantan. Tie ili ekkampis, por atendi la nokton. Kiam fariĝis mallume, ili tuj alŝteliĝis, kondukataj de Fatme, al la rivereto, kie estis la deirpunkto de la akvokondukilego; kaj baldaŭ ili ĉi tiun trovis. Fatme'on kaj unu serviston ili lasis tie starantajn kun la ĉevaloj kaj ekmalleviĝis en la kondukilegon; sed antaŭ ol ili eniris, Fatme ankoraŭ unufoje ĉion precize ripetis al ili, nome: ke ili venos tra la puto sur la internan korton de l' kastelo; tie estas en la dekstra kaj maldekstra anguloj du turoj; en la ĉambro malantaŭ la sesa pordo, se oni kalkulas de la dekstra turo, sin trovas Fatme kal Zorajde, gardataj de du nigraj sklavo. Bone provizitaj per armiloj kaj feraj leviloj, Mustafa, Orbasano kaj du aliaj malsupreniris en la akvokondukilon. Ili ja enakviĝis ĝis la zono; tamen ili energie trapuŝis sin antaŭen. Post duono da horo ili alvenis la puton mem kaj tuj enŝovis siajn levilojn. La muro estis dika kaj firma, sed al la kunigitaj fortoj de la kvar homoj ĝi ne povis longe kontraŭstari; ili baldaŭ enrompis truegon, sufiĉe grandan, por ke oni povu facile traŝoviĝi. Orbasano eniris la unuan kaj posthelpis la aliajn. Kiam ĉiuj sin trovis sur la korto, ili esploris la kontraŭan flankon de l' kastelo, por eltrovi la jam priskribitan pordon. Sed ili ne povis interkonsenti, pri kiu pordo ĝi estas, ĉar, kalkulante de la dekstra turo al la maldekstra, ili trovis pordon murfermitan kaj nun ne sciis, ĉu Fatme ĉi tiun preterforĝesis aŭ kunkalkulis. Sed ne longe pripensis Orbasano: "Ĉiun pordon malfermos al mi mia bona glavo," li ekkriis; li proksimiĝis al la sesa pordo, kaj la aliaj lin sekvis. Malferminte la pordon, ili trovis ses nigrajn sklavojn, kuŝantajn tere kaj dormantajn. Ili estis tuj retiriĝontaj senbrue, ĉar ili vidis, ke ili maltrafis la ĝustan pordon, kiam figuro sin levis en la angulo kaj, per bone konata voĉo, ekkriis por helpo. Ĝi estis la malgrandulo el la tendaro de Orbasano. Sed antaŭ ol la nigruloj plene konsciis, kio okazas, jen ĵetiĝis Orbasano al la malgrandulo, disŝiris je du pecoj lian zonon, fermŝtopis al li la buŝon kaj kunligis la manojn malantaŭ la dorso. Poste li sin turnis al la sklavo, el kiuj kelkaj estis jam duone ligitaj de Mustafa kaj la du aliaj, kaj helpis subigi ilin tute. Metinte al la sklavo ponardon kontraŭ la brusto, oni demandis ilin, kie estas Nurmahal kaj Mirza; kaj ili konfesis, ke ili estas en la apuda ĉambro. Mustafa kuregis en la ĉambron kaj trovis tie Fatme'on kaj Zorajde'on, kiujn jam vekis la bruado. Rapide la knabinoj kolektis siajn ornamaĵojn kaj vestaĵojn kaj sekvis Mustafan. Dume proponis la du rabistoj, ke oni ĉion forrabu, kion oni povus trovi; sed tion Orbasano malpermesis, dirante: "Oni neniam diru pri Orbasano, ke li eniris nokte la domojn, por ŝteli oron." Mustafa kaj la savitaj knabinoj malsupreniris rapide en la akvokondukilon, dum Orbasano promesis sekvi ilin baldaŭ. Sed, kune kun alia rabisto, li antaŭe kaptis la malgrandulon kaj elkondukis sur la korton; tie ili ligis ĉirkaŭ lia kolo silkan ŝnuron, kiun ili por tiu celo jam kunportis, kaj pendigis lin ĉe la plej alta supro de l' puto. Tiel puninte la perfidon de la mizerulo, ili ankaŭ siavice malsupreniris en la akvokondukiion kaj sekvis Mustafan. Kun larmoj dankis ambaŭ knabinoj sian noblan savinton Orbasano; sed tiu

ĉi instigis ilin forkuri kiel eble plej rapide, ĉar estas tre kredeble, ke Tiuli-Kos ilin persekutigos en ĉiujn direktojn. La sekvintan tagon Mustafa kaj liaj savitoj, profunde kortuŝitaj, disiĝis de Orbasano; vere! ili forgesos lin neniam. Fatme, la liberigita sklavino, iris alivestita al Balsoro, por tie enŝipiĝi al sia hejmo.

Post mallonga agrabla vojaĝo alvenis hejmen la miaj. Preskaŭ mortigis mian maljunan patron la ĝojo de la revido; en la tago sekvinta ilian alvenon li aranĝis grandan feston, en kiu partoprenis la tuta urbo. Antaŭ granda kunvenintaro de parencoj kaj amikoj, mia frato devis rakonti sian historion, kaj unuvoĉe ili laŭdis tiel lin kiel ankaŭ la noblan rabiston.

Kaj kiam li finis la rakonton, leviĝis mia patro kaj alkondukis al li Zorajde'on. "Tiel," li diris per solena voĉo, "de via kapo mi nun forigas la malbenon; ricevu, ĉi tiun knabinon, kiel batalakiritan rekompencan pro via senripoza agemeco; akceptu mian patran benon; kaj al nia urbo neniam manku viroj, kiuj similas al vi pri frata amo, prudento kaj fervoro."

Jam atingis la karavano la finon de la dezerto, kaj ĝoje la vojaĝantoj salutis la verdajn herbejojn kaj la folioriĉajn arbojn, kies ĉarma vidaĵo jam de multaj tagoj ne trafis iliajn okulojn. En bela valo kuŝis karavanejo, kiun ili elektis kiel noktan restadejon; kaj kvankam ĝi prezentis nur malmulte da komforto kaj refreŝigo, tamen la tuta vojaĝantaro estis pli gaja kaj interamikiĝema ol antaŭe, ĉar la penso, ke ili nun elsaviĝis el la danĝeroj kaj malagrablaĵoj, kiujn okazigas vojaĝo tra la dezerto, malfermis ĉiujn korojn kaj inklinitis ĉies spiriton al ŝercado kaj amuziĝado. Mulej, la juna gaja komercisto, dancis dancon ridigan, ĝin akompanante per kantoj, kiuj eĉ de la seriozema greko Zaleŭkos ellogis rideton. Sed, ne kontenta de tio, ke li gajigis siajn kunvojaĝantojn per ludo kaj danco, li volis ankaŭ rakonti al ili la historion, kiun li jam antaŭe promesis; kaj, iom mallaciĝinte post sia saltado, li ekparolis laŭjene: —

La Historio pri Malgranda Muk.

En Niceo, mia kara naskurbo, loĝis iam homo, kiun oni nomis Malgranda Muk. Kvankam mi estis tiam tre juna, mi ankoraŭ memoras lin bone, precipe pro tio, ke estas li, al kiu mi dankas la teruran bastonadon, per kiu regalis min foje mia patro. Kiam mi konatiĝis kun li, li estis jam grandaĝulo; tamen li havis nur tri aŭ kvar futojn da alto. Krom tio, li havis eksterajon tre strangan; ĉar lia korpo, kvankam malgranda kaj delikata, devis porti kapon multe pli grandan kaj pli dikan, ol la kapo de ordinara mortemulo. Li loĝis tute sola en granda domo: eĉ sian kuiradon li faradis propramane. Nur unu fojon en kvar semajnoj li iradis promeni; kaj nur la fuma kolonego, kiu ĉiutagmeze supreniris el lia kameno, sciigadis al liaj samurbanoj, ĉu li vivas aŭ mortis. Oni ofte lin vidis vespere tien

kaj reen irantan supre sur lia domo, kaj tiam, suprenrigardante de sur la strato, oni povis tre bone imagi al si, ke sola lia granda kapo ĉirkaŭkuradas sur la tegmento. Mi kaj miaj ludkamaradoj estis senkompataj buboj, kiuj ĝojis moki kaj kolerigeti aliajn; sekve, ĉiufoje kiam Malgranda Muk eliris promeni, tio estis por ni vera festokazo. En la difinita tago ni kolektiĝadis antaŭ lia domo, por tie atendi, ĝis li elvenos; kaj fine, kiam malfermiĝis la pordo kaj elrigardis unue la granda kapo kun la ankoraŭ pli granda turbano, kiam postvenis la cetera korpeto, vestita per eluzita manteleto, vasta pantalono kaj larĝa zono, ĉe kiu pendis longa ponardo, — tiel longa, ke oni ne sciis, ĉu Muk alkroĉiĝas al la ponardo aŭ la ponardo al Muk, — kiam li tiel eliris el la domo, ekbruis la aero pro nia ĝoja kriado, ni ĵetis supren niajn ĉapojn kaj ekdancis ĉirkaŭ li kiel frenezaj. Siavice, Malgranda Muk faris al ni seriozan kapsaluton kaj, per malrapidaj paŝoj, ekmarŝis tra la strato. Survoje li trenadis iom la piedojn, ĉar li surhavis grandajn, larĝajn pantoflojn, kiajn mi neniam vidis antaŭe. Ni infanoj kuradis post li, kriante senĉese: "Malgranda Muk, Malgranda Muk!" Ni ankaŭ havis gajan versaĵeton, kiun ni kantis iufoje pro lia honoro; jen ĝia teksto:

"Muk, Muk, Malgranda Muk!

Loĝas vi en granda domo;

Estas brava eta homo;

Unu fojon en monato

Promenadas sur la strato;

Grandkapulo, turnu vin!

Kuru, Muk, kaj kaptu nin!"

Tiamaniere ni jam ofte amuziĝis, kaj kun honto mi devas konfesi, ke la plej forte incitadis lin mi, ĉar ofte mi ektiris lin je lia manteleto, kaj foje mi de malantaŭe metis la piedon sur lian grandan pantoflon, ke li falis sur la vizaĝon. Unuamomente mi trovis tion ekstreme ridinda; sed ĉesis mia ridado, kiam mi rimarkis, ke Malgranda Muk sin direktas al la domo de mia patro. Kaj efektive, jen li tien eniris, kaj sufiĉe longan tempon li tie restis. Mi kaŝis min proksime de l' pordo, kaj vidis lin reeliri en akompano de mia patro, kiu tre respektoplene lin tenis je la mano kaj, multfoje kliniĝante, adiaŭis ĉe la pordo. Al mi estis ne tute trankvile en la koro, kaj longatempe mi restis en mia kaŝejo. Sed fine elpelis min la malsato, kiun mi timis multe pli, ol batojn; kaj humila, kun klinita kapo, mi aperis antaŭ mia patro. "Mi aŭdis, ke vi ofendis la bonan Muk'on," li parolis, per tono tre serioza; "nu, mi nun rakontos al vi la historion de tiu ĉi Muk, ĉar mi ne dubas, ke, kiam ĝi estos de vi konata, vi jam ne ridos lin plu. Sed antaŭ kaj post la rakonto vi devos ricevi la *kutiman*." La "kutima" estis dudek kvin batoj, kiujn li ĉiam tre kaj tre konscie el kalkuladis sur mia dorso. Li do prenis sian longan piptubon, deŝraŭbis ĝian sukcenan buŝpecon kaj prilaboris

min pli senindulge ol iam antaŭe. Kiam la dudek kvin estis plennombre pagitaj, li ordonis al mi atenti kaj ekrakontis la historion pri Malgranda Muk.

La patro de Malgranda Muk, kies ĝusta nomo estas Mukra, estis respektata, sed malriĉa homo, ĉi tie en Niceo. Li vivis preskaŭ tiel same ermite, kiel nuntempe lia filo. Tiun ĉi li tute ne amis, ĉar li hontis lian pigmean staturon, kaj tial li lasis lin pliaĝi en granda senscieco. Ankoraŭ en sia dek-sesa jaro Malgranda Muk estis facilanima infano; kaj la patro, homo serioza, ne ĉesis lin riproĉi, ke li, kiu jam de longe ne plu devus porti siajn ŝuojn de infano, estas ankoraŭ tiel naivega kaj malsprita.

Sed okazis foje, ke la maljunulo falis ie malsupren, sin tiel grave vundante, ke li baldaŭ poste mortis; kaj nun Malgranda Muk sin trovis sola en la mondo, senhava kaj senscia. La senkompataj parencoj, al kiuj la formortinto ŝuldis pli, ol kiom li povis repagi, forpelis la malfeliĉuleton el la domo kaj konsilis al li eliri en la mondon, por elserĉi sian feliĉon. Malgranda Muk respondis, ke li jam estas preta por la vojaĝo; kaj ĉar nenion plu li petis por si, krom la vestaro de l' patro, oni plenumis lian deziron. Lia patro estis altkreska kaj vastkorpa viro; sekve la vestoj tute ne almezuriĝis al la filo. Sed Muk baldaŭ elpensis rimedon: li detranĉis de la vestoj tiom da ŝtofo, por malpli*longigi* ilin laŭbezzone, kaj poste li ilin surmetis. Sed pri la same necesa malpli*largigo* li tute forgesis; kaj el tio rezultas tiu stranga vestaro, kiun oni ankoraŭ hodiaŭ povas vidi sur li; la granda turbano, la larĝa zono, la ampleksa pantalono, la blua manteleto, ĉio ĉi tio estas heredaĵoj de lia patro, kiujn li depost tiu tempo surportas ankoraŭ. Fine, alliginte al sia zono la longan Damaskan ponardon de l' patro kaj preninte bastoneton en la manon, li trapaŝis tra la pordego de la urbo kaj ekforiris "en la mondon."

Ĝoje li vojiris antaŭen la tutan tagon, ĉar ĉiuokaze li ja volis elserĉi sian feliĉon. Ĉiufoje kiam li ekvidis sur la tero vitropeceton, brilantan sub la sunaj radioj, li nepre eklevis ĝin kaj metis en sian poŝon, kredante, ke ĝi ŝanĝiĝos en plej belan diamanton. Ekvidinte en la malproksimo la kupolojn de moskeo, brilegantajn kiel fajro, aŭ lagon lum-reĵetantan kvazaŭ spegulo, li ekrapidis tien kun koro plena de ĝojo, ĉar li kredis, ke li venas en ensorĉitan landon. Sed ho ve! Malaperis tiuj trompobildoj, kiam li iom pli proksimiĝis; kaj baldaŭ tro baldaŭ rememorigis lin lia laceco kaj lia malsate doloranta stomako, ke li ankoraŭ sin trovas en lando de mortemuloj. Dum du tagoj li tiel vojaĝis, malsata kaj malĝoja, kaj jam li ekmalesperis trovi sian feliĉon. Kampaj fruktoj estis lia sola nutraĵo; la malmola tero — lia nokta kuŝejo. Fine, la trian tagon matene, li ekvidis de sur monteto grandan urbon. Sur ĝiaj muroj kaj turoj brilege lumis la kvaronluno, dum gajaspektaj flagoj flirtadis sur la tegmentoj kaj ŝajnis fari signon al Malgranda Muk, ke li alproksimiĝu. Mirigita, li haltis kaj longe rigardis la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn. "Jes," li diris al si mem, "tie Malgranda Muk trovos sian feliĉon, tie aŭ nenie"; kaj, malgraŭ sia laceco, li eksaltis de ĝojo. Li kolektis siajn

fortojn kaj ekiris pluen al la urbo. Sed kvankam ĝi ŝajnis tute proksima, li ne povis ĝin atingi antaŭ la tagmezo, ĉar liaj mallongaj kruretoj preskaŭ rifuzis lin porti, kaj ofte en la ombro de palmo li devis sidiĝi ripozi. Fine li alvenis antaŭ la pordegon. Li ordigis sian manteleton, pli bele ĉirkaŭligis la turbanon, pli larĝe alĝustigis la zonon kaj alkroĉis pli oblikve la longan ponardon; poste li forviŝis de sur siaj ŝuoj la polvon, prenis sian bastoneton en la manon kaj eniris kuraĝe tra la urba pordego.

Li jam trapasis kelke da stratoj, sed nenie malfermiĝis por li eĉ unu dompordo, nenie oni vokis laŭ lia espero: "Venu, Malgranda Muk! manĝu kaj trinku ĉe ni kaj ripozigu la etajn piedojn!"

Antaŭ granda bela domo li nun haltis kaj rigardis ĝin per sopiropplenaj okuloj, kiam malfermiĝis unu el la fenestroj kaj maljuna virino sin klinis eksteren kaj vokis, kvazaŭ kantante:

"Envenu, envenu,
Ni gaje festenu;
Bongusta la kaĉo;
Vi manĝos kun plaĉo;
Farita el gri', Kuirita por vi,
Najbaroj, la kaĉo atendas ĉe mi!"

La pordo de l' domo malfermiĝis, kaj Muk vidis eniri multegon da hundoj kaj katoj. Dum kelkaj momentoj li staris sendecide, ĉu li sekvu la inviton; sed fine li faris al si kuraĝon kaj eniris en la domon. Antaŭiris lin du katidoj, kaj ĉi tiujn li decidis sekvi, ĉar kredeble ili pli bone scias, ol li, kie estas la kuirejo.

Kiam li atingis la supron de l' ŝtuparo, renkontis lin tiu sama maljuna virino, kiun li jam vidis elrigardantan tra la fenestro. Ŝi rigardis lin tre malafable kaj demandis, kion li volas. "Vi ja ĉiun invitis al via kaĉo," respondis Malgranda Muk, "kaj ĉar mi estas tiom malsata, mi do venis." La maljunulino ekridis kaj diris: "De kie vi venas, stranga hometo? La tuta urbo scias, ke mi kuiradas por neniuj krom miaj karaj katoj; kaj kelkfoje, kiel vi vidas, mi invitas najbarojn kunmanĝi kun ili." Malgranda Muk rakontis al ŝi, kiel mizera estis lia vivo depost la morto de lia patro, kaj petis ŝian permeson fariĝi hodiaŭ tablogasto de l' katoj. La virino, al kiu tre plaĉis la nekaŝema rakonto de la simplanima Muk, konsentis, ke li sidiĝu ĉe ŝia tablo, kaj donis al li sate da manĝaĵo kaj trinkaĵo. Kiam li estis satiĝinta kaj refortiĝinta, ŝi longe observis lin kaj poste diris: "Malgranda Muk, restu ĉe mi en mia servo; vi havos nur malmulte da laboro, kaj mi regalos vin bone." Malgranda Muk, al kiu la kata kaĉo estis treege bongusta, akceptis la proponon kaj tuj fariĝis servisto de Sinjorino Ahavzi. La devoj de lia ofico estis facilaj sed neordinaraj. Sinjorino Ahavzi havis du katojn kaj kvar

katinojn. Al tiuj ĉi bestoj Malgranda Muk devis ĉiumatene kombi la felon kaj froti per bonodoraj oleoj; ĉiufoje kiam la mastrino eliris en la urbon, li devis zorgi pri la katoj; kiam ili volis tagmanĝi, li devis meti antaŭ ili la pladojn; kaj ĉiunokte li kuŝigis ilin sur silkaj kusenoj kaj ĉirkaŭvolvis per veluraj kovriloj. Plie, estis en la domo kelke da malgrandaj hundoj, al kiuj li devis servadi; sed tiuj ĉi postulis malpli da priatentado, ol la katoj, kiujn Sinjorino Ahavzi traktadis kiel proprajn infanojn. Cetere, Malgranda Muk vivis tute same solece, kiel en la domo de sia patro, ĉar, krom la mastrino, li vidis dum la tuta tago nur hundojn kaj katojn. Dum kelka tempo estis al li tre bone en la nova hejmo; ĉiam li havis plene da manĝaĵo kaj malmulte da laboro, kaj la maljunulino ŝajnis tute kontenta pri li. Sed iom post iom la katoj fariĝis malbonkonduktaj: kiam la maljunulino forestis el la domo, ili ĉirkaŭsaltadis en la ĉambro kiel frenezaj, disĵetadis ĉion, kio baris al ili la vojon, kaj disrompis multe da belaj vazoj. Sed tuj, kiam ili ekaŭdis sian mastrinon suprenvenantan sur la ŝtuparo, ili forrampadis sur siajn kusenojn kaj svingadis la voston, kvazaŭ nenio okazis. Sinjorino Ahavzi koleriĝadis, kiam ŝi vidis sian ĉambron tiel ruinigita, kaj kulpigadis Muk'on pri ĉio; li tiam vane asertis sian senkulpecon: al siaj katoj, kiuj ja havis mienon tiel senpekan, ŝi kredis pli, ol al sia servisto.

Tre malĝoja pro tio, ke ankaŭ ĉi tie li ne trovis sian feliĉon, Malgranda Muk decidis ekŝiĝi el la servo de Sinjorino Ahavzi. Sed ĉar la sperto instruis al li, jam dum lia unua vojaĝo, kiel malfacile estas vivi sen mono, li nun ekpensis, per kia rimedo li povas havigi al si la salajron, kiun ĉiam lia mastrino al li promesis, sed neniam donis. En la domo de Sinjorino Ahavzi estis ĉambro, kiu ĉiam restis ŝlosita, kaj kies internon li neniam vidis, kvankam li jam ofte aŭdis la virinon ĉirkaŭbruadi malantaŭ la pordo. Multe li donus por tio, se li povus ekscii, kion ŝi tenas tie kaŝita; kaj nun, dum li pensis pri sia vojaĝa mono, venis al li en la kapon, ke eble tie troviĝas kaŝitaj la trezoroj de l' virino. Sed ĉiam la pordo restis ŝlosita, kaj estis al li neeble atingi la trezorojn.

Foje, matene, kiam Sinjorino Ahavzi estis elirinta, unu el la hundetoj, kiun ŝi ĉiam duonpatrine traktadis, sed kies favoron Malgranda Muk plejaltgrade akiris al si per ĉiuspecaj amservoj, kaptis lin je lia vasta pantalono kaj forte tiradis, kvazaŭ por diri, ke Muk ĝin sekvu. Muk, kiu amis ludi kun la hundeto, sekvis ĝin; kaj jen kondukis lin la hundeto en la dormoĉambreton de Sinjorino Ahavzi kaj antaŭ malgrandan pordon, kiun li tie neniam vidis antaŭe. La pordo estis duone malfermita. La hundeto eniris, kaj Muk ĝin sekvis. Miris kaj ĝojis la malgrandulo, sin trovante nun en la ĉambro, kiu jam de longe estis la celo de liaj deziroj. Li esploris ĝin de ĉiuj flankoj, esperante trovi monon, sed trovis nenion krom malnovaj vestaĵoj kaj vazoj strange formitaj. Unu el ĉi tiuj vazoj kaptis lian apartan atenton. Ĝi estis el kristalo, kun belaj entranĉitaj figuraĵoj. Li ekleviis ĝin kaj turnadis en ĉiuj direktoj. Sed, ho teruro! Li ne rimarkis, ke

ĝi havas kovrilon nur malfirme surmetitan. La kovrilo defalis sur la plankon kaj disrompiĝis je milo da pecetoj.

Dum longa tempo Malgranda Muk staris tie, kvazaŭ senviva de teruro. Nun lia sorto estis decidita; nun li nepre devis forkuri, alie la maljunulino lin certe batus ĝismorte. Li do decidis komenci senprokraste la vojaĝon, sed antaŭe li ĉirkaŭrigardis ankoraŭ unu fojon, ĉu ne utilis al li dum lia marŝado tiu aŭ alia havaĵo de Sinjorino Ahavzi. Subite renkontis liajn okulojn paro da grandegaj pantofloj; verdire, ili tute ne estis belaj; sed liaj propraj ŝuoj jam ne povis plu vojaĝi; kaj, krom tio, allogis lin tiuj pantoflegoj ĝuste pro sia grandeco, ĉar se li ilin surhavirus, espereble vidus el tio ĉiuj lin rigardantaj, ke li jam ne portas plu siajn ŝuojn de infano! Siajn proprajn pantofletojn li do rapide demetis kaj surmetis la grandajn. Poste, ekvidinte en angulo promenadan bastoneton kun bele skulptita leonokapo, kaj opiniante, ke ĝi tie ne havas sufiĉe por fari, li ankaŭ ĉi tion proprigis al si, kaj forrapidis el la ĉambro. Li tuj kuris en sian propran ĉambreton, surmetis sian manteleton kaj la patrodevenan turbanon, alkroĉis al sia zono la ponardon kaj, kiel eble plej rapide, elkuris el la domo kaj for el la urbo. Lia timo antaŭ la maljunulino igis lin kuri kaj kuri, ĝis liaj fortoj preskaŭ finiĝis. Antaŭe neniam li kuris tiel rapide; eĉ ŝajnis al li, kvazaŭ li ne povas ĉesi kuri, kvazaŭ nevidebla potenco peladas lin pluen. Fine venis al li la penso, ke sendube la pantofloj havas ian specialecon, ĉar ili ĵetegis sin senhalte antaŭen, lin kunfortrenante. Per ĉiuj eblaj rimedoj li penis haltigi ilin; sed nenio helpis, ĝis fine, en terura korpremiĝo, li kriis al si mem, kvazaŭ al ĉevalo; "Pru! halt! pru-u-u!" Nun haltis tuj la pantofloj, kaj Muk sin ĵetis, ellaciĝinta, sur la teron.

La pantofloj ĝojigis lin treege; ĉar nun ja fine li akiris al si, per siaj servoj, ion, kio povas utili al li en la mondo, por trovi lian feliĉon. Sed, malgraŭ sia ĝojo, li endormiĝis pro laceco; ĉar la korpeto de Malgranda Muk, pro la peza kapo, kiun ĉiam ĝi devis kunporti, ne povis multe elteni. Dum li dormis, aperis al li en sonĝo la sama hundeto, kiu, en la domo de Sinjorino Ahavzi, helpis lin akiri la pantoflojn, kaj parolis: "Kara Muk, vi ankoraŭ ne bone komprenas la uzadon de viaj pantofloj. Sciu, ke se vi vin turnos en ili tri fojojn sur la kalkanumo, vi povos flugi, kien ajn vi nur volos. Kaj per la bastoneto vi povas trovi trezorojn, ĉar ĉie, kie oro estas enterigita, ĝi frapos trifoje la teron; por arĝento, dufoje." Tiel sonĝis Malgranda Muk. Revekiĝinte, li pripensis la mirigan sonĝon kaj decidis ekprovi la aferon. Li surmetis la pantoflojn, levis unu piedon kaj komencis sin turni sur la kalkanumo. Sed kiu iam provis plenumi ĉi tiun lertaĵon trifoje intersekve en gigante vasta pantoflo, tiu ne miros pro tio, ke Malgranda Muk ne tuj sukcesis, precipe konsiderante, ke lia peza kapo transklinis lin jen sur unu flankon, jen sur la alian.

Kelke da fojoj la kompatindulo falis forte sur la nazon; tamen li ne lasis sin senkuraĝigi, sed ripetis la provon, ĝis li fine sukcesis. Kiel rado li turniĝis sur sia kalkanumo, ekdeziris sin en la plej proksiman urbon, kaj — ekveturis la pantofloj

supren en la aeron, kuregis ventorapide tra la nuboj, kaj antaŭ ol Malgranda Muk povis konscii, kio fariĝas kun li, li jam sin trovis sur granda foirejo, kie staris multe da budoj kaj sennombraj multokupataj homoj iradis tien kaj reen. Komence li iom promenis tra tiu ĉi popolamaso; sed baldaŭ li trovis ĝin pli konsilinda, sin direkti en straton malpli movoplenan, ĉar sur la foirejo oni piedpremis liajn pantoflojn, ke li ofte falŝanceliĝis, kaj nur kun granda peno prosperis al li eviti la batojn de tiu aŭ alia, kun kiu kunpuŝiĝis lia elstareganta ponardo.

Nun Malgranda Muk serioze pripensis kion fari, por enspezi iom da mono. Li ja havis bastoneton, kiu malkovrus al li sekretajn trezorojn; sed kie li trovos la lokon, kie kuŝas subtere oro kaj arĝento? En okazo de bezono li povus sin montri ekspozicie, por sin riĉigi je kelke da groŝoj; sed por tio li ja estis tro fiera. Fine li rememorigis al si la rapidecon de siaj piedoj. Eble, li diris al si en la pensoj, miaj pantofloj povos subteni mian vivon; kaj li decidis dungigi sin kiel kurieron. Esperante, ke plej bone pagus tiajn servojn la reĝo de la urbo, li demandis pri la vojo al la palaco. Antaŭ la pordo de l' palaco estis gardostaranto, kiu demandis lin, kion li serĉas ĉi tie. Je lia respondo, ke li serĉas oficon, oni kondukis lin al la estro de la sklavoj. Al tiu ĉi lasta li sciigis sian deziron kaj petis lin, ke li havigu al li oficon inter la reĝaj kurieroj. La sklavestro mezuris lin per sia rigardo de la kapo ĝis la piedoj kaj parolis: "Kiel? Kun tiaj piedetoj, kiuj havas apenaŭ la longon eĉ de unu manstreĉo, vi volas esti reĝa kuriero? For de ĉi tie! Kun tiaj malsaĝuloj mi ne havas tempon por ŝerci." Malgranda Muk certigis lin, ke li parolis tute serioze, kaj ke li estas preta fari konkurskuron kontraŭ la plej rapidpieda kuriero. La sklavestro trovis la aferon treege ridinda; tamen li ordonis, ke li tenu sin prete vetkuri jam antaŭ la vespero, kondukis lin en la kuirejon kaj zorgis, ke oni donu al li sufiĉe da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Li mem iris al la reĝo kaj rakontis al li pri la malgranda homo kaj lia propono. La reĝo estis gajhumora sinjoro kaj ĝojis multe, ke la sklavestro retenis Malgrandan Muk'on por celo de amuzo. Li ordonis al li, ke li faru sur granda herbejo malantaŭ la palaco la necesajn aranĝojn, por ke la tuta kortego povu bone kaj komforte rigardi la kuradon; kaj denove li admonis, ke oni bone regalu la hometon. La reĝo rakontis al siaj princoj kaj princinoj, kian spektaklon ili havos hodiaŭ vespere. Tiuj ĉi rerakontis ĝin al siaj servistoj; kaj kiam alproksimiĝis la vespero, regis ĉe la kortego kaj en la urbo plej ĝoja ekscito kaj ĉiuj, kvazaŭ torento, direktiĝis amase al la herbejo, kie oni jam starigis tribunojn, por vidi kuradi la fanfaroneman hometon.

Kiam la reĝo kaj liaj filoj kaj filinoj sidiĝis sur la tribuno, Malgranda Muk elpaŝis sur la herbejon kaj faris antaŭ la geeminentuloj treege gracian riverencon. Ĝojokrioj eksonis de ĉiuj flankoj, kiam la malgrandulo aperis: tian strangan figuron oni tie neniam vidis antaŭe. La korpeto kun la giganta kapo, la manteleto kaj la vasta pantalono, la longa ponardo en la larĝa zono, la malgrandaj piedetoj en la grandegaj pantofloj — vere, ĉio tio aspektis tro komike, por ke oni ne eksplodu per rido. Tamen

Malgranda Muk ne lasis sin konfuzi per ilia ridado. Li stariĝis tie fiere, apogante sin sur sia bastoneto, kaj atendis sian kontraŭulon. La sklavestro jam elektis, laŭ la deziro de Muk mem, la plej rapidpiedan el la reĝaj kuristoj. Tiu ĉi fine elpaŝis, stariĝis flanke de l' malgrandulo, kaj ambaŭ atendis la signalon. Nun, laŭaranĝe, eksvingis Reĝidino Amarza sian vualon, kaj, kvazaŭ du sagoj, forpafitaj al la sama celo, ekflugis ambaŭ vetkurantoj tra la herbejo.

Tuj ĉe la komenco la reĝa kuristo antaŭiĝis je sufiĉe granda interspaco, sed Muk lin sekvis ĉaskurege per siaj pantoflo-kuriloj, atingis lin, preterpasis, kaj jam de longe staris ĉe la celo, kiam la alia, senspira, alvenis. Kvazaŭ glaciiginte pro miro, la rigardantoj silentis dum kelkaj momentoj; sed kiam unua la reĝo ekplaŭdis per la manoj, hurais la popola amaso kaj ĉiuj ekkriis: "Vivu la venkinto de l' vetkuro! Vivu Malgranda Muk!"

Dume oni alkondukis Malgrandan Muk'on, kiu ĵetis sin teren antaŭ la reĝo kaj parolis: "Plejpotenca reĝo! nur malgrandan prezenton de mia arto mi ĵus faris; volu nun favore permesi, ke oni donu al mi oficon inter viaj kurieroj." — "Ne," respondis al li la reĝo, "vi estos mia korpokuristo kaj plej intima servisto, kara Muk; cent ormonerojn vi ĉiujare ricevos kiel salajron; kaj ĉe la tablo de miaj plej altaj servistoj vi manĝos."

Nun kredis nia Muk, ke fine li ja trovis la tiel longe serĉitan feliĉon, kaj ĝoje kaj gaje estis al li en la koro. Krom tio, li ĝuis la apartan favoron de la reĝo, ĉar tiu ĉi konfidadis al li siajn plej urgajn kaj sekretajn komisiojn, kiujn Muk plenumadis kun plej perfekta precizeco kaj neimagebla rapideco.

Tamen tute ne amis lin la ceteraj servistoj de l' reĝo; ili koleradis pro tio, ke hometo, kiu ja taŭgas por nenio krom rapida kurado, arogas al si sola la favoron de ilia sinjoro. Tial ili organizis kontraŭ li multe da konspiroj; sed ĉiuj ĉi konspiroj malsukcesis kaŭze de l' granda konfido, kiun havis la reĝo al sia *Sekreta Ĉef-Korpokuristo* (ja: eĉ ĝis ĉi tiu alta rango li sin levis en tiel malmulte da tempo!).

Muk, kiu bone rimarkis, ke oni agitadas kontraŭ li, tute ne volis sin venĝi; por tio li ja estis tro bonkora; kontraŭe, li pripensis rimedojn, por fariĝi amata de siaj malamikoj kaj necesega por ili. Fine li rememorigis al si sian bastoneton, pri kiu en sia feliĉo li jam ne pensis plu; se li trovos trezorojn, li diris al si en la pensoj, la sinjoroj ja tiam eksentos por li iom pli da inkolino. Jam ofte li aŭdis, ke la patro de l' nuna reĝo enterigis multajn el siaj trezoroj, kiam la malamikoj enfalis en lian landon: oni ankaŭ diris, ke li en tiu tempo mortis, ne povinte sciigi al sia filo sian sekreton. De nun Malgranda Muk kunportis ĉiam kaj ĉie sian bastoneton, esperante, ke iafoje li preterpasos la lokon, kie la mono de l' mortinta reĝo estas enterigita. Unu vesperon, okaze veninte en malproksiman parton de l' palaca ĝardeno, kiun li malofte vizitadis, subite li sentis, kiel la bastoneto en lia mano ekmoviĝas. Tri fojojn ĝi frapis la teron.

Nun li eltiris sian ponardon, faris kelke da signoj en la arbojn ĉirkaŭstarantajn kaj reenŝteliĝis en la palacon. Tie li havigis al si fosilon, kaj, atendinte la nokton, li eliris, dum favorkovris lin la mallumo, plenumi sian entreprenon.

Sed la elfosado de l' trezoro faris al Muk pli da klopodo, ol kiom li atendis. Liaj brakoj estis ja multe tro malfortaj, sed granda kaj peza lia fosilo; kaj ĉirkaŭ du horojn li devis labori, por fari fosaĵon nur du-tri futojn profundan. Fine lia fosilo ekfrapis ion malmolan, kiu eksonis kiel fero. Ĉe tio li fosis ankoraŭ pli diligente, kaj baldaŭ li elterigis grandan feran kovrilon. Malsuprenirinte en la fosaĵon, por vidi, kio kuŝis sub la kovrilo, li trovis grandan urnon plenplenan de oraj moneroj. Sed ĉar liaj malgrandaj fortoj tute ne sufiĉis por suprenlevi la urnon, li do metis en sian pantalonon kaj en sian zonon nur tiom da moneroj, kiom li povis porti, kaj ankaŭ sian manteleton li plenigis per oro. Poste, li zorge rekovris la urnon kaj surŝarĝis sur sian dorson la plenigitan manteleton. Sed vere, sen tio, ke li havis sur siaj piedoj la famajn pantoflojn, li neniam formoviĝus de la loko, ĉar terure premegis lin la ŝarĝo de la oro. Tamen li sukcesis atingi nerimarkite sian ĉambron kaj kaŝis tie sian oron sub la kusenojn de sia kanapo.

Kiam Malgranda Muk sin vidis posedanto de tiom da oro, li kredis, ke nun ja ĉio ŝanĝiĝos, kaj ke li akiros al si el inter siaj kortegaj malamikoj multe da protektantoj kaj sindonaj servantoj. Sed ĝuste el tio estas videble, ke la bona Muk certe ne estis tro zorge edukita, alie li ja ne imagus al si, ke pere de oro li povos akiri amikojn. Ho ve! kiom pli saĝe li estus tiutempe farinta, bone ŝmirante siajn pantoflojn kaj tuj forkurante kun sia manteleto plena de oro!

La oro, kiun de nun Malgranda Muk plenmane disdonadis, vekis ĉe la kortegaj servistoj nur envion. La kuirejestro Ahuli diris: "Li estas falsmoneristo." La sklavestro Aĥmet diris: "Li ĝin flatakiris de la reĝo." Sed Arĥaz, la reĝa kasisto, lia morta malamiko, kiu mem de tempo al tempo enmetis la manon en la kason de sia sinjoro, diris sen ĉirkaŭfrazo: "Li ja ŝtelis ĝin." Por havi certecon pri la afero, ili nun interkonsiliĝis; kaj la ĉeftrinkaĵoverŝisto Korĥuz aperis unu tagon, kun mieno tre malĝoja, antaŭ la okuloj de l' reĝo. Li tiel trudmontradis sian melankolian teniĝon, ke la reĝo demandis lin, kio al li estas. "Ho ve!" li respondis, "mi malĝojas, ke mi perdis la favoron de mia sinjoro." — "Kion vi fablas, amiko Korĥuz?" rediris al li la reĝo. "De kiam mi plu ne lasas lumi sur vi la sunon de mia favoro?" La ĉeftrinkaĵoverŝisto respondis, ke li ja superŝutas per oro la sekretan ĉefkorpokuriston, sed al siaj malfeliĉaj fidelaj servistoj li donas nenion. Tre mirigis la reĝon ĉi tiu sciigo. Oni rakontis al li pri la ordisdonadoj de Malgranda Muk, kaj senpene la konspirantoj vekis ĉe li la suspekton, ke Muk forŝtelis iel la monon el la kasejo. Multe ĝojis la ĉefkasisto, ke la afero prenis ĉi tiun turniĝon; ĉar en ĉiu okazo li tute ne amis fari kalkulon pri la stato de l' kaso. La reĝo donis ordonon, sekrete observadi ĉiujn movojn de Malgranda Muk, por lin kapti, se eble, ĉe plena farado.

Ĝuste en la nokto, kiu sekvis tiun malfeliĉan tagon, Malgranda Muk, rimarkinte ke lia disdonacemo preskaŭ remalplenigis lian kason, sin armis per sia fosilo kaj enŝteliĝis en la palacan ĝardenon, por preni tie el sia sekreta trezoro novan provizon da mono. En sufiĉe granda distanco sekvis lin la spionoj, kondukataj de la kuirejestro Ahuli kaj la ĉefkasisto Arĥaz; kaj, en la momento, kiam li komencis transmeti la oron el la urno en sian manteleton, ili sin ĵetis sur lin, kunkatenis al li la manojn kaj tuj kondukis lin antaŭ la reĝon. Kompreneble, ĉi tiu interrompo de lia dormado jam metis lian reĝan moŝton en tre malbonan humoron; li do akceptis tre malfavore sian malfeliĉan sekretan ĉefkorpokuriston kaj ordonis, ke la juĝa esploro senprokraste komenciĝu. Oni jam elterigis la urnon kaj metis, kune kun la fosilo kaj la plenigita per oro manteleto, ĉe la piedoj de la reĝo. La ĉefkasisto atestis, ke li kaj liaj observistoj surprizis Muk'on en la momento, kiam li tiun ĉi urnon kun ĝia ora enhavo enfosis en la teron.

Ĉe tio ĉi la reĝo demandis la kulpigiton, ĉu tio estas vera, kaj de kie li ricevis la oron, kiun li tiel enterigis. Malgranda Muk, en la sento de sia senkulpeco, certigis, ke li trovis la urnon en la ĝardeno, kaj ke li tute ne volis ĝin *en* sed nur *el*-terigi.

Ekridis ĉiuj alestantoj pri ĉi tiu senkulpiĝo, sed la reĝo furioze koleriĝis pri la supozata senhonteco de la malgrandulo. "Kio, abomenulo!" ekkriis li; "ĉu ankaŭ trompmensogi vi volas, malsprite kaj senhonte trompmensogi al via reĝo, kiun vi jam priŝtelis? Ĉefkasisto Arĥaz, mi ordonas al vi diri, ĉu vi rekonas, en ĉi tiu sumo da oro, tiun saman, kiu mankas en mia trezorejo."

La ĉefkasisto respondis, ke li havas absolutan certecon pri la afero: jam de kelka tempo mankas en la reĝa kaso eĉ pli multe da oro, kaj li povas ĵure atesti, ke tio ĉi estas la sumo ŝtelita.

Nun la reĝo ordonis forte kateni Malgrandan Muk'on kaj ĵeti en la turon; kaj al la ĉefkasisto li transdonis la oron, por ke li ĝin remetitu en la reĝan trezorejon. Ĝojanta, ke la afero tiel bone finiĝis, la ĉefkasisto foriris kaj elkalkulis hejme la brilantajn orajn monerojn; sed neniam la malnoblulo raportis, ke malsupre en la urno kuŝis papereto, sur kiu estis skribita:

"La malamikoj penetris en mian landon; tial mi kaŝis ĉi tie parton de miaj trezoroj; kiu ajn ĝin trovos, sur tiun falu la malbeno de lia reĝo, se li ne tuj transdonos ĝin al mia filo. — Reĝo Sadi."

Sidante en sia karcero, Malgranda Muk profundigis en malĝoja medito. Li sciis, ke per morto oni punas tiun, kiu ŝtelis reĝajn proprecojn, kaj tamen li ne volis malkovri al la reĝo la sekreton pri la bastoneto, ĉar li prave timis, ke oni tiam forprenos de li ne sole la bastoneton, sed eble eĉ liajn pantoflojn. Ankaŭ tiuj ĉi lastaj ne povis nun multe

utili al li, ĉar fortaj ĉenoj tenis lin firme al la muro, kaj, kiom ajn li penadis, estis al li neeble sin turni sur la kalkanumo. Sed kiam, la morgaŭan tagon, oni sciigis al li, ke li estas kondamnita al morto, li ekopiniis, ke fine pli bone estas vivi sen ia magia vergeto, ol morti, tion havante; kaj tial li petigis de la reĝo privatan aŭdiencon kaj malkaŝis al li la sekreton. En la komenco la reĝo ne volis kredi al lia konfeso; sed Malgranda Muk promesis fari provprezentadon de sia arto, kondiĉe ke la reĝo konsentu, ke li ne estu mortigita. La reĝo donis al li sian vorton de honoro; kaj, dum Muk ne vidis tion, li lasis enterigi iom da oro kaj poste ordonis al la malgrandulo ĝin serĉi. Post malmulte da momentoj li jam ĝin trovis, ĉar klare la bastoneto frapis trifoje la teron. Nun ekkonvinkiĝis la reĝo, ke lia ĉefkasisto lin trompis; kaj li sendis al li, laŭ orientlanda kutimo, silkan ŝnuron, por ke li sufoku sin mem. Kaj al Malgranda Muk li diris: "Mi ja promesis al vi vian vivon, sed ĉar al mi ŝajnis, ke vi havas ankoraŭ aliajn sekretojn, vi do restos en ĝismorta mallibereco, se vi ne konsentos klarigi, kiamaniere vi kuras tiel rapide." Malgranda Muk, kiu jam pasigis unu nokton en la turo kaj tial perdis ĉiun deziron al plua mallibereco, konfesis, ke lia tuta arto kuŝas en liaj pantofloj; tamen li ne instruis al la reĝo la sekreton pri la trifoja turniĝo sur la kalkanumo. Nun ankaŭ la reĝo surmetis la pantoflojn, por fari la provon, kaj kiel freneza li ĉirkaŭkuregis en la ĝardeno. Ofte li provis haltigi la pantoflojn, sed vane; kaj Malgranda Muk, kiu ne povis rifuzi al si mem ĉi tiun venĝeton, lasis lin kuri kaj kuri, ĝis li falis teren sveninta.

Kiam li rekonsciiĝis, la reĝo terure koleris kontraŭ Malgranda Muk, kiu lasis lin tiel kuradi ĝis plena senspireco. "Mi ja donis al vi mian reĝan vorton," li diris, "ke vi konservos liberecon kaj vivon; sed en la templimo de dek du horoj vi iru for el mia lando, alie mi lasos vin pendigi." Sed la pantoflojn kaj la bastoneton li ordonis meti en sian trezorejon.

Tiel same malriĉa kiel iam antaŭe, Malgranda Muk forlasis la landon, malbenante sian malsaĝon, kiu trompkredigis al li, ke li povas ludi gravan rolon ĉe la kortego. La lando, el kiu oni lin forpelis, estis, feliĉe, negranda; sekve, jam post ok horoj li sin trovis ĉe la landlimo, kvankam, al kutimiĝinte al siaj karaj pantofloj, li nun trovis tre malfacila la ordinaran irmanieron.

Transpasinte la landlimon, li dekliniĝis de la kutima vojo, por serĉi la plej dezertajn solejojn kaj tie vivi ermite, ĉar nun li portis koleron kontraŭ la tuta homaro. En densa arbaro li venis al loko, kiu al li ŝajnis tre taŭga por lia celo. Invitis lin klara rivereto, borderita de ombroplenaj figarboj; ĝi trafluis molan herbejon, sur kiu li ĵetis sin teren, firme decidinte, ke li jam nenion plu manĝos sed atendos ĉi tie la morton. Profundiĝinta en malĝoja primorta medito, li fine ekdormis; sed kiam li revekiĝis kaj ekturmentis lin lia malplena stomako, li tamen pripensis, ke morto permalsata estas ja io danĝera; kaj tial li ekrigardis ĉirkaŭen, ĉu li ne povas trovi ion manĝeblan.

Bongustegaj maturaj figoj pendis de la arbo, sub kiu li ĵus dormis. Li suprenrampis por ilin deŝiri, satmanĝis kun bona apetito, kaj poste grimpis malsupren al la rivereto, por kvietigi sian soifon. Sed kia teruro ekregis lin, kiam la akvo montris al li lian kapon ornamitan per du grandegaj oreloj kaj longa dika nazego! En granda konsterniĝo li ekkaptis per la manoj siajn orelojn: vere, ili havis pli ol duonan ulnon da longo!

"Mi ja bone meritas orelojn de azeno," li ekkriis, "ĉar, kiel azeno, mi piedforbatis mian feliĉon." — Dum kelka tempo li ĉirkaŭvagadis tra la arbaro; sed sentante sin denove malsata, li devis ankoraŭ unu fojon alkuri al la figoj, ĉar nenion alian li trovis tie por manĝi. Ĉe ĉi tiu dua figmanĝado venis al li en la kapon, ke eble liaj oreloj jam ne havas lokon sub lia granda turbano; tial, timante aspekti ankoraŭ pli ridinda, li denove palpserĉis siajn orelojn, sed jen ili estis malaperintaj! Li tuj kuris al la rivereto, por certiĝi pri tio, kaj vere, ĝi estis tiele: liaj oreloj nun havis sian antaŭan formon, kaj la longan malbelegan nazon li jam ne havis plu. Nun fine li ekkomprenis, kiel ĉi tio fariĝis: de la unua figarbo li ricevis la longan nazon kaj la azenajn orelojn; per la dua li resaniĝis. Kun ĝojo li ekkonsciis, ke lia favorema sorto donis al li ankoraŭ unu fojon rimedon por esti feliĉa. Li do deŝiris de ĉiu el la du arboj tiom da figoj, kiom li povis kunporti, kaj reiris en la landon, kiun li antaŭ tiel mallonga tempo forlasis. Tie, en la unua urbeto, en kiun li venis, li faris sin, per aliaj vestaĵoj, tute nerezonebla; poste, li iris pluen al la urbo, kie loĝis la reĝo, kaj baldaŭ li tien alvenis.

Estis tiam sezono, kiam maturaj fruktoj estis ankoraŭ sufiĉe maloftaj. Tial Malgranda Muk sidiĝis antaŭ la pordego de l' palaco, ĉar el pasinta tempo li bone sciis, ke ĉi tie la kuirejestro aĉetadas tiajn frandaĵojn por la reĝa tablo. Li ankoraŭ ne longe sidis tie, kiam, trapaŝantan tra la korto, li ekvidis la kuirejestron. Tiu ĉi esploris la komercaĵojn de l' vendistoj, kiuj kolektiĝis ĉe la pordego de l' palaco, kaj fine liaj okuloj renkontis la korbeton de Muk. "Ho! jen frandaĵo neordinara," li diris, "kiu certe plaĉos al lia reĝa moŝto; kiom vi postulas por la tuta korbo?" Malgranda Muk difinis prezon moderan, kaj baldaŭ ili faris interkonsenton. La kuirejestro transdonis la korbon al sklavo kaj daŭrigis sian iradon; sed Malgranda Muk forkuris de tie kiel eble plej rapide, timante ke, kiam la malfeliĉego vidiĝos ĉe la kapoj de l' korteganoj, oni lin serĉos kaj punos, kiel vendinton de la figoj.

La reĝo estis ĉe tablo en treege gaja humoro; ree kaj ree li laŭdis la kuirejestron pro lia bona kuirado kaj pro la zorgemo, kun kiu li ĉiam elektas por li la plej maloftajn frandaĵojn; sed la kuirejestro, kiu ja sciis, kiajn bongustaĵojn li ankoraŭ havas en rezervo, ridetis afable kaj respondis per orakolaj sentencoj, kiel: "Post tag' hodiaŭa, venos tago morgaŭa," aŭ: "Fino bona, ĉio bona," tiel ke la reĝidinoj fariĝis pli kaj pli scivolaj, kion li ankoraŭ metos sur la tablon. Sed kiam li alservis la belajn allogantajn figojn, eliĝis el ĉiuj buŝoj unuvoĉa "A-a!" de admiro. "Kiel maturaj! kiel apetitaj!" ekkriis la reĝo. "Kuirejestro, vi estas vera majstro kaj meritas nian tute apartan

favoron!" Tiel parolante, la reĝo, kiu je tiaj frandaĵoj estis ĉiam tre maldonacema, disdonis propramane la figojn. Ĉiu reĝido kaj ĉiu reĝidino ricevis du, al la honoraj fraŭlinoj kaj al la veziroj kaj agaoj⁸ li donis po unu, kaj la ceterajn li metis antaŭ si mem kaj komencis gluti kun granda apetito.

"Dio mia! kiel strange vi aspektas, patro!" ekkriis subite Reĝidino Amarza. Ĉiuj, mirigitaj, rigardis al la reĝo: grandegaj oreloj elstaris el lia kapo kaj longa nazego pendis malsupren antaŭ lia mentono; ankaŭ sin mem ili reciproke rigardis kun mirego kaj teruro: ĉiuj estis pli-malpli riĉe provizitaj per la strangaj kapornamaĵoj.

Oni prezentu al si la konsterniĝon de la kortego! Oni tuj sendis voki ĉiujn kuracistojn de la urbo; ili alvenis amasege kaj ordonis pilolojn kaj miksturojn, sed la oreloj kaj nazoj restis. Oni operaciis unu el la reĝidoj, sed liaj oreloj tuj rekreskis.

En sia kaŝejo, en kiun li retiriĝis, Malgranda Muk baldaŭ eksciis pri la tuta okazintaĵo; kaj nun li plene konsciis, ke venis la tempo reokupiĝi pri la afero. Jam antaŭe, per la mono, kiun li enspezis per sia figvendado, li aĉetis vestaron, kiu sufiĉe bone taŭgus por aspektigi lin kiel klerulon; longa barbo el kaproharoj perfektigis la trompvestiĝon. Kun sako da figoj li eniris en la palacon de l' reĝo kaj proponis, kiel fremda kuracisto, sian helpon. Komence oni estis iom nekredema; sed kiam Malgranda Muk manĝigis figon al unu el la reĝidoj kaj tiel revenigis liajn orelojn kaj lian nazon al ilia antaŭa stato, ekdeziregis ĉiuj, ke la fremda kuracisto ilin sammaniere resanigu. Dume la reĝo, nenion dirante, lin prenis je la mano kaj kondukis en sian ĉambron. Tie li malfermis pordon kondukantan en la trezorejon, kaj faris al Muk signon, ke li sekvu lin. "Jen estas miaj trezoroj," diris la reĝo; "elektu, kion ajn vi volas; mi nenion rifuzos al vi, se vi nur liberigos min de ĉi tiu malhonoranta malsano." Tio estis kvazaŭ dolĉa muziko en la oreloj de Malgranda Muk. Enirante en la trezorejon, li jam ekvidis sur la planko siajn pantoflojn, kaj tutproksime de ili kuŝis lia vergeto. Nun li ĉirkaŭiris en la salono, kvazaŭ li volus admiri la trezorojn de l' reĝo; sed apenaŭ li atingis siajn pantoflojn, li rapide ensaltis, kaptis lian bastoneton, deŝiris sian falsan barbon kaj vidigis al la miranta reĝo la bone konatan vizaĝon de l' forpelita Muk. "Perfida reĝo," li parolis, "kiu pagas fidelajn servojn per sendankeco, konservu, kiel bone merititan punon, vian nunan fi-figuron. Mi postlasas al vi la orelojn, kiel ĉiutagan memoraĵon pri Malgranda Muk." Eldirinte la lastajn vortojn, li sin turnis rapide sur la kalkanumo, ekdeziris sin malproksimen de tie, kaj antaŭ ol la reĝo povis kii eĉ unu fojon por helpo, Malgranda Muk estis jam forfluginta. De tiu tempo li loĝas ĉi tie en granda riĉeco, sed tute sola, ĉar li malestimas la homojn. Lia spertoriĉa vivo faris lin granda saĝulo, kaj, malgraŭ lia stranga eksteraĵo, li meritas vian admiron, pli ol vian mokadon. —

Tiel rakontis al mi mia patro. Mi certigis al li mian penton pri mia malĝentila konduto kontraŭ la bona hometo, kaj mia patro pardone liberigis min de la postrakonta "kutima," kiun li destinis al mi en la komenco. Mi rakontis al miaj kamaradoj la

mirigajn aventurojn de Malgranda Muk, kaj baldaŭ ni tiom lin amis, ke neniam ni insultis lin plu. Male, ĝis li mortis, ni alte respektis lin, kaj ĉiam ni kliniĝadis antaŭ li tute same profunde, kiel antaŭ kadio kaj muftio.⁹

La vojaĝantoj interkonsente decidis ripozi la sekvantan tagon en tiu ĉi karavanejo, por refortigi sin mem kaj siajn bestojn por la plua vojaĝo. Ankaŭ en ĉi tiun tagon ĝisdaŭris la hieraŭa gajeco, kaj ili sin donis al ĉiuspecaj ludoj kaj amuzaĵoj. Post komuna tagmanĝo ili alvokis la kvinan komerciston, Ali Siza, ke nun li pagu sian ŝuldon, kiel jam faris la aliaj, kaj rakontu sian historion. Li respondis, ke lia vivo estas tro malriĉa je frapantaj okazintaĵoj, kaj tial li ne volas paroli pri ĝi, sed rakontos al ili ion alian, nome: la fabelon pri la falsa princo.

La Fabelo pri la Falsa Princo.

Estis iam respektinda subtajloro, nomata Labakano, kiu lernoservis ĉe lerta majstro en Aleksandrio. Oni ne povas diri, ke Labakano kudradis mallerte; kontraŭe, li povosciis fari laboraĵojn aparte delikatajn. Kaj ni estus maljustaj, dirante, ke li estis mallaborema. Tamen ne ĉio estis en ordo en la kapo de la subtajloro. Okazis ofte, ke li kudradis seninterrompe dum tutaj horoj, tiel ke la kudrilo fariĝis brulruĝa en lia mano kaj ekfumiĝis lia fadeno; en tiaj okazoj li plenumadis laboraĵojn tute neimiteblajn. Sed alitempe, — kaj, bedaŭrinde, tio okazis plej ofte, — li sidadis absorbita en siaj pensoj, kun fiksjaj sencelaj okuloj; kaj en lia vizaĝo kaj tuta teniĝo estis io tiel stranga, ke lia majstro kaj liaj kunsubuloj, vidante lian distrekan mienon, diris ĉiujfoje: "Labakano havas denove sian aristokratan vizaĝon."

Vendrede, kiam aliaj homoj pace revenadis de la matena preĝo hejmen al sia laboro, Labakano, surhavanta belan, penege ŝparakiritan veston, elpaŝis el la moskeo, trairis per malrapidaj fieraj paŝoj la placojn kaj stratojn de la urbo, kaj kiam iu el liaj kamaradoj lin salutis, dirante: "Pacon al vi, Labakano," aŭ: "Kiel vi fartas, amiko?" li eksvingis grandanime la manon aŭ, en specialaj okazoj, klinis belmaniere la kapon. Kaj kiam lia majstro diris al li, ŝerce: "Naskita princo vi ja estas, Labakano," li ĝojis pro tio kaj respondis: "Ĉu ankaŭ vi rimarkis tion?" aŭ: "Mi jam de longe tiel pensas!"

Tia estis jam de longa tempo la stranga konduto de la respektinda subtajloro Labakano, sed ĉar li estis en ceteraj rilatoj bonkonduta kaj lerta laboristo, lia majstro toleradis liajn kapricojn. Okazis ĝuste tiutempe, ke Selim, la frato de l' sultano, haltis travojaĝe en Aleksandrio; kaj unu tagon li sendis festveston al la majstro, por ke ĝi estu de li korektita, kaj la majstro transdonis ĝin al Labakano, ĉar tiu ĉi faradis la plej delikatajn laboraĵojn. Vespere, kiam la majstro kaj la aliaj subuloj foriris, por mallaciĝi post la ŝarĝpenado de l' tago, Labakano, puŝata de nekontraŭstarebla sopiro,

reeniris en la laborejon, kie pendis la vesto de la imperiestra frato. Longe li staris tie antaŭ la vesto, enpense admirante jen la belegan brodaĵon, jen la briletantajn ŝanĝkolorojn de la silko kaj veluro. Li ne povis sin deteni: kvazaŭ mallibervole li surmetis ĝin, kaj jen, ho miro! ĝi vestis lin tiel perfekte, kiel se ĝi estus por li farita. "Ĉu mi ne estas princo tute same bona kiel iu alia?" li demandis sin, paŝante en la ĉambro tien kaj reen. "Ĉu la majstro mem ne diris, ke mi estas princo naskita?" Surmetante la veston, la subtajloro ŝajnis samtempe alpreni tute reĝan karakteron; li ne povis forigi el sia spirito la penson, ke li estas nekonata reĝido, kaj kiel nekonata reĝido li nun decidis forvojaĝi en la mondon kaj tian lokon forlasi, kie la homoj estas tiel malsaĝaj, ke ili ne povas vidi, sub la kovraĵo de lia malalta vivstato, lian ennaskitan indecon. Ŝajnis al li, kvazaŭ la belega vesto estas al li sendita de iu bonvola feino; li do bone sin gardis malŝati tiel multvaloran donacon, enpoŝigis la malmultan monon, kiun li havis kontante, kaj, dum favorkovris lin la mallumo de la nokto, li ekformarŝis el la pordego de Aleksandrio.

Dum li vojaĝadis, la nova princo elvokis ĉiuloke grandan miron, ĉar la belega vesto kaj lia serioza, majesta teniĝo tute ne konvenis al piediranto. Kiam, pri tio, oni faris al li ian demandon, li ĉiufoje respondis kun misteroplena mieno, ke la afero havas kaŭzon tute specialan. Sed vidante, ke li faras sin ridinda per sia piedirademo, li aĉetis por malalta prezo maljunan ĉevalon, kiu trafe al li konvenis, ĉar, havante neŝanceblan trankvilecon kaj mildecon de animo, neniam ĝi embarase devigis lin prezentiĝi kiel lerta rajdisto, kio tute ne estis lia forta flanko.

Unu tagon, dum li vojiris malrapide antaŭen sur sia Murva, — tiel li nomis sian ĉevalon, — alvenis alia rajdanto, kiu petis permeson rajdi en lia societo, ĉar, diris li, per interparolado mallongiĝos al ili la vojo. La rajdanto estis gaja junulo, bela kaj ĝentilmaniera. Li tuj komencis kun Labakano interparoladon pri "kien" kaj "de kie," kaj montriĝis, ke ankaŭ li, same kiel la subtajloro, eliris sencele en la mondon. Li diris, ke li nomiĝas Omar, estas nevo de l' bejo Elfi, la malfeliĉa Paŝao de Kajro, kaj nun vojaĝas de loko al loko, por plenumi komision, kiun konfidis al li lia onklo sur sia lito de morto. Kun sama nekaŝemeco Labakano ne volis rakonti pri siaj propraj cirkonstancoj, sed malklare komprenigis al la noveveninto, ke li estas de alta deveno kaj vojaĝas pro sia plezuro.

La ambaŭ junuloj plaĉis multe unu al la alia kaj daŭrigis kune la vojon. La duan tagon de l' komuna vojaĝo Labakano demandis sian kunrajdanton pri la komisiono, kiun li devas prizorgi, kaj eksciis, je sia granda miro, jenon: — Elfi Bejo, la Paŝao de Kajro, edukis Omar'on de lia plej frua infaneco, kaj tiu ĉi neniam konis siajn gepatrojn. Fine, kiam la Bejo estis surprize atakita de siaj malamikoj kaj, post tri malfeliĉaj bataloj, devis forkuri, mortige vundita, li malkaŝis al sia zorgato, ke li ne estas lia nevo, sed la filo de potenca monarĥo, kiu, pro timo de la profetaĵoj de siaj astrologoj, forigis la junan principon de sia kortego, ĵurante, ke li ne volas lin revidi pli frue ol je lia dudek-

dua naskotago. Elfi Bejo ne diris al li la nomon de lia patro, sed donis al li plej precizajn ordonojn, ke, la kvaran de la venonta monato Ramadan, je kiu tago li atingos la aĝon de dudek du jaroj, li troviĝu ĉe la famekonata kolono El-Seruja, je kvar tagvojaĝoj, oriente de Aleksandrio; tie li transdonu al la viroj, kiuj staros apud la kolono, ponardon, kiun li donis al li, kaj diru al ili: "Jen mi estas kiun vi serĉas"; se ili respondos: "Laŭdata estu la Profeto, kiu vin gardis," li tiam sekvu ilin; ili kondukos lin al lia patro.

Tre mirigis la subtajloron Labakanon ĉi tiu sciigo. Per envidemaj okuloj li de nun rigardis la principdon. Kolerigis lin la penso, ke al tiu ĉi Omar, kiu jam sen tio havas la famon esti nevo de potenca paŝao, la sorto plie donis rangon de principdo, sed al li mem, kiu ja posedas ĉiujn princajn ecojn, ĝi donacis, kvazaŭ por moko, senfaman naskiĝon kaj vivovoĵon tute ordinaran. Li faris komparojn inter si mem kaj la principdo. Li devis konfesi al si, ke tiu ĉi lasta havas trajtojn de vizaĝo treege allogajn: belaj vivecaj okuloj, agla nazo, mildaj servemaj manieroj, unuvorte, ĉiuj eksteraj perfektaĵoj, kiuj povas iun rekomendi, estis liaj. Sed kvankam li ne povis ne konfesi la meritojn de sia kunulo, tamen li trovis nekontraŭdirebla, ke homo tia, kia li Labakano, estus, sen ia dubo, eĉ pli bonvena al la princa patro, ol la vera principdo.

Ĉi tiuj pripensoj persekutadis Labakanon dum la tuta tago, kaj la sekvintan nokton li eĉ ekdormis kun ili. Sed kiam li malfermis matene la okulojn, kaj lia unua rigardo renkontis la kuŝantan apud li Omar'on, kiu povis dormi tiel trankvile kaj sonĝi pri sia certa feliĉo, vekigis en li la penso, tion akiri al si, aŭ ruze aŭ perforte, kion malfavora sorto rifuzis. La ponardo, tiu ekkona signo de la hejmen revenanta principdo, kroĉigis al la zono de l' dormanto; singarde, senbrue li eltiris ĝin, por enpuŝi en la bruston de ĝia posedanto. Sed eĉ la penso de mortigo teruris lian paceman tajloran animon; li do kontentiĝis alproprigante la ponardon kaj bridante por si mem la pli rapidan ĉevalon de l' principdo; kaj antaŭ ol Omar vekigis kaj sin vidis senigita je ĉiuj siaj esperoj, lia perfida kunvojaĝanto jam malproksimiĝis je sufiĉe multe da mejloj.

Estis ĝuste la unua tago de la sankta monato Ramadan, kiam Labakano prirabis la principdon; li do havis ankoraŭ kvar tagojn, por atingi la kolonon El-Seruja, kiu estis de li bone konata. Kvankam la loko, kie troviĝis ĉi tiu kolono, estis malproksima je ne pli ol du tagvojaĝoj, tamen li tre rapidis por tien alveni, ĉar ĉiam li timis, ke la vera principdo alvenos unua. En la fino de l' dua tago Labakano ekvidis la kolonon El-Seruja. Ĝi staris sur malgranda monteto en vasta ebenaĵo kaj estis videbla el du-trihora distanco. Ĉe tiu ĉi vido, la koro de Labakano ekbatis pli laŭte. Kvankam, dum la du ĵus pasintaj tagoj, li jam havis sufiĉe da tempo por pripensi la rolon, kiun li devos ludi, tamen lia malbona konscienco faris lin iom timema; sed fine la penso, ke li ja estas naskita princo, revekis lian kuraĝon, kaj kun renovigita memfido li aliris sian celon.

La ĉirkaŭaĵoj de la kolono El-Seruja estis senhomaj kaj dezertaj; kaj se la nova principo ne havus, jam por kelkaj tagoj, sufiĉe da provizaĵoj, embarasus lin iome la zorgo pri lia vivteno. Li nun haltis kun sia ĉevalo sub kelkaj palmoj kaj tie atendis, kion sendos al li lia sorto. Ĉirkaŭ la morgaŭa tagmezo li ekvidis grandan procesion de ĉevaloj kaj kameloj, venantan tra la ebenaĵo en direkto al la kolono El-Seruja. La procesio haltis ĉe la malsupro de l' monteto, sur kiu staris la kolono; oni starigis belegajn tendojn, kaj la tuto aspektis kiel karavano de riĉa paŝao aŭ ŝejko. Labakano prave konjektis, ke ĝuste pro li tiuj multaj homoj alvenis; kaj volonte li vidigus al ili jam hodiaŭ ilian estontan estron, sed li moderigis sian deziregon prezentiĝi kiel princo, ĉar ĉiuokaze la venonta mateno ja plene realigos liajn plej ambiciajn esperojn.

La matena suno vekis la feliĉegan tajloron por la plej grava momento de lia vivo, kiam li leviĝos el sia malalta sfero kaj stariĝos flanke de princa patro. Estas ja vero, ke, bridante sian ĉevalon, por alrajdi al la kolono, li ekpensis momente pri la maljusteco de sia entrepreno, kaj image li prezentis al si la doloron de l' princa junulo, trompita de liaj belaj esperoj; sed la kubo estis ĵetita, li jam ne povis malfari, kio estis farita, kaj lia memestimo diris al li en la orelon, ke li havas aspekton sufiĉe majestan, por sin prezenti kiel filo al la plej potenca el la reĝoj. Sentimigite de ĉi tiu penso, li sidiĝis sur sian ĉevalon, prenis sian tutan kuraĝon en manoj por igi ĝin orde galopi, kaj post malpli ol kvarono da horo li jam atingis la malsupron de l' monteto. Li desaltis de sia ĉevalo kaj alligis ĝin al unu el la arbustoj, kiuj kreskis tie en sufiĉe granda nombro; poste li eltiris la ponardon de l' principo Omar kaj eksupreniris la monteton. Ĉe la piedo de l' kolono staris ses viroj. Tiuj ĉi akompanis maljunulon kun nobla reĝa mieno: lia belega orbrodita kaftano, zonita per blanka kaŝmira ŝalo, lia blanka turbano, ornamita per fulmetantaj juveloj, montris lin homo riĉa kaj altranga. Labakano, alpaŝinte, sin klinis antaŭ li malalte kaj parolis, prezentante al li la ponardon:

"Jen mi estas, kiun vi serĉas."

"Laŭdata estu la Profeto, kiu vin gardis," respondis la maljunulo, kun larmoj de ĝojo; "ĉirkaŭprenu vian maljunan patron, kara mia filo Omar!"

La bona tajloro estis de ĉi tiuj solenaj vortoj tre kortuŝita kaj ĵetis sin, duone ĝojante, duone hontante, en la brakojn de l' maljuna princo. Sed nur dum unu momento estis al li permesate ĝui la feliĉegon de lia nova rango. Elrektiĝinte el la brakoj de l' princa maljunulo, li ekvidis rajdanton rapidantan tra la ebenaĵo en direkto al la monteto. La rajdanto kaj lia ĉevalo prezentis strangan vidaĵon; ĉu pro obstineco, ĉu pro laceco, la ĉevalo, ŝajne, tute ne volis pluen: ĝi ŝoviĝis antaŭen per falŝanceliĝa irado, kiu estis nek paŝado nek trotado, kaj per manoj kaj piedoj la rajdanto instigadis ĝin al pli rapida kurado. Baldaŭ, tro baldaŭ Labakano rekonis sian ĉevalon Murva kaj la veran

princidon Omar; sed jam ekloĝis en li la demono Mensogo, kaj li decidis, kio ajn okazos, valorigi kun fera frunto siajn uzurpitajn pretendojn.

Jam el malproksimo oni vidis la rajdanton signogestadi per la mano; kaj nun, malgraŭ la malbona irado de l' ĉevalo Murva, li jam alvenis, desaltis teren kaj eksupreniris kurege la monteton. "Haltu!" li kriis, "kiu ajn vi estas, haltu! kaj ne lasu vin trompi de plej malnobla mensogulo. Estas *mi*, kiu nomiĝas Omar; kaj neniu mortemulo kuraĝu profani mian nomon!"

Granda miro pentriĝis sur la vizaĝoj de la apudstarantoj pro ĉi tiu ŝanĝiĝo de aferoj; sed pli ol ĉiuj konsternita ŝajnis la maljunulo, kiu nun direktadis demandajn rigardojn jen al tiu, jen al alia. Dume Labakano parolis kun penege akirita trankvileco: "Favora mia estro kaj patro, ne lasu vin trompi de tiu homo. Ĝi estas, kiom mi scias, iu freneza tajloro el Aleksandrio, nomata Labakano, kiu meritas nian kompaton, pli ol nian koleron."

Ĝis furiozeco incitis tiuj vortoj la princidon. Ŝaŭmante de kolerego, li volis trapuŝiĝi ĝis Labakano, sed la ĉirkaŭstarantoj sin ĵetis inter ilin kaj tenis lin firme, kaj la maljuna princo parolis: "Vere, filo mia, la kompatindulo estas freneza; oni ligu lin kaj sidigu sur unu el niaj dromedaroj; eble ni povos iel helpi la malfeliĉulon."

Jam kvietiĝis la kolerego de l' princido; plorante, li kriis al la princo: "Mia koro al mi diras, ke vi estas mia patro; mi ĵurpetas vin, pro memoro de mia patrino, aŭskultu min!"

"Sankta mia Dio!" respondis la alia; "li jam rekomencas deliri; kiel la frenezaj ideoj nur venas al li en la kapon?" Dirinte tion, li prenis Labakanon je la brako kaj lasis sin konduki malsupren de la monteto. Ili ambaŭ sidiĝis sur belajn ĉevalojn, drapiritajn per riĉaj kovriiloj, kaj ekforrajdis tra la ebenaĵo fronte de l' tuta procesio. Sed al la malfeliĉa princido oni kunkatenis la manojn kaj ligis lin firme sur dromedaro, kaj apud li restis ĉiam du rajdistoj, kiuj havis por ĉiu lia movo plej atenteman okulon.

La maljuna princo estis Saaŭd, sultano de la Veĥabanoj.¹⁰ Longan tempon li vivis seninfana, ĝis fine al li naskiĝis princido, pri kiu li jam de tiel longe sopiris. Sed la astrologoj, kiujn li demandis pri la sorto de l' knabo, deklaris, ke ĝis lia dudek-dua vivjaro minacados lin la danĝero, esti forpelita de iu malamiko. Por tion eviti, la sultano fordonis la infanon al sia malnova fidinda amiko Elfi Bejo, por esti de li edukata; kaj de tiu tempo, dum dudek du dolorplenaj jaroj, li atendis lian aperon. Ĉi tion la sultano rakontis al sia supozata filo, kaj esprimis grandan kontentiĝon pri lia bela staturo kaj lia dignoplena teniĝo.

Kiam ili venis en la landon de l' sultano, ĉie la loĝantoj akceptis ilin per ĝojokrioj, ĉar jam tra ĉiuj urboj kaj vilaĝoj disvastiĝis kun rapideco de fulmo la famo pri la alveno de la sultanido. Sur la stratoj, sur kiuj ili trapasis, oni jam starigis arkojn el floroj kaj branĉoj, brilegaj ĉiukoloraj tapiŝoj ornamis la domojn, kaj la popolo laŭte gloris Dion kaj lian Profeton, kiuj sendis al ili tiel belan sultanidon. Ĉio ĉi tio plenigis per feliĉo kaj ĝojo la fieran koron de l' tajloro; sed des pli malfeliĉa sendube sin sentis la vera Omar, kiu, ankoraŭ mankatenta, sekvis en silenta malespero la procesion. Neniu atentis lin ĉe la ĝenerala ĝojego, kiu tamen en realeco rilatis ja lin. La nomon Omar kriadis miloj kaj miloj da voĉoj, sed pri li, la laŭrajta portanto de la nomo, neniu interesiĝis; nur tiu aŭ alia demandis, kiun oni kunforkondukas tiel firme ligitan, kaj terure sonis en la orelo de l' sultanido la respondo de liaj gardantoj: "Ĝi estas freneza tajloro."

Fine la procesio alvenis en la ĉefurbon de l' sultano, kie oni jam faris, por ilin akcepti, preparojn eĉ pli grandiozajn, ol en la aliaj urboj. La sultanino, maljuneta altrespektinda virino, atendis ilin kun sia tuta kortegano en la plej belega salono de l' palaco. La plankon de ĉi tiu salono kovris grandega tapiŝo; la muroj estis ornamitaj per helblua ŝtofo, kiu pendis de grandaj arĝentaj hokoj per oraj ŝnuroj kaj kvastoj.

Estis mallume, kiam la procesio alvenis; tial oni jam ekbruligis en la salono multe da kuglerondaj koloraj lampoj, kiuj faris el la nokto helan tagon. Ili elradiadis plej klare kaj plej multkolora en la profundo de l' salono, kie sur trono sidis la sultanino. La trono staris sur kvar ŝtupoj kaj estis ĉirkaŭforĝita per senmiksa oro kaj enmete ornamita per grandaj ametistoj. La kvar plej eminentaj emiroj tenadis super la kapo de l' sultanino baldakenon el ruĝa silko, kaj la Ŝejko de Medina ventumadis ŝin per ventumilo el pavaj plumoj.

Tiel la sultanino atendis sian edzon kaj sian filon. Tiun ĉi lastan ankaŭ ŝi neniam revidis de lia naskiĝo, sed signifoplenaj sonĝoj jam aperigis al ŝi la infanon, pri kiu sopiris ŝia koro, kaj tial ŝi estis certa, ke eĉ el inter miloj da aliaj ŝi tuj lin povus rekoni. Nun ekaŭdiĝis la bruoj de la alproksimiĝanta procesio, trumpetado kaj tamburado intermiksiĝis kun la ĝoja aplaŭdado de l' popola amaso, la hufofrapado de la ĉevaloj eksonis sur la korto de l' palaco, ĉiam pli kaj pli proksime bruadis la paŝoj de la venantoj, malfermegiĝis la pordoj de l' salono, kaj tra la vicoj de la falantaj sur la vizaĝon servistoj rapidis la sultano, tenante sian filon per la mano, antaŭ la tronon de l' patrino.

"Jen," li parolis, "mi alkondukas al vi tiun, pri kiu vi de tiel longe sopiras."

Sed la sultanino interrompis lin. "Tio ne estas mia filo," ŝi ekkriis; "tio ne estas la trajtoj de vizaĝo, kiujn la Profeto al mi montris en sonĝo!"

En la momento, kiam la sultano volis fari al ŝi riproĉojn pri ŝia superstiĉo, malfermiĝis subite la pordo, kaj, persekutata de siaj gardantoj, de kiuj li sin deŝiris per streĉo de ĉiuj siaj fortoj, Princido Omar enkuregis en la salonon. Senspira li ĵetis sin teren antaŭ la trono: "Ĉi tie mi volas morti; prenu, ho patro kruela, mian vivon, ĉar toleri tiun ĉi honton mi jam ne povas!" Ĉiujn konsternegis liaj vortoj, oni amase interpuŝiĝis ĉirkaŭ la malfeliĉulo, kaj jam la alrapidantaj gardistoj estis pretaj lin kapti kaj religi, kiam la sultanino, kiu en senparola mirego rigardis ĉion ĉi tion, salte leviĝis de la trono. "Haltu!" ŝi kriis; "ĉi tiu kaj neniu alia estas la ĝusta; ĉi tiu homo estas, kiun miaj okuloj neniam vidis kaj tamen rekonas mia koro!"

La gardistoj jam nevole deturniĝis de Omar, sed la sultano, bolante de furioza kolero, kriis al ili, ke ili ligu la frenezulon. "Al mi apartenas decidi," li parolis per komanda voĉo, "kaj ĉi tie oni ne juĝas laŭ sonĝoj de virinoj, sed laŭ certaj, neerarigaj signoj; ĉi tiu (montrante Labakanon) estas mia filo, ĉar li alportis al mi la ponardon, la atestan signon de mia amiko."

"Li ŝtelis ĝin," kriis Omar; "li malnoble profitis mian sensuspektan konfidon, por min pereigi!" Sed la sultano ne aŭskultis la voĉon de sia filo, ĉar en ĉiuj aferoj li kutimis sekvi nur sian propran juĝon; la malfeliĉan Omar'on li do lasis perforte fortreni el la salono, dum li mem foriris kun Labakano en sian privatan ĉambron, plena de kolero kontraŭ sia sultanino edzino, kun kiu li tamen jam de dudek kvin jaroj kunvivis en paco.

La sultanino, siaflanke, profunde malĝojis pro la ĵusaj okazintaĵoj; ŝi havis la firman konvinkecon, ke iu trompisto ekposedis la koron de l' sultano, ĉar ĝuste tiun saman malfeliĉulon tiom multe da signifoplenaj sonĝoj jam aperigis al ŝi kiel ŝian veran filon. Kiam ŝia afliktiĝo iome kvietiĝis, ŝi pripensis rimedojn, por konvinki sian edzon pri lia maljusteco. Verdire ĉi tio ne estis facila, ĉar tiu, kiu pretendis esti ŝia filo, jam transdonis al la sultano la ekkonilan ponardon, kaj krom tio li tiel detale informiĝis pri la pasinta vivo de Omar, ke nun li ludis sian rolon kun plej perfekta memfido. Ŝi sendis voki la virojn, kiuj akompanis la sultanon al la kolono El-Seruja, kaj ordonis, ke ili ĉion plej precize rakontu al ŝi, kaj poste ŝi konsiliĝis kun siaj plej fidindaj sklavinoj. Ili jen elektis, jen malelektis tiun kaj alian rimedon; fine parolis Melehsala, maljuna saĝa Ĉerkesino: "Se mi bone aŭdis, estimegata estrino, la transdoninto de l' ponardo asertis, ke tiu, kiun vi kredas via filo, nomiĝas Labakano kaj estas freneza tajloro?" — "Jes, ĝi estas tiele," respondis la sultanino; "sed kion vi celas per tio?" — "Ĉu vi do ne opinias ebla, ke tiu trompisto alfiksis al via filo sian propran nomon? Kaj se tiel estas, ekzistas, por kapti lin, bonega rimedo, kiun mi nun tutkaŝe sciigu al vi." — La sultanino klinis sian oreilon, kaj la sklavino alflustris konsilon, kiu ŝajne tre plaĉis al ŝia sinjorino, ĉar tiu ĉi tuj leviĝis, por iri al la sultano.

La sultanino estis saĝa virino, kiu bone konis la malfortajn flankojn de l' sultano kaj sciis ilin profiti. Ŝi do ŝajnigis esti preta ekcedi kaj akcepti la falsan sultanidon; nur unu kondiĉon ŝi petis por ŝi. La sultano, kiu nun pentis sian ekflamon de kolero kontraŭ sia edzino, konsentis pri la kondiĉo, kaj ŝi parolis: "Mi tre dezirus submeti ilin ambaŭ al provo de lerteco; alia eble igus ilin vetrajdi aŭ interbatiĝi aŭ ĵeti sagegojn, sed tio estas aferoj, kiujn ĉiu povas ja fari; ne, mi volus doni al ili taskon, kiu postulas sagacecon: mi do proponas, ke ĉiu el ili faru kaftanon kaj pantalonon, kaj tiam ni vidos, kiu faras la plej belajn."

La sultano ekridis kaj diris: "Aj! aj! jen saĝe vi elpensis! Mia filo devos konkursi kun via freneza tajloro, kiu el ili kunkudros la plej bonan kaftanon? Ne! jen kio estas vere sensenca!"

Sed la sultanino atentigis lin al tio, ke li jam antaŭpromesis al ŝi la plenumon de la kondiĉo, kaj la sultano, homo vortotenema, cedis en la fino, ĵurante tamen, ke kiel ajn bele la freneza tajloro faros sian kaftanon, li por nenio povos lin akcepti kiel filon. Li mem iris al sia supozata filo kaj petis, ke li komplezu al la kaprico de sia patrino, kiu nun nepre volas vidi kaftanon de lia mano. Pleniĝis per ĝojo la koro de l' bona Labakano: se nur de tio ĝi dependas, li diris al si en la pensoj, sinjorino sultanino baldaŭ kontentiĝos kun mi.

Oni jam pretigis du ĉambrojn, unu por la princido, la alian por la tajloro; tie ili devis elprovi sian arton; kaj al ĉiu el ili oni donis nur pecon da silka ŝtofo sufiĉe grandan, tondilon, kudrilon kaj iom da fadeno.

La sultano estis tre scivola, kian kaftanaĉon faros lia filo; kaj ankaŭ al la sultanino batis maltrankvile la koro, ĉu ŝia ruzo bone sukcesos aŭ ne. Du tagojn oni difinis al la konkurantoj por ilia laboro; la trian tagon la sultano sendis voki sian edzinon, kaj kiam ŝi aperis, li sendis venigi el la du ĉambroj la ambaŭ kaftanojn kaj la kaftanfarintojn. Triumfe Labakano enpaŝis kaj sternis sian kaftanon antaŭ la mirantaj rigardoj de l' sultano. "Jen vidu, patro," li parolis, "jen vidu, respektinda patrino, ĉu tio ĉi ne estas majstraĵo? Kontraŭ la plej lerta kortega tajloro mi kuraĝus veti, ke fari tiel belan kaftanon li ne povus."

La sultanino ridetis kaj turnis sin al Omar: "Kaj vi, filo mia, kion vi plenumis?" Indigne li ĵetis sur la plankon la silkan ŝtofon kaj la tondilon. "Dresi ĉevalojn oni instruis al mi kaj svingi la sabron, kaj ĉe ĉiu turnira vetbatalo mia lanco trafas sian celon; sed la artoj de la kudrilo estas al mi fremdaj; ja eĉ malhonoraj ili estus por zorgato de Elfi Bejo, la estro de Kajro."

"Ho vera filo de mia reĝa sinjoro!" ekkriis la sultanino. "Kial ne estas al mi permesite vin ĉirkaŭpreni, vin nomi mia filo! Pardonu, mia edzo kaj estro," ŝi daŭrigis, sin

turninte al la sultano, "ke mi uzis kontraŭ vi ĉi tiun ruzon. Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas, kiu estas princo kaj kiu tajloro? Vere, belega estas la kaftano, kiun faris sinjoro via filo, kaj mi tre dezirus lin demandi, ĉe kiu majstro li lernis."

La sultano dronis en profunda medito, malkonfideme rigardante jen sian edzinon, jen Labakanon, kiu vane penadis kaŝi sian ruĝiĝon kaj venki sian ĉagrenon, ke li tiel stulte perfidis sin. "Ankaŭ ĉi tiu pruvo ne sufiĉas," diris la sultano. "Sed, laŭdata estu Allaho, mi konas rimedon por certe sciiĝi, ĉu mi estas trompita."

Li ordonis alkonduki sian plej rapidan ĉevalon, salte surĉevaliĝis kaj ekforrajdis en arbaron, kiu komenciĝis ne malproksime de la urbo. Tie laŭ malnova legendo, loĝis bonvola feino, nomata Adolzaĵdo, kiu jam ofte per siaj konsiloj helpis la reĝojn de lia gento en horoj de urĝega bezono; tien rapidis la sultano. En la mezo de la arbaro estis maldensejo, ĉirkaŭita de altaj cedroj. Tie, laŭ la legendo, loĝis la feino, kaj malofte oni kuraĝis tien penetri, ĉar jam de tempo antikva la loko inspiris nedifineblan timon, kiu herede transdoniĝis de patro al filo. Apenaŭ li alvenis, la sultano desaltis de sia ĉevalo, ĝin alligis al unu el la arboj, stariĝis en la mezo de la loko, kaj ekparolis per laŭta voĉo: "Se estas vero, ke vi donis al miaj prapatroj bonan konsilon en horo de granda bezono, aŭskultu favore la peton de ilia nepo kaj konsilu al mi en afero, kie homa prudento nenion vidas."

Apenaŭ li eldiris la lastajn vortojn, malfermiĝis unu el la cedroj, kaj elpaŝis vualita virino vestita per longa blanka robo. "Mi scias, pro kio vi venis al mi, Sultano Saaŭd; via deziro estas honesta, kaj tial mi volonte vin helpos. Prenu ĉi tiujn du kestetojn. Ordonu al tiuj ambaŭ homoj, kiuj pretendas esti viaj filoj, ke ili elektu. Mi scias, ke ne maltrafe elektos tiu, kiu en vero estas via filo." Tiel parolis la vualita kaj donis al li du malgrandajn eburajn kestetojn, riĉe ornamitajn per oro kaj perloj; sur la kovriloj, kiujn la sultano vane penadis eklevi, estis surskriboj el enmetitaj diamantoj.

Rajdante hejmen, la sultano pripensis kaj pripensis, kio nur povas troviĝi en la kestetoj, kiujn, eĉ per streĉo de ĉiuj siaj fortoj, malfermi li ne povis. Ankaŭ la surskriboj donis al li nenian lumon en la afero, ĉar sur unu li legis: *Honoro kaj Gloro*, sur la alia: *Feliĉo kaj Riĉeco*. La sultano pensis en si mem, ke ankaŭ al li estus malfacile elekti inter la du objektoj, kiuj estis egale belaj, egale allogaj.

Reveninte en sian palacon, li sendis voki la sultaninon kaj raportis al ŝi, kion diris la feino; kaj nun plenigis ŝian koron mistera espero, ke tiu, al kiu ŝi sentis sin tiel forte altirata, elektos la kesteton, kiu pruvos lian reĝan devenon.

Antaŭ la trono de l' sultano oni starigis du tablojn; per sia propra mano la sultano metis sur ilin la du kestetojn; poste li supreniris la tronon kaj faris signon al unu el siaj sklavoj, ke li malfermu la pordon de l' salono. Brilanta procesio de paŝaoj kaj emiroj

de la regno, kiujn alvokis al si la sultano, envenis arege tra la malfermita pordo. Ili sidiĝis sur belegaj kusenoj laŭlonge de la muroj. Kiam ili ĉiuj sidiĝis, la sultano denove faris signon, kaj oni alkondukis Labakanon. Per fieraj paŝoj li trairis la salonon, ĵetis sin teren antaŭ la trono kaj diris: "Kion ordonas mia sinjoro kaj patro?"

La sultano rektiĝis sur sia trono kaj diris: "Mia filo! pri la praveco de viaj pretendoj je tiu ĉi nomo oni laŭtigis dubojn; unu el tiuj kestetoj certigos per sia enhavo la purecon de via naskiĝo; elektu! mi ne dubas, ke vi elektos la ĝustan!"

Labakano leviĝis kaj alpaŝis antaŭ la kestetojn. Longe li pripensis, kiun li elektu, fine li parolis: "Altrespektata patro! kio pli alta ol la feliĉo esti via filo? Kio pli nobla ol la riĉeco de via favoro? Mi elektas la kesteton, kiu montras la surskribon: Feliĉo kaj Riĉeco."

"Ni baldaŭ scios, ĉu vi bone elektis; intertempe sidiĝu sur tiu kuseno apud la Paŝao de Medina," diris la sultano kaj faris signon al sia sklavo.

Oni alkondukis Omar'on. Lia rigardo estis malluma, lia mieno malĝoja, kaj lia tuta aspekto vekis ĝeneralan kompaton ĉe la apudestantoj. Li ĵetis sin teren antaŭ la trono kaj demandis pri la volo de l' sultano. La sultano klarigis al li, ke li devas elekti unu el la kestetoj; li leviĝis kaj alpaŝis antaŭ la tablon. Atente li legis ambaŭ surskribojn, poste li parolis: "La lastaj tagoj instruis al mi, kiel necerta estas la feliĉo, kiel pasemaj ĉiuj riĉaĵoj. Sed krom tio ili instruis al mi, ke en la brusto de homo kuraĝa loĝas nedetruibla trezoro, la honoro, kaj ke la brile lumanta stelo de l' gloro neniam forpasas samtempe kun la feliĉo. Do, eĉ se por ĉiam mi perdas nun mian kronon, jen falis la kubo! Honoro kaj Gloro, vin mi elektas!"

Li metis sian manon sur la elektitan kesteton; sed la sultano ordonis, ke li haltu, kaj faris signon al Labakano, ke ankaŭ li alpaŝu antaŭ sian tablon kaj metu la manon sur sian kesteton. Dume la sultano ordonis, ke oni alportu al li pelvon kun akvo el la sankta fontano Zemzem en Mekka, antaŭlavis siajn manojn por preĝi, turnis sian vizaĝon orienten, ĵetis sin teren kaj preĝis. "Dio de miaj prapatroj, kiu de jarcentoj konservis nian genton pura kaj senmiksa, malhelpu, ke la nomo de la Abasidoj estu profanita de iu malnoblulo, protektu kaj helpu mian veran filon en tiu ĉi horo de l' provo."

Li leviĝis kaj resupreniris sian tronon. Ĝenerala scivolego tenis kvazaŭ enkatenitaj ĉiujn apudestantojn; korprenate atentaj, apenaŭ ili kuraĝis spiri; eĉ museton oni povus aŭdi kurantan tra la salono, tiel senbrue sin tenis la tuta kortegano: la postestarantoj etendis la kolon super la kapojn de la antaŭstarantaj vicoj, por rigardi al la kestetoj. Nun ekparolis la sultano: "Malfermu la kestetojn," kaj tiuj ĉi lastaj, kiujn ĝis nun neniam potenco povis malfermi, eksalte malfermiĝis per si mem.

En la de Omar elektita kesteto kuŝis, sur velura kuseno, malgranda ora kroneto kaj scepro; en la kesteto de Labakano — granda kudrilo kaj iom da fadeno. La sultano ordonis al ambaŭ, ke ili alportu al li siajn kestetojn. Li prenis en sian manon la kroneton de sur la kuseno; kaj, jen mirinda vidaĵo! en tiu sama momento ĝi ekpligrandiĝis, kaj ĉiam ĝi fariĝis pli kaj pli granda, ĝis ĝi atingis la grandecon de vera krono. Li metis la kronon sur la kapon de sia filo Omar, kiu staris antaŭ li genue, kisis lin sur la frunto kaj ordonis al li sidiĝi ĉe lia dekstra mano. Sed al Labakano li turnis sin kaj parolis: "Estas malnova proverbo: *Restu tajloro ĉe via laboro!* Vere, vi ne meritas mian favoron, sed petis pro vi iu, al kiu mi hodiaŭ nenion povas rifuzi; tial mi pardone lasas al vi vian mizeran vivon, sed se vi ŝatas mian konsilon, vi iru, kiel eble plej rapide, for el mia lando."

Hontigita, kvazaŭ dispremegita kiel li estis, la kompatinda subtajloro nenion povis respondi; li ĵetis sin teren antaŭ la princo, kaj larmoj ĵetiĝis el liaj okuloj. "Ĉu vi povas pardoni al mi, princo?" li diris.

"Al amikoj fideleco, al malamikoj grandanimeco, jen pri kio fieras ĉiu Abasido," respondis la princo, igante lin leviĝi; "foriru en paco." — "Ho vera filo mia!" ekkriis, kortuŝita, la maljuna sultano kaj ĵetis sin sur la bruston de la filo; la emiroj kaj paŝaoj kaj ĉiuj eminentuloj de l' regno leviĝis de siaj sidejoj kaj kriis: "Vivu la nova reĝido!" kaj, dum la ĝenerala ĝojego, Labakano, tenante sub la brako sian kesteton, elŝteliĝis el la salono.

Li malsupreniris en la stalon de l' sultano, bridis sian ĉevalon Murva kaj elrajdis tra la pordego en direkto al Aleksandrio. Kvazaŭ sonĝo aperis al li lia tuta princa vivo, kaj sole la belega kesteto, riĉe ornamita per perloj kaj diamantoj, rememorigis al li, ke sonĝo ĝi ja tute ne estis. Reveninte fine Aleksandrion, li alrajdis al la domo de sia estinta majstro, desaltis teren, alligis sian ĉevalon al la pordo kaj enpaŝis en la laborejon. La majstro, kiu en la komenco lin ne rekonis, faris multe da ceremonioj kaj demandis, per kio li povas lin servi. Sed rigardinte de pli proksime sian vizitanton kaj rekoninte sian iaman lernanton, li alvokis siajn subulojn, kaj ĉiuj sin ĵetis kiel frenezaj kontraŭ la kompatinda Labakano, kiu tute ne atendis tian ĝentilan akcepton: ili prilaboris lin per gladiloj kaj ulnoj, pikis per kudriloj kaj pinĉis per akraj tondiloj, ĝis li falis ellacigita sur amason da malnovaj vestaĵoj.

Dum li tie kuŝis, faris al li la majstro furiozajn riproĉojn pro la ŝtelita vesto; vane Labakano certigis lin, ke ĝuste pro tio li revenis, ĉar li volas ĉion kompensi; vane li proponis trioblan kompensaĵon; la majstro kaj liaj subuloj sin ĵetis sur lin denove, lin orde trabastonis kaj forpelis el la domo. Vundbatita kaj ĉifonita, li sidiĝis sur sian ĉevalon Murva kaj rajdis en karavanejon. Tie li kuŝigis sian lacan disbatitan kapon kaj ekmeditis pri la suferoj de l' vivo surtera, pri la tiel ofte nekonfesata merito kaj pri la senvaloreco kaj pasemeco de ĉiuj mondaj trezoroj. Li ekdormis kun la decido, rezigni

pri ĉia grandeco kaj fariĝi respektinda burĝo de la urbo. Kaj la morgaŭan tagon li ne pentis pri sia decido, ĉar la peza mano de l' majstro kaj la egale pezaj manoj de liaj subuloj jam definitive forbastonis el lia doloranta korpo lian tutan moŝtecon.

Por alta prezo li vendis al juvelisto sian kesteton, aĉetis al si domon kaj starigis tajloran laborejon. Fininte ĉiujn antaŭaranĝojn kaj alkroĉinte antaŭ sia fenestro elpendaĵon kun la surskribo: "Labakano, tajloro," li sidiĝis en sia laborejo, kaj, per la kudrilo kaj fadeno, kiujn li trovis en la kesteto, li komencis fliki la veston, kiun la majstro tiel kruele disŝiris. Sed foje oni vokis lin por kelkaj momentoj for de lia laboro, kaj kiam li volis denove sin preni al ĝi, kia stranga vidaĵo sin prezentis al lia rigardo! Kvankam gvidate de neniuj, la kudrilo daŭrigis diligente kudradi; ĝi faris delikatajn, graciajn stebojn, kiajn Labakano mem ne faris eĉ en siaj plej artoriĉaj momentoj!

Vere, eĉ la plej malgranda donaco de bonvola feino estas utila kaj grandvalora! Kaj ankoraŭ alian valoron havis ĉi tiu donaco: kiel ajn diligente laboris la kudrilo, la fadeno neniam finiĝis.

Labakano akiris grandan klientaron kaj estis baldaŭ la plej fama tajloro, longe kaj larĝe. Li altranĉadis la vestojn kaj faradis la unuan stebon per la kudrilo, kaj tuj ĉi tiu laboris plue kaj senĉese, ĝis la vesto estis preta. Majstro Labakano havis baldaŭ la tutan urbon kiel klientaron, ĉar li laboradis bele kaj treege malkare; nur pri unu sola afero la Aleksandrianoj skuadis malaprobe la kapon, nome: ke li laboradis tute sen lernantoj kaj ĉiam post ŝlositaj pordoj.

Tiel la kesteta sentenco, promesinta *feliĉon* kaj *riĉecon*, fine plenumiĝis; feliĉo kaj riĉeco, almenaŭ en meza mezuro, akompanadis la paŝojn de la bona tajloro; kaj ĉiufoje kiam li aŭdis pri la gloro de la juna sultano Omar, kiu nun vivis en ĉies buŝo, — kiam li aŭdis, ke tiu kuraĝulo estas la fiero kaj la amo de sia popolo kaj la teruro de siaj malamikoj, tiam la iama princo pensis en si mem: "Tamen pli bone ja estas, ke mi restis tajloro, ĉar honoro kaj gloro estas ja danĝeraj aferoj." Tiel vivis Labakano, kun si mem kontenta, de siaj samurbanoj respektata; kaj se la kudrilo ne perdis sian magian povon, certe ĝi ankoraŭ ĉiam kudradas per la eterna fadeno de la bona feino Adolzaĵdo.

Ĉe la subiro de la suno la karavano reekvojiris pluen, kaj baldaŭ ĝi atingis Birket el Had, "Fontanon de l' Pilgrimantoj," de kie ĝis Kajro estas nur trihora irado. Oni sciis, ke ĉirkaŭ tiu tempo la karavano alvenos, kaj baldaŭ la komercistoj havis la ĝojon vidi siajn amikojn venantajn renkonte al ili el Kajro. Ili eniris en la urbon tra la pordego Bab el Falk, ĉar ĝi estis rigardata kiel feliĉa antaŭsigno, eniri tra tiu pordego, tra kiu en pasinta tempo trapasis la Profeto.

Sur la foirejo la kvar turkaj komercistoj adiaŭis la fremdulon kaj la grekan komerciston Zaleŭkos kaj iris hejmen kun siaj amikoj. Zaleŭkos kondukis la fremdulon al bona karavanejo kaj invitis tie tagmanĝi. La fremdulo akceptis la inviton, sed li antaŭe foriris ŝanĝi sian vestaron, promesinte baldaŭ reveni.

La greko jam faris ĉiun antaŭaranĝon, por bone regali la fremdulon, por kiu li eksentis dum la vojaĝo apartan korinklinon; kaj kiam la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj staris bonorde sur la tablo, li sidiĝis, por atendi sian gaston.

Nun fine li aŭdis lin, alproksimiĝantan per malrapidaj pezaj paŝoj laŭlonge de la koridoro, kiu kondukis al lia ĉambro. Li leviĝis, por iri renkonte al li kaj fari al li tutkoran akcepton; sed, malferminte la pordon, li ekpaŝis malantaŭen, terurita, ĉar jen renkontis lin ĉe la sojlo tiu timiga ruĝmantelulo! Ankoraŭ unu rigardon li ĵetis sur lin: iluzio ĝi ne estis; la sama alta majesta figuro, la masko, tra kiu la nigraj okuloj rigardis lin fulme, la ruĝa mantelo kun la oraj brodaĵoj — ĉio tio, el la plej teruraj horoj de lia vivo, estis al li ja nur tro bone konata. Interbatalantaj sentoj skuadis ekscite la bruston de Zaleŭkos. Estas vero, ke li jam repaciĝis kun tiu bildo de sia memoro, kaj tamen la vido de tiu nekonato, kiun li jam de longe pardonis, dismalfermis denove ĉiujn vundojn de lia koro: tiuj doloroplenaj horoj de antaŭmorta timo, tiu ĉagrenego, kiu venenis por ĉiam lian junan vivon, denove preterpasis antaŭ lia animo kvazaŭ per unumomenta ekflugo.

Ĉiam senmove staris la aperaĵo sur la sojlo. "Kion vi volas, terura?" ekkriis la greko. "For de miaj okuloj, ke mi ne malbenu vin!"

"Zaleŭkos!" parolis el sub la masko konata voĉo; "ĉu tiel vi akceptas vian gaston?" La parolanto demetis la maskon kaj disŝovis de sia brusto la mantelon: ĝi estis Selim Baruh, la fremdulo.

Sed Zaleŭkos ŝajnis ankoraŭ ne trankviligita: terure estis al li en ĉeesto de tiu fremdulo, ĉar nur tro klare li rekonis en li la nekonaton de *Ponte vecchio*. Tamen tiu ĉi sento cedis fine al lia kutima gastamo; kaj, nenion dirante, li faris signon al la fremdulo, ke li sidiĝu kun li al la tablo.

"Mi divenas viajn pensojn," prenis Selim Baruh la parolon, kiam ili sidiĝis, "ĉar vi rigardas min per elokvente demandantaj okuloj. Mi povus silenti kaj neniam plu min montri al viaj rigardoj, sed mi ŝuldas al vi klarigon pri mia konduto, kaj tial mi kuraĝis, eĉ riskante vian malbenon, aperi antaŭ vi en mia iama vestmaniero. Vi iam diris al mi: 'Laŭ la kredo de miaj prapatroj mi devas lin ami; cetere, li sendube estas eĉ pli malfeliĉa ol mi.' Tion ĉi lastan vi kredu nur, amiko Zaleŭkos; kaj nun aŭdu mian senkulpiĝon.

"Mi devas reveni ĝis la komenco, por min bone komprenigi. Mi naskiĝis en Aleksandrio, de kristanaj gepatroj. Mia patro, la pli juna filo de malnova glora franca familio, estis konsulo de sia lando en Aleksandrio. De mia deka jaro oni edukis min en Francujo ĉe frato de mia patrino; kaj pasis jam kelkaj jaroj de post la komenco de la revolucio, kiam mi forlasis mian patrujon, por serĉi trans la maro rifuĝejon ĉe miaj gepatroj; akompanis min mia onklo, kiun minacis nun en la lando de liaj prapatroj plej grandaj danĝeroj. Plenaj de espero, ke ni reakiros en la gepatra hejmo la trankvilon kaj pacon, je kiu senigis nin la furioza franca popolo, ni alboridiĝis en Aleksandrio. Sed ho ve! ne ĉion mi trovis en la domo de mia patro, kiel ĝi devas esti. Estas vero, ke la eksteraj ventegoj de tiu malkvieta tempo ankoraŭ ne atingis ĝis tie; sed des pli neatendite trafis la malfeliĉo mian familion en ĝia plej profunda interno. Malmulte da tempo antaŭe, mia frato, esperoplena junulo, ĉefsekretario de mia patro, edziĝis kun juna knabino, filino de firenza nobelo, kiu loĝis en nia najbaraĵo; du tagojn antaŭ nia alveno, ŝi subite malaperis, kaj eĉ la plej malgrandan postesignon de la malfeliĉa knabino nek nia familio nek ŝia patro povis trovi. Oni fine konvinkiĝis, ke ŝi nesingardeme promenis tro malproksimen de la urbo kaj falis en la manojn de rabistoj. Por mia kompatinda frato ĉi tiu penso estus eble malpli aflikta, ol la hontinda vero, kiun ni nur tro baldaŭ eksciis: la perfidulino enŝipiĝis kaj forveturis eksterlandon kun juna Napolano, kiun ŝi ekkonis en la domo de sia patro. Kvazaŭ freneza de kolero, mia frato faris ĉion eblan por venigi al juĝo la kulpulinon; sed vane: liaj klopodoj, kiuj faris sensacion en Napolo kaj Firenzo, servis nur por plenumi lian propran malfeliĉon kaj ĉiujn nin pereigi. La firenza nobelo foriris returne en sian patrujon; al ni li kredigis, ke li volas havigi justecon al mia frato, sed en realeco li celis nian ruinon. En Firenzo li malprosperigis ĉiun esploron, kiun entreprenis mia frato; kaj la influon, kiun li akiris al si per ĉiuj eblaj rimedoj, li lerte profitis por altiri sur mian patron kaj mian fraton la suspekton de la franca registaro: per plej hontindaj tromprimedoj oni kaptis ilin, fortrenis Francujon kaj igis tie mortigi per la ekzekutista hakilo. Mia malfeliĉa patrino fariĝis freneza, kaj pasis dek longaj monatoj, antaŭ ol la morto liberigis ŝin de ŝia terura stato, kiu tamen en la lastaj tagoj ŝanĝiĝis en plenan, klaran konscion. Tiel mi nun troviĝis tute sola en la mondo, sed nur *unu* penso okupis mian spiriton, nur *unu* penso igis min forgesi pri mia funebro; kaj tiu penso, kiun, en sia lasta horo, mia patrino mem ekbruligis en mi, baldaŭ fariĝis kvazaŭ ardega flamo en mia animo.

"Kiel mi jam diris, mallonge antaŭ ŝia fino revenis al ŝi la konscio; ŝi lasis min voki kaj parolis trankvilanime pri nia malfeliĉo kaj pri sia propra morto. Poste ŝi petis ĉiujn aliajn forlasi la ĉambron; kun solena mieno ŝi sidiĝis rektiĝinte sur sia mizera kuŝejo kaj diris, ke mi povas akiri ŝian benon, se mi ĵuros tion plenumi, kion ŝi nun ordonos al mi. Kortuŝita de la vortoj de l' mortanta patrino, mi ĵure promesis plenumi ŝian volon. Ĉe tio ŝi komencis denove surŝuti per insultoj la Firenzanon kaj lian filinon kaj ordonis al mi, kun plej teruraj minacoj de ŝia malbeno, venĝi kontraŭ li mian

malfeliĉan familion. Ŝi mortis en miaj brakoj. Jam de longe dormetis en mia animo tiu penso pri venĝo; nun ĝi plenforte vekigis. Mi kolektis la reston de mia patra havo kaj ĵuris al mi mem, ke mi uzos ĉiun eblan rimedon, por plenumi mian venĝon, eĉ se mi per tio pereos.

"Baldaŭ mi alvenis Firenzon, kie mi tenis min kiel eble plej kaŝite. Multe malhelpis mian planon la situacio, en kiu sin trovis miaj malamikoj. La maljuna Firenzano fariĝis intertempe gubernatoro, kaj nun ĉe la plej malgranda suspekto li havis en mano ĉiujn rimedojn, por min pereigi. Akcidento venis al mia helpo. Unu vesperon mi ekvidis, irantan tra la stratoj, homon en konata livreo; lia ŝanceliĝa irado, lia malgaja mieno kaj lia kolera murmurado de *santo sacramento* kaj *maledetto diavolo* rekonigis al mi la maljunan Pietron, serviston de la Firenzano, kiun mi jam konis en Aleksandrio. Mi ne dubis, ke li koleras kontraŭ sia sinjoro, kaj mi decidis profiti lian malbonan humoron. Li ŝajnis tre mirigita, vidante min tie, forte plendis, ke de l' tempo, kiam lia sinjoro fariĝis gubernatoro, li per nenio jam povas lin kontentigi; kaj baldaŭ mia oro, subtenata de lia kolero, translogis lin definitive al mia flanko. La ĉefa malhelpo estis tiel forigita; mi havis dungitan serviston, kiu en ĉiu horo malfermos por mi la pordon de mia malamiko; kaj de nun maturiĝis ĉiam pli rapide mia plano de venĝo. Al mi ŝajnis, ke la mizera vivo de la maljuna Firenzano tute ne havas ian egalpezon kun la pereado de mia familio; ne, sian plej amatan li devas vidi mortigita: kaj tio estis Bianka, lia filino. Ĉu ĝi ne estis ŝi, kiu tiel hontinde krimis kontraŭ mia frato? — ŝi ja, kiu estis la ĉefa kaŭzo de nia malfeliĉo? Eĉ ĝojigis mian venĝosoifantan koron la novaĵo, ke ĝuste tiutempe Bianka intencis la duan fojon edziniĝi; mi tuj prenis decidon: nun morti ŝi nepre *devas*. Tamen mi timis plenumi propramane la krimon, kaj ankaŭ Pietron mi ne juĝis kapabla ĝin fari; tial ni ĉirkaŭesploris, por trovi iun, kiu povus prizorgi la aferon. El la Firenzanoj mi kuraĝis dungi neniun, ĉar neniun entreprenus ion tian kontraŭ la gubernatoro. Fine naskiĝis en la kapo de Pietro la plano, kiun mi poste plenumis; samtempe, ĉar vi estas fremdlandano kaj kuracisto, li proponis vin kiel plej taŭgan ekzekutiston. Pri la plua irado de la afero vi ja scias. Nur via tro granda singardemo kaj honesteco preskaŭ malprosperigis mian entreprenon: de tio venis la epizodo de la mantelo.

"Pietro malfermis por ni la pordeton en la palaco de l' gubernatoro, kaj ne malpli kaŝe li volis nin poste reelkonduki sur la straton; sed tra fendo en la pordo ni povis bone vidi ĉiun detalon de la mortigo, kaj, terurite de la infera spektaklo, ni forkuregis el la domo. Antaŭenpelate de timo kaj pento, mi kuris pli ol du cent paŝojn, ĝis mi falis senforta sur la ŝtupojn de preĝejo. Kiam mi fine reakiris la memregadon, mia unua penso estis pri vi kaj via terura sorto, se oni vin trovos en la palaco. Mi alŝteliĝis tien, sed nek de vi nek de Pietro mi povas trovi eĉ la plej malgrandan, postsignon; sed la pordeto ankoraŭ staris malfermita, kaj tial mi almenaŭ povis esperi, ke vi jam profitis la okazon por forkuri el la domo.

"Kiam fariĝis tago, timo antaŭ eltroviĝo kaj premanta sento de pentito igis por mi neeble, ke mi restu plue en Firenzo. Mi tuj foriris Romon. Sed prezentu al vi mian konsterniĝon, kiam oni tie post kelkaj tagoj rakontadis ĉie la aferon, kun la aldono, ke la mortigisto, greka kuracisto, estas kaptita. Maltrankvila, timoplena, mi reiris Firenzon: jam antaŭe mia venĝo ekŝajnis al mi iom supermezura, sed nun mi ĝin eĉ malbenis, ĉar multe tro kare mi pagus por ĝi, se la prezo estus via vivo. Mi alvenis Firenzon en la sama tago, kiu rabis al vi vian manon. Kion mi sentis, vidante vin suriri la eŝafodon kaj tiel heroe suferi, pri tio mi ne volas paroli; sufiĉas diri, ke kiam via sango tie elŝprucis, jam fariĝis neŝancelebla mia decido, dolĉigi al vi la reston de via vivo. Vi mem ja ĉion scias, kio poste okazis, kaj restas al mi nur klarigi, kial mi faris kun vi ĉi tiun vojaĝon. Kiel peza ŝarĝo premis min la penso, ke vi ankoraŭ ne pardonis min; tial mi decidis kunvivi kun vi dum multaj tagoj kaj fine fari plenan malkaŝan konfeson pri mia kulpo."

Ĝis nun, dum lia gasto parolis, la greko silentis; nun, kiam li finis sian rakonton, li etendis al li, kun milda rigardo, sian manon. "Mi bone sciis, ke vi estas pli malfeliĉa ol mi, ĉar ĉiam, kvazaŭ per nigra nubo, mallumigos tiu krimo la tagojn de via vivo; el mia tuta koro mi pardonas al vi. Sed permesu, ke mi faru al vi ankoraŭ unu demandon: kiel fariĝis, ke vi venis sub tiu ĉi formo en la dezerton? Kion vi faris poste, aĉetinte por mi la domon en Konstantinopolo?"

"Mi reiris Aleksandriion," respondis la alia. "Malamo al ĉiuj homoj bolis en mia brusto, flamanta malamo precipe al tiuj nacioj, kiujn oni nomas 'kulturaj': kredu al mi, ĉe miaj Muslimoj mi sentis min multe pli bone. Nur de malmulte da monatoj mi jam estis en Aleksandriio, kiam okazis la invado de miaj samlandanoj. Mi vidis en ili nur la ekzekutintojn de mia patro kaj de mia frato; tial mi kolektis el inter miaj konatoj kelke da samepensantaj junuloj kaj aliĝis al tiuj kuraĝaj Mamelukoj, kiuj tiel ofte fariĝis la teruro de la franca armeo. Post la militiro, mi ne povis decidi reveni al la laboroj de l' paco. Mi vivis kun mia areto da samideanaj amikoj sovaĝan vivon de vagisto, dediĉitan al batalo kaj ĉaso. Kun tiuj homoj, kiuj respektas min kiel hetmanon, mi vivas kontenta; ĉar kvankam miaj Azianoj ne estas tiel kulturitaj, kiel viaj Eŭropanoj, tamen ili estas tute netuŝitaj de envio kaj kalumniemo, de egoismo kaj ambicio."

Zaleŭkos dankis la fremdulon pro lia sciigo, sed esprimis sian opinion, ke estus pli konforme al lia alta instruiteca rango, se li vivus kaj laborus en la kristanaj landoj de Eŭropo. Li prenis lian manon kaj petis lin veni kun li, ke ili kune vivu kaj mortu.

Kortuŝita, la gasto rigardis lin. "El tio mi scias," li diris, "ke vere vi min pardonis, ke vi vere min amas. Akceptu pro tio mian plej varman dankon." Li salte leviĝis kaj ekstaris plenkore antaŭ la greko, kiun preskaŭ teruris la militista teniĝo, la nigraj fulmebrilantaj okuloj, la profunda misteroplena voĉo de lia gasto. "Via propono estas

bela," parolis tiu ĉi plue; "por ĉiu alia ĝi estus alloga, sed mi — ne povas ĝin akcepti. Jam staras selita mia ĉevalo, jam atendas min miaj servistoj; adiaŭ, Zaleŭkos!"

La amikoj, kiujn la sorto tiel mirinde kunigis, ĉirkaŭprenis sin adiaŭante. "Kaj kiel mi devas vin nomi? Kiel nomiĝas mia gasto, kiu vivos eterne en mia memoro?" demandis la greko.

La fremdulo rigardis lin longe, ankoraŭ unu fojon premis al li la manon kaj diris: "Oni nomas min la sinjoro de la dezerto; mi estas *la rabisto Orbasano*."

FINO.

¹ Turka interpretisto (vorto internacia).

² La turka registaro: angl., *The Porte*; fr., *La (Sublime) Porte*; germ., *Die (hohe) Pforte*.

³ Nomo, kiun donas orientanoj al ĉiuj okcident-eŭropanoj: *Franko* estas do, laŭ tio, *ne* identa al *Franco*.

⁴ Estinta itala ormonero: ital., *zecchino*; hisp., *zequi*; france kaj angle, *sequin*; germ., *Zechine*.

⁵ *Altano*: germane, *Altan*: balkonsimila teraseto aŭ estrado, alkonstruita al doma fasado kaj portata de subkonstruaĵo (ĉu muroj, ĉu kolonoj); en ĉi tiu rilato ĝi diferencas de ordinara balkono, kiu elstaras el la muro de l' domo. La germana vorto *Altan* devenas de la itala *altana*.

⁶ Turka juĝisto.

⁷ En la moderna turka lingvo *Kapitan-Paşao*, ĉefadmiralo de la turka militŝiparo.

⁸ *Agao*, turka oficiro.

⁹ *Kadio*: turka juĝisto; *muftio*: turka ĉefpastro.

¹⁰ Mahometana sekto, fondita de Abd ul Wahab, ĉirkaŭ la jaro, 1745.

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK LA KARAVANO ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for

copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE